

Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj
La Kongreso okazas sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio

Kongresa Libro

Vilnius
26-30 majo 2008

Kongresa Temo:

**Internacia interkultura komunikado:
ĵurnalismo kaj Esperanto**

© Litova Esperanto-Asocio 2008

ISSN

Redaktita kaj kompostita en Litova Esperanto-Asocio, Litovio.

Redaktoro kaj kompilinto Laimius Stražnickas.

Presita en Litovio

Elkoran dankon

al Sejmo (parlamento) de Litovia Respubliko,

al Registaro de Litovia Respubliko,

al Municipo de Vilnius,

al Ministerio pri eksterlandaj aferoj de Litovia Respubliko,

al Ministerio pri kulturo de Litovia Respubliko,

al Urbodomo de Vilnius

por la kontribuo al aranĝo de Tutmonda Kongreso de
Esperantistoj-Jurnalistoj

Enhavo

Mesaĝo de la Alta Protektanto	5
Salutvortoj	6
Organiza Komitato	13
Utilaj informoj pri Litovio	14
Vilnius — ĉefurbo de Litovio	16
La hotelo	18
La kongresejoj	19
Laŭtaga programo	21
Ekskursataĝo	26
Kongresa gazeto	27
Kongresa temo	28
Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA). Historia skizo	32
Estraro de TEĴA	33
Kio estas, kion celas TEĴA?.....	34
Statuto de TEĴA	34
Etika kodo de ĵurnalismaj principoj	38
Reglamento de TEĴA	39
Ankoraŭ foje pri la Esperanta gazetaro	44
Prelegantoj	63
Listo de kongresanoj	109
Statistiko	118

Mesaĝo de Alta Protektanto



Estimataj partoprenantoj kaj gastoj de Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj,

Mi sincere salutas vin, el diversaj anguloj de la mondo kunveninte en la ĉefurbo de Litovio Vilnius. Via kongreso estas unika, ĉar vi povas interkompreniĝi sen tradukistoj. Litovio povas fieri, ke sur ĝia tero fontas Esperanto fluo — antaŭ pli ol 120 jaroj, loĝanta en pitoreska sudlitova urbeto Veisiejai, Ludoviko Zamenhof finis verki Esperanton.

Hodiaŭ ni vivas en la epoko de senĉese aktiviĝanta interpopola kunlaboro. Por la internacia komunikado necesas la lingvo, kiu estu ne nur facile lernebla, sed ankaŭ neŭtrala, t.e. sen ajna privilegio al cetera lando. Tiu ĉi via kunveno atestas, ke tiuspeca serĉado okazas, ke tia lingvo povus esti sukcese uzata por internacia komunikado.

Mi esperas, ke esperantistoj ĵurnalistoj per sia vorto kaj ekzemplo pruvos, ke Esperanto estas bonega alternativo, ke pli ampleksa disvastiĝo de la lingvo instigos interpopolan respekton, reciprokajn interesiĝon al iliaj kulturoj.

A handwritten signature in blue ink, consisting of a stylized 'G' followed by a long horizontal line and a small dot at the end.

Gediminas Kirkilas
Ĉefministro de Litovia Respubliko

Salutvortoj



Estimataj gastoj de Litovio, partoprenantoj de Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj, bonvenon en antikva Vilnius, la ĉefurbo de la ŝtato en Eŭropa centro!

Malgraŭ militoj, okupacioj kaj postaj diversaj perdoj, Litovio restas la lando, kiu konservis miljarlongan lingvan ligan kun hindoeŭropa pralingvo, riĉan folkloron kaj pli grandan parton de sia etna tereno. Veraj litovoj distingiĝas ne nur per la amo al propra kulturo, sed ankaŭ per demokratismo kaj respekto por aliaj nacioj.

Esperanto estas la sola lingvo, kiu ofertas vere egalrajtan eblecon de komunikado kaj per sia ekzisto realigas respekton por kulturoj de fremdaj popoloj. Ni fieras, ke Esperanto estas kreaĵo de litvako Ludoviko Lazaro Zamenhof, homo de nia lando. La ideo, ke naciaj lingvoj devas domini en propraj ŝtatoj kaj internacia servus por internaciaj rilatoj, vere konvinkas multajn litovojn.

Estas agrable, ke via kongreso okazas antaŭ gravaj por Litovio solenaĵoj. Vilnius, antaŭ 675 jaroj menciita kiel ĉefurbo de Litovia ŝtato, venontjare fariĝos la ĉefurbo de Eŭropa kulturo. En la jaro 2009 ni festos miljaron de Litovia nomo. Mi esperas, ke vi reveninte hejmen raportos en via gazetaro, kiel dank'al Esperanto vi ekkonis ankoraŭ ne por ĉiuj konatan Litovion kaj tielmaniere vi pruvos la profiton, kiun ofertas internacia lingvo Esperanto.

Mi sincere deziras al vi interesan kaj sukcesan laboron, sukceson disvastigante internaciajn ĵurnalistajn rilatojn, firmigante reciprokan interkompreniĝon de popoloj, popularigante en la mondo avantaĝojn de Esperanto.

Ĉeslovas Juršėnas

Prezidanto de la Sejmo (parlamento) de Litovia Respubliko



Antaŭ pli ol cent jaroj tute neatendite inter miloj da lingvoj aperis la nova — Esperanto. Ludoviko Lazaro Zamenhof, sagace kreinte simplan, unikan eblecon de komunikado, kunigis milojn da homoj, kiuj strebas al komunikiĝo kaj konatiĝo. Nova lingvo fulmrapide disvastiĝis en la larĝa mondo. Ĝi kvazaŭ ponto kunligis kulturojn, tradiciojn de la tuta mondo.

Mi deziras al vi sukcese popularigi kaj disvastigi Esperanton, firmigi amikajn kaj reciproke fruktodonajn rilatojn.

Juozas Imbrasas
Urbestro de Vilnius



Estimataj,

Mi ĝojas, ke tiu ĉi grava internacia aranĝo — Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj — okazas en Litovio, en la lando, en kiu spuras la vivo de la aŭtoro de Esperanto Ludoviko Zamenhof.

Mi esprimas mian respekton por ĉiuj adeptoj de tiu ĉi lingvo, kiuj ĉiam zorgis pri ĝia disvastigo en Litovio, malgraŭ kvindek jaroj da ĝeno de libera vorto kaj libera opinio. Por la parto de nia socio Esperanto fariĝis kvazaŭ simbolo, siaspeca lingvo de libereco. Mi dankas, ke vi ne forgesis ĝin, zorgas pri ĝi kaj per via entuziasmo „infektas“ novajn generaciojn.

Min mirigas entuziasmo kaj persisto de tutmonda esperantistaro. Eĉ se Esperanto neniam fariĝos *lingua franca* de tuta homaro, ĝi ĉiam enkarnigos esperon de homa unuiĝo kaj interkompreniĝo.

Mi opinias, ke ĵurnalistoj esperantistoj estas unikaj reprezentantoj de sia profesio — veraj ĵurnalistoj sen limoj — personoj, kiuj havas esperon kaj kiuj kredas je principoj de homara kaj popola egalrajto kaj demokratismo. Kvazaŭ kolomboj de la paco, vaste disiĝinte tra ĉiuj kontinentoj, vi instigas fortigon de interpopla konkordo kaj firmigon de komunaj kontaktoj.

Dezirante al vi paciencon kaj senliman energion en realigo de noblaj celoj, mi volus ripeti vortojn de L.Zamenhof — „Lingvo internacia, simile al ĉiu nacia, estas socia propraĵo“.

Ni flegu kaj gardu ĝin.

Dankon! Aĉiŭ!

Petras Vaitiekūnas

Ministro pri eksterlandaj aferoj de Litovia Respubliko



Estimataj partoprenantoj kaj gastoj de Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj,

Litovio estas la ŝtato malferma kaj aktive kunlaboranta en kultura dialogo. Tial estas precipe agrable ĉi tie kunigi gesamideanojn el la tuta mondo.

Kreante Esperanton Ludoviko Zamenhof metis por si celon revenigi la tempon, kiam homaro ankoraŭ ne pensis pri la konstruo de Babela turo. Li strebis al oferto de perfekta interpopola komunikilo, kiu unuigus ĉiujn popolojn de la mondo. Vere, Esperanto kiel rezulto de plurkultura sintezo iĝis valora simbolo de popola unuiĝo kaj por Litovio estas granda honoro organizi tiun ĉi kongreson, kiu grave rolas solvante problemojn de globaligo, internacia dialogo, nacia identeco, internacia amaskomunikada kunlaboro, k.a.

Spite al disvastiĝo de Esperanto, por la mondo gravas la fakto pri la ekzistado de globala komunikilo. Esperanta amaskomunikado estas universala, pleje ĝeneraliga, libera de naciaj diferencoj informfonto kaj rimedo de analizado de internaciaj demandoj. Globala lingvo ne neas specifan identecon sed helpas detiriĝi de kontraŭstaroj kaj koncentriĝi je komunaj aferoj. Tial ĝi estas la plej bona maniero paroli pri universalaj aferoj.

Al ĉiuj kongresanoj mi deziras fruktodonan, sencohavan, enhavoriĉan kaj interesan laboron sub la verda stelo de Esperanto.

Jonas Jučas

Ministro pri kulturo de Litovia Respubliko



Estimataj gekolegoj, partoprenantoj de TEĴA Kongreso,

Emo ekkoni kaj tiun konon distribui por aliaj estas unika trajto, kiu unuigas ĵurnalistojn de la tuta mondo. Sendepende de iliaj lingvoj kaj kulturoj, kiuj nur pliriĉigas nian krean potencon kaj permesas interŝanĝi la plej diversan sperton.

Ni fieras, ke tiu trezoro kontribuas al nia solidareco. Ja solidareco estas la plej granda ĵurnalista potenco, kiun ni uzas ege rare, tamen nur ĝi superas nian eblecon esprimiĝi en publika spaco. Simbole, ke Esperanto unuigas ĉiujn menciitajn obstaklojn. Ĝi ofertas por ni eblecon forigi miskomprenojn kaj diferencojn inter niaj sufiĉe malsamaj naciaj lingvoj. Ĝi ne anstataŭas sed proksimigas. Ĝi permesas ekkoni kaj disdividi tiun konon. Ŝajne, Esperanto eĉ povus titoliĝi la plej universala kaj la plej unika lingvo de ĵurnalistoj.

En Vilnius, kiu dum multaj jaroj servis kiel ponto inter Oriento kaj Okcidento, inter malsamaj kulturoj kaj historiaj spertoj, hodiaŭ ni renkontiĝas priparoli niajn eblecojn. Ne nur priparoli sed ankaŭ kontribui al interkompreniĝo de aliaj. Tio estas unu el la plej grandaj defioj en hodiaŭa monda politiko. Ni ne estas politikistoj, tamen perceptante, ke la paco estas la plej grava afero por la tuta mondo, ni devas atingi deziron kompreni, sed ne nur deziron esprimiĝi.

Mi deziras por vi ĉiuj interkompreniĝon kaj deziron komunikiĝi.

Dainius Radzevičius

Prezidanto de Litova Ĵurnalista Asocio



En mia propra nomo kaj en tiu de Universala Esperanto-Asocio mi salutas la ĵurnalistan kongreson okazontan ĉi-maje en Vilno. Tiu tre grava kongreso, kiun mi bedaŭrinde ne trafas persone ĉeesti, kunmetas la valorojn de Esperanto kun la valoroj de la objektiva kaj universalema ĵurnalismo, kaj mi deziras al tiu entrepreno grandan sukceson.

Inter miaj plej karaj gekonatoj estis la karmemora s-ro Gourkishor Ghosh — ricevinto de la premio Magsaysay — kiu senlace laboris kiel ĵurnalisto por pliharmoniigi la rilatojn inter hinduoj kaj islamanoj en Barato. En li kombiniĝis la virtoj de ĵurnalisto kun la simpla virtuo de literaturisto, kaj tiel devus ja esti. Mi aparte memoras lin, kiam mi ĉi-salutas al via grava kongreso.

Amike salutas vin ĉiujn

Probal Dasgupta
Prezidanto de UEA



Mi varme salutas la partoprenantojn de la Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj kaj danke gratulas Litovan Ĵurnalistan Asocion kaj Litovan Esperanto-Asocion, kiuj ĝin iniciatis kaj organizis.

Via kongreso okazas en la sama urbo, kie antaŭ tri jaroj pli ol 2300 esperantistoj kunvenis por la 90-a Universala Kongreso de Esperanto sub la temo *Universalaj Kongresoj: 100 jaroj de interkultura komunikado*.

Mi ĝojas, ke per sia propra temo, *Internacia interkultura komunikado: ĵurnalismo kaj Esperanto*, la ĵurnalista kongreso daŭrigas la traktadojn de la jubilea UK sur kampo, kies gravecon apenaŭ eblas trotaksi.

Ankaŭ tiel Litova Esperanto-Asocio denove pravas, ke por ĝi la sukcesa okazigo de UK ne estis finhaltejo de plurjara fortostreĉo sed etapo en konstanta konscia agado. Ne laste pro tio UEA volonte donis siajn aŭspiciojn al tiu ĉi nova evento.

Mi deziras sukceson al viaj laboroj.

Osmo Buller
Ĝenerala direktoro de UEA



Unuavice mi volas esprimi mian veran admiron kaj sincere gratuli al la organizantoj de la unua Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj, — Litova Esperanto-Asocio kaj Litova Ĵurnalista Asocio, kaj deziras al la kongreso multajn sukcesojn.

Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, mallonge TEĴA, estas faka asocio de UEA. Ĝi estas fondita antaŭ 61 jaroj kun la celo servi al ĵurnalistoj profesiaj kaj amatoraj, kaj kunigi ĵurnalistojn, kiuj scipovas Esperanton, por komuna kunlaboro. Post la malfondo en 2003 TEĴA estis formale reaktivigita en la jaro 2005, dum la UK en Vilno, kaj nun, post tri jaroj, TEĴA gastas denove en tiu ĉi urbo, en tiu ĉi kongreso, kies celoj fakte koincidas kun la celoj de TEĴA.

Mi kredas, ke la kvin printempaj tagoj, kiujn pasigos komune esperantistoj-ĵurnalistoj el 37 landoj en la ĉefurbo de Litovio, alportos ankaŭ novan printempon al Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio kaj markos novajn vojojn, kiujn ni kune iros por antaŭenigi nian aferon.

Mi deziras al vi agrablan restadon kaj fruktodonajn kunsidojn.

Stano Marček

Nome de Estraro de TEĴA



Estimataj gekongresanoj, karaj gastoj,

Nome de Litova Esperanto-Asocio mi sincere salutas Vin venintajn el kelkaj dekoj da landoj en ĉefurbo de Litovio Vilnius por pridiskuti problemojn aktualajn ne nur por ĵurnalistoj-esperantistoj, sed aktualajn por nuntempa globaliĝanta mondo ĝenerale. Litova Esperanto-Asocio kune kun Litova Ĵurnalista Asocio multe laboris preparante tiun efektive la unuan Tutmondan Kongreson de Esperantistoj-Ĵurnalistoj kaj por prepari bonan grundon por reviviĝo de la Tutmonda Esperantista-Ĵurnalista

Asocio (TEĴA) – unu el gravaj aliĝintaj fakaj asocioj de UEA. Tre granda interesiĝo pri la kongreso montras, ke ĝi estis bona, bezonata kaj ĝustatempa iniciato. Riĉeco, amplekseco kaj solideco de la Kongresa programo aŭguras ĝin esti anticipe sukcesa. Necesas noti, ke gravecon de la Kongreso agnoskis kaj diversflanke subtenas ĝin la plej altaj ŝtataj instancoj de Litovio kaj de Vilnius — Litovia parlamento, Litovia registaro, Municipo de Vilnius, Ministerio pri eksterlandaj aferoj, Ministerio pri kulturo, pro kio mi nome de la organizantoj sincere dankas. Mi esperas, ke ankaŭ Vilnius kaj Litovio ĝenerale estos gastamaj al Vi dum tiu Kongresa semajno, kaj ke Vi ĝuos kelkajn agrablajn momentojn en nia lando.

Signifan Kongreson kaj belajn impresojn al Vi !

Povilas Jegorovas

Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

Prezidanto de la Organiza komitato de la Kongreso



La mondo sen ĵurnalistoj kaj ĵurnalismo estas ne nur neimagebla, sed ĝenerale neebla. Vere, hodiaŭ ĵurnalismo estas disŝirita per internaj kontraŭdiroj. Iuj ĵurnalistoj parolas le veron pri teruraj aferoj en militkampoj aŭ pri realaj sociaj procesoj, aliaj iam ion serĉas en la malpura lavaĵo aŭ servas nur al kapitalo. Bedaŭrinde nia ĵurnalismo havas la helan kaj obskuran flankojn.

Sed Esperanta ĵurnalismo preskaŭ ĉiam estis hela. Ĝi asertis la egalecon de homoj kaj popoloj, instigis ideojn de konatiĝo kaj interkompreniĝo. Mankis nur unu – pli aktiva kaj pli organizita kunlaborado de ĵurnalistoj esperantistoj. Mi esperas kaj bondeziras, ke tiu ĉi Tutmonda kongreso estu antaŭenpuŝo al nova kvalita nivelo kaj transformu Esperantan ĵurnalismen en bone organizitan movadon. Tio necesas ne nur por ni mem, sed, mi esperas, por la tutmonda ĵurnalismo ĝenerale.

Bonŝancon por ĉiuj kongresanoj kaj gastoj de nia kongreso.

Audrys Antanaitis

Prezidanto de Litova Esperantista Ĵurnalista Asocio

Organiza Komitato



Povilas JEGOROVAS
Prezidanto (Prezidanto de Litova E-Asocio)



Dainius RADZEVICIUS
Unua vicprezidanto (Prezidanto de Litova Ĵurnalista Asocio)



Audrys ANTANAITIS
Vicprezidanto (Prezidanto de Litova E-Ĵurnalista Asocio, Vicprezidanto de Litova Ĵurnalista Asocio)



Irena ALIJOSIŪTĒ
Sekretario (Respondeca sekretario de Litova E-Asocio)



Vytautas ŠILAS
Membro (Redaktoro de *Litova stelo*, Vicprezidanto de Litova E-Ĵur - nalista Asocio)



Lina MYKOLAITIENĒ
Membro (Financistino de Litova Ĵurnalista Asocio)



Eglė NENORTAITĒ
Membro (Juristino de Litova Ĵurnalista Asocio)



Gintautas STALNIONIS
Membro (Redaktoro de retejo de Litova Ĵurnalista Asocio)



Ernesta PIEČIŪTĒ
Membro (Sekretariino de Litova E-Asocio)



Dae Suk CHOI (CHOE Taesok)
Membro (Redaktoro kaj kmpilanto de retejo de LEA)

Utilaj informoj pri Litovio



Geografiaj koordinatoj: norde $56^{\circ}27'$ da norda latitudo, sude $53^{\circ}54'$ da norda latitudo; okcidente $20^{\circ}56'$ da orienta longitudo, oriente $26^{\circ}51'$ da orienta longitudo. Distanco inter la plej norda kaj la plej suda punktoj 280 km, inter la plej okcidenta kaj la plej orienta — 372 km.

Areo de la ŝtato: 65 200 kvadrataj kilometroj. En Eŭropo estas 15 malpli grandaj ŝtatoj: Albanio, Belgio, Bosnio-Hercegovino, Danio, Estonio, Kroatio, Latvio, Luksemburgio,

Makedonio, Malto, Moldavio, Nederlando, Slovakio, Slovenio, Svislando.

Landlimoj: norde kun Latvio 588 km, oriente kaj sude kun Belorusio 660 km, sude kun Pollando 103 km, sudokcidente kun Rusio 273 km, okcidente 90 km da Baltmara bordo. Entute 1714 km.

Tereno: apudmara ebenaĵo, nur en orienta parto aperas montetoj; la plej alta monteto — Juozapinė (293,6 m super marnivelo); la plej longaj riveroj: Nemunas (937 km, en Litovio 475 km), Neris (510 km, en Litovio 234 km), Venta (346 km, en Litovio 161 km). Estas 2830 lagoj pli grandaj ol 0,5 ha; la plej grandaj lagoj: Drūkšiai (4479 ha, profundeco 33,3 m), Dysnai (2439 ha, 6 m), Dusia (2334 ha, 31,7 m). Arbaroj kovras 30,9 % da teritorio (por ĉiu loĝanto estas 0,57 ha da arbaro).

Klimato: Meza jara temperaturo + $6,1^{\circ}$ laŭ Celsius. Plej malvarma monato estas januaro ($-4,9^{\circ}$ C), plej varma — julio ($+17^{\circ}$ C). Rekorda registrita frosto -43° C, rekorda varmego $+37^{\circ}$ C.

Loĝantoj: 3 366 200 homoj (2008). Laŭ naciecoj litovoj konsistigas 83,5 %, rusoj — 6,3 %, poloj — 6,7 %, belorusoj — 1,2 %, aliaj — 2,1 %.

Vivodaŭro: Averaĝa ekspekto de vivodaŭro en 2006 estis 71,12 jaroj (por viroj 65,31 jaroj, por virinoj 77,06 jaroj).

Religio: plimulto da loĝantaro estas rom-katolikoj. Estas ankaŭ grandaj komunumoj de ortodoksuloj kaj protestantoj.

Ĉefurbo de la ŝtato: Vilnius kun 553 553 loĝantoj. Aliaj grandaj urboj estas: Kaunas (378 900), Klaipėda (192 900), Šiauliai (133 800), Panevėžys (119 700).

Administra divido: 10 departementoj kaj 44 distriktoj.

Ŝtata ordo: demokratia respubliko. La valida konstitucio aprobita dum referendumo la 25an de oktobro 1992. Gvidanto de la ŝtato — prezidento, elektata rekte de civitanoj por 5 jaroj. Parlamento estas nomata Sejmo, ĝin konsistigas 141 membroj elektataj por 4 jaroj.

Ŝtata lingvo estas la litova.

Ŝtata flago — trikoloro flava-verda-ruĝa, aprobita en 1918.

Ŝtata blazono: kavaliro sur blanka rajdĉevalo en ruĝa fono, ekde 14a jarcento. La blazono nomiĝas *Vytis* (La defensiva rajdisto).

Ŝtata himno: *Nacia glorkanto* verkita de Vincas Kudirka, unuan fojon kantita en 1906.

Ŝtataj festotagoj:

1a de januaro — La Nova jaro; tago de litova flago;

16a de februaro — tago de refondo de Litova ŝtato (en 1918);

11a de marto — tago de rekreo de sendependeco (en 1990);

6a de julio — tago de la ŝtato; kronado de Mindaugas (en 1253).

Memortagoj, dum kiuj oni hisas la flagojn:

13a de januaro — tago de defendantoj de libero (en 1991);

14a de majo — tago de rezistado (sinbruligo de R.Kalanta, 1972);

14a de junio — tago de funebro kaj espero (deportadoj en 1941);

23a de junio — tago de Junia ribelo (en 1941);

15a de julio — tago de Grunvalda batalo (en 1410);

23a de aŭgusto — tago de nigra rubando (1939);

25a de oktobro — tago de Konstitucio (1992).

Vojoj: fervojoj — 1900 km, publikaj tervojoj — 21 300 km, akvovojoj — 800 km.

Nacia valuto estas lido (litove *litas*), egala al 100 cendoj. Kodo de lido — LTL. Stabila kurzo de eŭro: 1 € = 3,45 LTL.

Vilnius — ĉefurbo de Litovio



La ĉefurbo de Litova Respubliko estas **Vilnius**. Ĝi kun 553 553 (2006) loĝantoj estas la plej granda urbo de la lando. En Vilnius loĝas 57,8% litovoj, 18,7% – poloj, 14% – rusoj, 4% – belorusoj, 0,5% – judoj. Vilnius etendiĝas sur la areo de 392 kv. km.: 20,2% okupas konstruaĵoj, alian parton — verdaĵoj (43,9%) kaj akvo (2,1%).

Historia centro de Vilnius, Antikva urboparto, estas unu el la plej grandaj en Orienta Eŭropo (3,6 kv.km.). Ĉi tie ariĝas la plej valora historia kaj kultura heredaĵo. Konstruaĵoj de la Antikva urboparto — entute ĉirkaŭ 1,5 mil — prezentas diversajn jarcentojn kaj arkitekturajn stilojn. Ofte oni nomas Vilnius la urbo de baroko. Malgraŭ tio, ĉi tie vi trovos gotikajn, renesancajn, klasikismajn kaj jugendstilajn konstruaĵojn.

Ekde la jaro 1994 la malnova urboparto de Vilnius estas protektata de UNESCO kiel valoraĵo de monda kultura heredaĵo. Ĉefaj akcentoj de la ĉefurbo estas kastelo de Gediminas, Katedrala placo, Universitato, preĝejoj de Sankta Anna, de Sanktaj Petro kaj Paŭlo, Aŭrora Pordego.

El la pluraj kasteloj, kiuj iam altiĝis sur lokaj montoj, ĝis nun restis nur la okcidenta turo de la Supra Kastelo, kutime nomata la turo de Gediminas. Laŭ defenda vidpunkto ĝi de la 15a jarcento estis tiel perfekta, ke ĝi neniam estis okupita de malamikoj. Grimpinte sur la turon de la Supra kastelo vi povas admiri panoramon de la antikva urboparto kun mezepoka stratreto.

Ekde pratempe koro de la urbo estis kaj estas la loko, kie hodiaŭ staras la Katedralo. La nuna katedralo estas konstruita laŭ projekto de eminenta litova arkitekto Laurynas-Stuoka Gucevičius en fino de la 18a jarcento. Ĝi estas perfekta ekzemplo de klasikismo.

La Universitato de Vilnius, fondita en 1579, estas unu el la plej malnovaj altlernejoj en orienta Eŭropo. Kvar ĉefaj kortoj de la universitato kun arkaj galerioj estas formitaj laŭ itala Renesanca arkitektura tradicio. La plej malnova en tuta komplekso estas Observatoria korto. La spaco de la Granda korto estas organizita laŭ principoj de baroka arkitekturo. Ne-forgeseblan impreson lasas dinamikforma preĝejo de Sanktaj Johanoj. Sonorilejo de la preĝejo menciindas kiel la plej alta konstruaĵo de malnova urboparto de Vilnius.

La preĝejo de Sankta Anna distingiĝas kiel mondfama gotika arkitektura monumento, verko de supera arta kaj kreada valoro. Historiistoj asertas, ke tio estas laboro de fortifikada inĝeniero Mykolas Enkingeris, kiu ĉe kunligo de la 15a kaj 16a jarcentoj laboris en Vilnius, Gdansk, Elbląg, Marienburg, Kenigsbergo. Ĉi tie uzita konstrutekniko de bakitaj brikoj rezultis specifan konstruon kaj motivojn de dekoracio el 33 specoj de diversformaj fasonaj brikoj.




Unu el la plej valoraj kaj impresplenaj barokaj konstruaĵoj de Vilnius estas la preĝejo de Sanktaj Petro kaj Paŭlo, konstruita en 1668-1701. La aŭtoro de la projekto estas italo J.Zaor. La internaĵon de la preĝejo elegante dekoraciis majstroj de Romaj kaj Veneziaj skoloj Pietro Peretti kaj Giovanni Galli. Freskojn pentris florencano Michaelo Paloni. Ĉiun, kiu trapasas la sojlon de tiu ĉi konstruaĵo, mirigas kaj surprizas la internaĵo, en kiu regas 2000 malsamaj skulpturaj personecoj.

Pordego de Medininkai, nun nomata Aŭrora Pordego, iam estis reprezenta pordego de la urbo. Ĝi estis konstruita en 1498-1503. Laŭ mezepoka tradicio defenda urba pordego estis dekoraciita per la bildo de Sankta Maria. Oni kreas, ke la bildo de Sankta Maria havas miraklan efikon.

Vilnius ankaŭ estas la plej granda administra centro de Litovio.

Vilnius estis proklamita la ĉefurbo de Eŭropa kulturo de 2009.

La hotelo



La gastoj de Tutmonda Kongreso de Esperantistoj - Ĵurnalistoj loĝos en unu el la plej grandaj en Litovio hoteloj de ekonomia klaso *Ecotel Vilnius*, kiu situas sur Slucko-str. 8 kaj kiun ni notis per flagego. La hotelo estas moderna kvaretaĝa konstruaĵo kun 168 moderne ekipitaj ĉambroj. Akceptejo laboras

tagnokte.

La hotelo situas en centro de la urbo, sur dekstra bordo de la rivero Neris, proksime de historia urbocentro de Vilnius. Nur dek minutoj perpiede kaj vi povas atingi Katedralan placon kaj aliajn objektojn de kultura kaj historia heredaĵo.

Se vi ne ŝatas promenadi, vi povas atingi la hotelon per trolebusoj Nr. 8, 9, 12, 13, 19 veturante ĝis haltejo *Lvovo*. Se vi veturas al la direkto de urbocentro, tiam vi enbusiĝu en la haltejo *Žalgirio stadionas*. Katedralan placon vi povas rekte atingi per la buso Nr. 33. tiam vi enbusiĝu en la haltejo *Rinktinės*. Atentu: tiu buso veturas kun grandaj tempointervaloj.

El la flughaveno la hotelo estas atingebla per buso Nr. 2 (veturi ĝis la haltejo *Žalasis tiltas*) kaj daŭrigi perpiede (ĉirkaŭ 400 metroj) aŭ unu haltejon veturi per trolebusoj Nr. 12, 13 aŭ buso Nr. 44. El la fervoja kaj la busa stacidomoj veturu per trolebuso Nr. 5 aŭ busoj Nr. 26, 43, 53 ĝis la haltejo *Žalasis tiltas* kaj daŭrigu perpiede (ĉirkaŭ 400 metroj) aŭ unu haltejon veturu per trolebusoj Nr. 12, 13 aŭ buso Nr. 44.

La kongresejoj



Duetaĝa konstruaĵo en stilo de matura klasikismo, situanta en mezo de Urbodoma-placo (Didžioji-str. 31) estas iama **urbodomo**. Ĝi estis fondita laŭ privilegio de la reĝo Jogaila en fino de la 14a jarcento. La urbodomo estis ĉefa instanco de urba magistrato. En fino de la 16a jarcento-komence de la 17a al urbodoma ensemblo apartenis ejoj de gardistaro kaj de voktoj, prizono, lueblaj vendejetoj, apude staris hontkolono kaj pendumilo. En mezo de la 18a jarcento, post la incendio, la konstruaĵo estis rekonstruita; krome, estis rekonstruita okangula turo kun horloĝo, sonoriloj kaj kavalirforma ventomontrilo. Post nelonge la turo kliniĝis kaj falis. En 1785-1799 la urbodomo estis rekonstruita en strikte klasikisma stilo laŭ la projekto de Laurynas Stuoka-Gucevičius. En la nova konstruaĵo estis gardataj armiloj, etalonoj de mezuroj, troviĝis ejoj por gardistaro, prizono, naŭ vendejoj, ankaŭ salonoj de vokto, negocista komunumo, trezorejoj de urbo kaj negocista komunumo.

La granda salono distingiĝis per bona akustiko. Dum la tempo de cara okupacio en tiu ĉi salono okazadis koncertoj kaj spektakloj. En 1810 tuta konstruaĵo estis adaptita por bezonoj de teatro — komence la pola, poste la rusa. En 1854 okazis unua spektaklo de la opero *Halka* de Stanislovas Moniuška; la komponisto mem gvidis orkestron. Dum 1936-1940 la konstruaĵo estis renovigita, en 1941 en ĝi instaligis Muzeo de la Arto. Nun ĉi tie funkcias Domo de Litoviaj Artistoj, okazas reprezentaj aranĝoj.

La plej bela parto de la urbodomo estas grandioza, simpla portiko. Interne konserviĝis pluraj salonoj, ankaŭ keloj gotikaj kaj de pli malfruaj epokoj.

De la hotelo *Ecotel* urbodomo plej facile atingeblas perpiede. Vi bezonos nur ĉirkaŭ 15-20 minutojn.

En iama urbodomo la Kongreso laboros 27an-28an de majo.



Sur la Nepriklausomybės (Sendependeca) placo, Gedimino-av. 53, situas Sejma (Parlamentata) palaco. La Sejma palaco, kiun formas tri konstruaĵoj, estis konstruita en la 1970aj jaroj. La konstruo de la Unua palaco ekis en aprilo de 1976. La ideo de arkitektoj Algimantas kaj Vytautas Nasvytis plene korespondis tiutempajn bezonojn: nova konstruaĵo devis servi por la Suprema Soveto de Litovia SSR.

Tiam parlamento estis nur siaspeca “ornamaĵo” de soveta sistemo, ĉar ĝi strikte dependis de la juraj aktoj de Komunista partio kaj de Suprema Soveto de USSR. Elektitaj laŭ sekso, nacieco, klereco, profesioj, aniĝo en komunista aŭ komsomola organizaĵoj, ununura sindikato tielnomitaj deputitoj kelkfoje en la jaro kunveturis en Vilnius kaj voĉdonis por jam liveritaj projektoj.

La ĉefa konstruaĵo estis finkonstruita en 1980. Apudaj konstruaĵoj servis por aliaj celoj. En la konstruaĵo de la rivera flanko instaligis Ministerio pri financoj (nun la Dua palaco de la Sejmo), en la alia, apud la Nacia biblioteko, — jam menciita ununura Soveto de sindikata centro (nun la Tria palaco). Post la ŝtata sendependiĝo menciitaj konstruaĵoj ekservis por bezonoj de la parlamento kaj ĉiuj tri estis kunigitaj.

En la Unua palaco lokiĝas kabinetoj de parlamentanoj. Antaŭ la rekonstruo de la Dua palaco ĉi tie estis la ĉefa kunsida salono, en kiu la 11an de marto 1990 estis rekrea ŝtata sendependeco. Nun en la salono de la 11a de Marto parlamentanoj kunvenas por solenaĵoj dediĉitaj por la plej gravaj historiaj eventoj de la ŝtato. Ĉi tie ankaŭ lokiĝas salonoj: Baltoji (Blanka; 2a etaĝo), Lietuvos Tarybos (Litovia Konsilio; 2a etaĝo), **Konstitucijos (Konstitucia; 3a etaĝo)**. En la lasta post deklaro de la ŝtata sendependeco kutime okazadis gazetaraj konferencoj.

En la Dua palaco post la rekonstruo, kiu finiĝis en 2007, estis instaligita nova kunsida salono, 1287,8 kv.m. granda. Ĉi tie ankaŭ funkcias Sejma kancelario, salono de gazetaraj konferencoj, Ĵurnalista salono, kafejo.

En 1990-1991 la palaco trafis en historion de Litovio kaj de la mondo. La 11an de marto 1990 en ĝi estis proklamita akto ”Pri rekreo de sendependa ŝtato de Litovio”, kiu komencis disfalon de Soveta Unio. La 13an

de januaro 1991 litovajn parlamentanojn intencis ataki soveta armeo, tamen ne kuraĝis pro decidema kontraŭstaro de la homoj defendintaj la palacon kaj de parlamentanoj mem. Pri tiu tago atestas ĉe okcidenta flanko de la parlamentejo aranĝita memorejo de la 13a de januaro kun gardataj restaĵoj de barikadoj kaj monumentaj signoj.

De la hotelo *Ecotel* la Sejman palacon eblas atingi aŭ per piede (ĉirkaŭ 20-25 minutoj) aŭ de la haltejo *Žalgirio stadionas* veturante per la trolebuso Nr. 13 ĝis la haltejo *Lukiškės*. Atentu: la trolebuso veturas nur ĉiujn 25-30 minutojn (veturo daŭras ĉirkaŭ 10 minutojn).

En la Sejma palaco la Kongreso laboros 29an-30an de majo.

Laŭtaga programo

La 25-an de majo (dimanĉo)

10.00 – 22.00 Veni al Vilnius, loĝigo, registrado

La 26-an de majo (lundo)

10.00 – 17.00 Tuttaga ekskurso tra Vilnius kaj Trakai

17.00 – 22.00 Libera vespero

La 27-an de majo (mardo)

9.00 – 10.00 Registrado, de kongresanoj en Urbodomo, informoj

10.00 – 10.45 Solena Inaŭguro de la Kongreso

10.45 – 11.00 Kafpaŭzo

11.00 – 11.45 Prelego de prof. Humphrey TONKIN pri la ĉeftemo de la kongreso *Internacia interkultura komunikado: ĵurnalismo kaj Esperanto*

11.50 – 12.20 Prelego de Audrys ANTANAITIS *Amaskomunikado en Litovio*

12.25 – 12.55 Prelego de Aleksander KORJĜENKOV *Zamenhof kaj la gazetaro*

13.00 – 14.30 Tagmanĝo

14.40 – 15.10 Prelego de Stano MARČEK *100 jaroj de la revuo **Esperanto***

15.15 – 15.45 Prelego de Petras ČELIAUSKAS *Kontribuo de **Litova stelo** al formigo de bildo pri la lando*

15.45 – 16.00 Kafpaŭzo

16.00 – 16.30 Prelego de Tomasz CHMIELIK *Edmond Privat (1889-1962) – la patro de la moderna Esperanto-ĵurnalismo*

16.35 – 17.05 Prelego de Detlev BLANKE *Informado en lingvistikaj medioj*

17.10 – 17.40 Prelego de Renato CORSETTI *Inter la reto kaj la papero – situacio de la naciaj E-inform-kanaloj*

17.45 – 18.15 Prelego de Peng ZHENGMING *Konciza historio de ĉinaj Esperanto-gazetoj*

19.00 – 21.00 Akcepto de la urbestro de Vilnius

La 28-an de majo (merkredo)

9.00 – 10.00 Kunveno pri la Kongresa ĉeftemo (en ĉefsalono de la Urbodomo)

10.00 – 11.00 Kunveno de TEĴA (en ĉefsalono de la Urbodomo)

11.00 – 11.15 Kafpaŭzo

Sekcio Nr.1 (en ĉefsalono de la Urbodomo)

11.15 – 11.45 Prelego de Andreas KUNZLI *Tradicia percepto de la planlingva demando far la svisa gazetaro*

11.50 – 12.20 Prelego de Jiri CALETKA *Japana ĵurnalisto pri ĉeĥa kulturo per Esperanto*

12.25 – 12.55 Prelego de Laszlo SZÖKE *Diversnivela komunikado kun nacilingva presaro pri Esperanto*

13.00 – 14.30 Tagmanĝo

14.40 – 15.10 Prelego de Dimitrije JANIČIĆ *Eblecoj kaj formoj de kunlaboro de malgrandaj E-gazetoj*

15.15 – 15.45 Prelego de Josip PLEADIN *E-ĵurnalismo kaj gazeteldonado en novaj teknologiaj kondiĉoj*

15.45 – 16.00 Kafpaŭzo

16.00 – 16.30 Prelego de Tomasz CHMIELIK *Ryszard Kapuscinski (1932 – 2007) – la majstra ĵurnalisto kaj raportisto pri la mondo pereanta*

16.35 – 17.05 Prelego de Ahmad Reza MAMDUHI *Kiel Esperanto ĵurnal-istigis min?*

17.10 – 17.40 Prelego de Anatolo GONĈAROV *Laĉhefa moto de la in-formado: kion E-o jam valoras beletra esprimivo-riĉo), sed ne kiom ĝi povas valori estonte*

17.45 – 18.15 Prelego de Giorgio SILFER *Kiel funkcias la cenzuro en la Esperanto-gazetaro*

19.00 – 21.00 Akcepto de la ĉefministro de Litovio

Sekcio Nr.2 (en la dekstra salono de la Urbodomo)

11.15 – 11.45 Prelego de Stefan MACGILL *Kiel adapti fizike presitan re-vuon al ret-konekta mondo*

11.50 – 12.20 Prelego de Jevgenij GAUS kaj Peter BALAŽ *Uzado de modernaj teknikoj en informado*

12.25 – 12.55 Prelego de Kazimierz LEJA *Perkomputila teksto-prilaboro por ĵurnalistoj kaj redaktoroj. Komputilo ne estas antikva skribmaŝino*

13.00 – 14.30 Tagmanĝo

14.40 – 15.10 Prelego de Vlado JURKOVIC *Dek kvin jaroj forpasis de kiam silentas E-programoj de Kroata Radio*

15.15 – 15.45 Prelego de Jianhua Li *Novaj interretaj teknologioj kaj E-movado*

15.45 – 16.00 Kafpaŭzo

16.00 – 16.30 Prelego de Slavik IVANOV *Mia sperto de interreta ĵurnal-ismo*

16.35 – 17.05 Prelego de Alfred SCHUBERT *La situacio de Esperanto-gazetoj en Germanio*

17.10 – 17.40 Prelego de Yves NEVELSTEEN *Komputeko*

17.45 – 18.15 Prelego de Gabriela KOSIARSKA kaj Maciej JASKOT *Specifeco de la interretaj elsendoj en la Internacia lingvo – novaj defioj por la radiofonio kaj novaj eblecoj por la movado?*

19.00 – 21.00 Akcepto de la ĉefministro de Litovio

Sekcio Nr.3 (en la maldekstra salono de la Urbodomo)

- 11.15 – 11.45** Prelego de Petro CHRDLÉ *Aŭtoraj rajtoj en EU*
- 11.50 – 12.20** Prelego de Zlatoje MARTINOV *Interligo de naciaj literaturoj kaj Esperanto kiel literatura medio*
- 12.25 – 12.55** Prelego de Dieter ROOKE *Porlaborista E-gazetaro*
- 13.00 – 14.30** Tagmanĝo
- 14.40 – 15.10** Prelego de Frimpong Ampomah BADU *Esperanto kaj kulturoj en Afriko*
- 15.15 – 15.45** Prelego de Ljubomir TRIFONCHOVSKI *Kultura politiko de kulturaj periodaĵoj (laŭ la sperto de revuo **Literatura foiro**)*
- 15.45 – 16.00** Kafpaŭzo
- 16.00 – 16.30** Prelego de Andreas KUNZLI *Senpagaj novaĵ-gazetoj por labor-pendolantoj – revolucio en Eŭropo kaj en la svisa amaskomunikilaro*
- 16.35 – 17.05** Prelego de Stefan MACGILL *Malfacilaĵoj kaj ebloj por enmerkatiĝi por-junularan kaj por-komencantan revuon kaj teni ĝin aktuala kaj alloga por nuntempaj junuloj*
- 17.10 – 17.40** Prelego de Jevgenij GAUS kaj Peter BALAŽ *Nova retprojekto Esperanto-Aktuale*
- 17.45 – 18.15** Prelego de Abdurahman JUNUSOV *Kunlaboro kun la amaskomunikiloj – strategio, rimedoj*
- 19.00 – 21.00** Akcepto de la ĉefministro de Litovio

La 29-an de majo (ĵaŭdo)

- 9.00 – 9.30** Prelego de Jukka PIETILAINEN *Nuntempaj defioj al internacia ĵurnalismo*
- 9.35 – 10.05** Prelego de Istvan ERTL *Interreto: La defioj de tuj-ĵurnalismo*
- 10.10 – 10.40** Prelego de Kalle KNIIVILA *Konformismo en la Esperanta gazetaro*
- 10.40 – 11.00** Kafpaŭzo
- 11.00 – 11.30** Prelego de Roman DOBRZYNSKI *Esperanto – mia profesia pontolingvo*
- 11.35 – 12.05** Prelego de Aleksandro MELNIKOV *Reflektiĝo de la specifa E-kulturo en publicistiko*

- 12.10 – 12.40** Prelego de Barbara PIETRZAK *Esperantlingva radiofonio en interkultura komunikado – sojle de la 50-jariĝo de E-elsendoj de Pola Radio*
- 12.45 – 13.15** Prelego de Yu JIANCHAO *Ĉina Radio Internacia, multimedia amaskomunikilo en la 21-a jarcento*
- 13.30 – 15.00** Tagmanĝo
- 15.00 – 15.30** Prelego de Claude NOURMONT *Kiel koncepti la magazinon?*
- 15.35 – 16.05** Prelego de Arpad MATHE *Bibliografio de periodaĵoj en aŭ pri Esperanto*
- 16.10 – 16.40** Prelego de Gian Carlo FIGHIERA *Konsideroj pri la Kongresa Gazetara SERVO*
- 16.45 – 17.15** Prelego de Frimpong Ampomah BADU *Rolo de Esperanto en la nuntempa mondo*
- 18.00 – 20.00** Akcepto de la prezidanto de la parlamento.

La 30-an de majo (vendredo)

- 9.00 – 9.30** Prelego de Dr. Sean O RIAIN *Esperanto: Malamiko aŭ amiko de plurlingveco*
- 9.35 – 10.05** Prelego de Jukka PIETILAINEN *Memreguligo kaj etiko en ĵurnalismo*
- 10.10 – 10.40** Prelego de Perla MARTINELLI *Virinaj voĉoj en la Esperanta gazetaro*
- 10.40 – 11.00** Kafpaŭzo
- 11.00 – 11.30** Prelego de Alfred SCHUBERT *La estonteco de esperantlingvaj gazetoj*
- 11.35 – 12.05** Prelego de Vilhelmo LUTERMANO *La kontribuo de la DIPLO al la Esperanta ĵurnalismo*
- 12.10 – 12.40** Prelego de Aneto MUHLEMANN *Ĵurnalismo en kaj ekster Esperantujo: paraleloj kaj kontrastoj*
- 12.45 – 13.15** Prelego de Giorgio BRONZETTI *Informado pere de Disvastigo*
- 13.30 – 15.00** Tagmanĝo
- 15.00 – 15.30** Konkluda kunveno pri la Kongresa ĉeftemo
- 15.30 – 16.00** Konkluda kunveno de TEĴA
- 16.00 – 16.30** Solena fermo de la Kongreso

Ekskursa Tago

Programo: Vilnius kaj Trakai

10 h — komenco de la ekskurso ĉe la hotelo *Ecotel Vilnius*. Unue vizito de la antikva urboparto de Vilnius.

Baroka preĝejo de St. Petro kaj Paŭlo, Katedrala placo, Arkikatedralo Baziliko kun mirinde ornamita kapelo de St.Kazimiro. Poste perpiede oni atingos Simonas Daukantas-placon, sur kiu staras empirstila Prezidentejo. Antikva Universitato de Vilnius, baroka preĝejo de St.Johano. Tra malvastaj antikvaj stratetoj la vojo daŭrigas al gotika anguleto — preĝejoj de St.Anna kaj Bernardanoj. Survoje — vizito al muzeo de sukceso kaj galerio kun ebleco... gustumi sukcebran brandon. De la preĝejo de St.Anna buse oni direktiĝos al unu el la urbaj simboloj — Aŭrora pordego, kiu simbolas interkruciĝon de tri konfesioj (katolikoj, ortodoksoj, uniitoj). Se tempo permesos, vizito al barokstila ortodoksa preĝejo de St.Spirito.

13 h — forveturo al malnova ĉefurbo de Litovio — Trakai (29 km).

13.30 h — tagmanĝo en rondtabla klubo, de kiu malfermiĝas belega panoramo de gotika insula kastelo.



14.30 h — dua parto de la ekskurso. Vizito al kastelo de Trakai (eventuale memstara promeno tra la urbeto). Diversaj eksponaĵoj prezentas historion de la lando, rakontas pri la plej gravaj eventoj. Trakai estas la loko, al kiu antaŭ multaj jaroj venis nacia minoritato karaitoj, kies domoj ĝis nun abundas en la urbeto, ankaŭ estas unu sanktejo — keneso, restoracio de karaita kuirejo.

16.30 h — forveturo al Vilnius.

17.00 h — veno ĉe la hotelo *Ecotel Vilnius*.

Rimarko: foje ĉe la vizitindaj lokoj aŭ survoje okazas trafikaj ĝenoj, tial reveno povas iom prokrastiĝi.

La Fera Lupo



Multaj el vi memoras la de mi redaktitan gazeton *Vilna Sonorilo* de la Universala Kongreso en 2005. Mi ĝojas redakti unu plian kongresan gazeton. La ĉiutaga gazeto de nia kongreso estas titolita per *La Fera Lupo*.

Dum la kongresa ekskurso en la 26a de majo vi certe ekscios, kiel rilatas la lupo al la kongresa urbo Vilnius.

La gazeto celas informi vin pri gravaj eroj de la kongreso, necesaj detaloj, neeviteblaj ŝanĝoj en la programo, okazintaĵoj kaj aliaj ĝisdatigoj al la kongreslibro. Plejparto de vi estas ĵurnalistoj, kaj do mi esperas vian aktivan kunlaboron.

Prelegintoj, aŭskultintoj aŭ gvidintoj, raportu pri viaj kunsidoj, impresoj kaj similaj.

Viajn kontribuojn (tekstojn kaj fotojn) sendu al la du retadresoj: ds@esperanto.lt kaj chtaesok@hanmail.net aŭ transdonu al iuj de la organiza komitato.

Pro via kunlaboro antaŭdankas la redaktoro **CHOE Taesok**.

Kongresa Temo

Internacia interkultura komunikado: ĵurnalismo kaj Esperanto

La parolantoj kaj uzantoj de Esperanto konsistigas komunumon, kiu funkcias sendepende de naciaj limoj. Oni povus nomi ĝin komunumo internacia; sed iasence ĝi tute ne rilatas al nacioj, ĉar ĝi estas en plena senco tutmonda. Kiel lingvo kreita por interlingva komunikado, Esperanto ignoras naciecojn. Tiu kulturo inter la kulturoj, tiu lingvo inter la lingvoj, formas tutmondan komunikreton, en kiu informoj, ideoj kaj kulturaj formulaĵoj interŝanĝiĝas. Ĉar la uzantoj de Esperanto ankaŭ parolas aliajn lingvojn kaj partoprenas aliajn kulturojn, tiuj informoj ankaŭ interpenetriĝas kun aliaj lingvoj kaj kulturoj. En profesia medio, nome la ĵurnalismo, kiu celas trovi veron, kaj kiu batalas, aŭ devus batali, kontraŭ antaŭjuĝoj, la apenaŭ rimarkata sed vigla ligo de esperantistaj ĵurnalistoj estas aparte valora. Farante bone sian laboron, la esperantistaj ĵurnalistoj helpas nin defii la kulturajn antaŭjuĝojn per tutmondeca kaj egaleca aliro al la homa problemaro. Ili riĉigas sian profesion kaj daŭre plibonigas la konon de la mondo ĉe tiuj, kiuj staras ekster la Esperanto-movado, ofte enfermitaj en la propraj malvastaj mondkonceptoj. Mi ne dubas, ke la profesiaj ĵurnalistoj inter ni havas amason da ekzemplaj rakontoj pri tiu nereakta plibonigo kaj pliriĉigo de la scio de la publiko per Esperanto. Ĝi estas aparte efika en malgrandaj kulturoj kaj malgrandaj lingvoj, kie la aliro al la mondo estas despli malfacila. Esperanto ja estas granda egaliganto – inter fortaj kaj malfortaj popoloj, inter riĉaj kaj malriĉaj, inter tiuj kiuj regas kaj tiuj kiuj estas regataj.

Sekve ne estas surprize, ke ĝuste Litovio, lando kiu renovigas sin kaj retrovas sian internacian kaj tutmondan profilon, estu nia gastiganto por la nuna konferenco. Kaj ne estas surprize, ke tio okazas en jaro, kiun UN kaj Unesko deklaris Jaro de la Lingvoj.

Ene de la Esperanto-movado, la Esperantistaj ĵurnalistoj ludas ŝlosilan rolon. Esperanto, pli-malpli unike inter la lingvoj de la mondo, komenciĝis

kiel skriba lingvo: unue Zamenhof, kreinto de la lingvo, skribis; nur poste li parolis. Kvankam Esperanto rapide akiris ankaŭ sian riĉan parolan medion, la eksterordinara graveco de skribaj tekstoj en Esperanto estas evidenta al ĉiu uzanto de la lingvo. En la fruaj jaroj, Esperanto cirkulis skribe; ĝiaj normoj ekestis skribe; ĝiaj vortprovizo kaj fleksebleco evoluis ĉefe pere de skribaj tekstoj, kiuj ofte, ekzemple per la literaturo, enpenetris terenojn, kien la parola lingvo ankoraŭ ne penetris. La skriba lingvo restas la ĉefa stabiliga faktoro de la tutmonde disvastigita sed samtempe maldense distribuita lingvo Esperanto.

Al ĉiu lingvo necesas kultivado, sed por relative malgranda lingvo kiel la nia la aktiva kultivado estas esenca. Niaj periodaĵoj kaj libroj, kaj ĉiam pli kaj pli niaj retaj rimedoj, helpas fiksi kaj plivastigi la lingvon – kaj sekve fiksi kaj plivastigi la lingvoscion de ĉiu unuopa esperantisto. Vole-nevole, la verkistoj kaj ĵurnalistoj estas ne nur uzantoj de la lingvo, sed ĝiaj inventantoj, ĝiaj kultivantoj. Indas, ke ili agnosku klare tiun rolon, helpante krei kulturon, en kiu Esperantaj verkoj estas legataj, studataj kaj priparolataj, kaj ĉiu esperantisto estas instigata pliperfektigi sian lingvoscion.

La historio montras, ke la tradicia gazetaro havis kaj havas profundan efikon je la kulturo kaj lingvo Esperanto, ekde la unuaj periodaĵoj de la 1890aj jaroj. Pensante pri la posta periodo de la evoluo de Esperanto, la intermilitaj jaroj, oni tuj rimarkas la fondiĝon de revuoj kiel *Sennaciulo*, *Heroldo de Esperanto* kaj *Literatura Mondo*, kiuj estis tiel influaj je la evoluo de la lingvo kaj movado. Post la milito venis novaj – *Norda Prismo*, *Nica Literatura Revuo*, kaj la grandaj “naciaj” revuoj subtenataj de siaj respektivaj registaroj – *Nuntempa Bulgario*, *Hungara Vivo*, *El Popola Ĉinio*. Ili ankaŭ havis sian efikon je la faka utiligo de Esperanto.

La malapero de Esperanto for de la tagordo de la registara propagando kaj la reveno de la libera merkato prezentis antaŭ dudeko da jaroj novan defion al la Esperanto-movado. Ĝi respondis al tiu defio nur parte. Sed la centreco de la Esperanto-gazetaro estas hodiaŭ ĉefe minacata – kiel ĝi estas minacata en ĉiuj aliaj lingvoj – de la antaŭeniĝo de la teknologio. La pejzaĝo de la hodiaŭaj Esperanto-periodaĵoj estis grandparte fiksita en la 1960aj/1970aj jaroj, per ekapero de *Literatura Foiro*, *Monato*, *Fonto*, *Kontakto* kaj aliaj fidelaj kontribuantoj al la Esperanto-movado kaj ĝia kulturo. Sed ili laboris kaj laboras kun malmultaj abonantoj, malforta sur-

merkatiga reto, manko de reklamoj kaj anoncoj, kaj minimuma kunlaboro. Kelkaj gazetoj jam malaperis – *Fonto* ekzemple, kaj *El Popola Ĉinio*, kiu migris en relativan obskurecon ĉe la reto. Se entute la tradicia gazetaro kapablas resti viva, ĝi tion faros nur per multe pli konscia klopodo kunlabori inter si (kaj eble kun aliaj medioj), por vendi siajn varojn kaj teni ilin altkvalitaj.

Validas samaj konstatoj ĉe la libromerkato: sen libra kulturo inter esperantistoj (kaj periodaĵoj estas la ĉefa ilo por krei tiun kulturon, en kiu libroj estas aĉetataj, legataj kaj prikomentataj) la libromerkato ne povas elteni. Nur pene la Esperanto-libromerkato envenas la 21-an jarcenton.

Sed la ĵurnalismo ne estas nur skriba: ankaŭ la parolata lingvo ludas signifan rolon. Dum jaroj ĝi estis nutrata, aldone al la fizikaj renkontiĝoj inter esperantistoj, ĉefe de la ŝtate subtenataj radiostacioj – Romo, Zagrebo, Varsovio, Budapeŝto, Pekino, Havano, Vieno, Vatikano. Kelkaj stacioj ankoraŭ restas; aliaj ĉesis funkcii; aliaj trovis novajn vestojn ĉe la reto. La ĵurnalistoj do rolis grave en la evoluigo ankaŭ de la parolata lingvo, ĉefe en la kvin jardekoj tuj post la Dua Mondmilito, sed nun iom malpli. Necesas, do, ankaŭ konsideri la parolatan lingvon, kaj denove la neceson teni la kvaliton alta kaj plibonigi ĝin.

Mi ne dirus, ke hodiaŭ la esperantista ĵurnalismo troviĝas en krizo. Estus pli juste paroli pri turnopunkto en la evoluo de tiu ĵurnalismo – do, ne krizo, sed unika okazo por prosperi, se ni kapablas kapti la momenton. La alveno de la reto donis novan impulson al Esperanto ĉar ĝi ligas alie izolitajn homojn, kvazaŭ nuligas distancojn, kaj ebligas buntan Esperanto-vivon sen la neceso fizike renkontiĝi. Dank’ al la reto, Esperanto kaptis novajn lernantojn, ĉefe junajn; ĝi plivastigis sian utiligeblon; ĝi pliaktivigis homojn antaŭe nur pasivajn. Ĉu la ĵurnalismo esperantista kapablas adaptiĝi al tiu nova medio? Se ni ne eltrovos novajn vojojn por cirkuligi niajn varojn, la tempoj preteriros nin kaj lasos nin ŝimi.

Pro tio, la nuna konferenco venas en kritika kaj salutinda momento.

Kaj kion fari en tiu ĉi konferenco, kiujn demandojn fronti? Jen sep demandoj por komenci la diskuton.

Humphrey Tonkin
Reĝisoro de la Kongresa Temo



Humphrey Tonkin (1939). Universitata Profesoro pri Humanistiko kaj Emerita Prezidanto de la Universitato de Hartford, Usono. Li venis al la universitato kiel prezidanto en 1989 kaj retiriĝis el tiu posteno jardekon poste, por dediĉi sin al esplorado kaj instruado. Dum 1998-99 li estis gastesploristo ĉe la Universitato Yale. Antaŭ la transiro al Hartford, li estis prezidanto de la Kolegio Potsdam de la Ŝtata Universitato de Novjorkio (1983). Antaŭ tio li estis docento kaj poste profesoro pri angla literaturo ĉe la Universitato de Pensilvanio, kie li ankaŭ je diversaj stadioj rolis kiel asista vicprezidanto pri subdiplomaj studoj (kun respondeco pri ĝisfunda revizio de la stud-programoj de la universitato), estro de la Kolegio Stouffer ĉe la universitato, kunordiganto de internaciaj programoj, kaj direktoro de unuajaraj studoj en la angla. Li ricevis la Premion Lindback pro elstara lekciado en 1970 kaj la stipendion Guggenheim en 1974, pro kiu li pasigis jaron kiel gastesploristo ĉe la Oksforda Universitato. Li estis gastprofesoro pri angla kaj kompara literaturo ĉe la Universitato Columbia, Novjorko en 1980-81.

En la E-movado, li estis dum dek jaroj estrarano de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) kaj ĝia prezidanto de 1969 ĝis 1971. Li organizis la Internacian Junularan Kongreson en Britio en 1961. De 1974 ĝis 1980 kaj de 1986 ĝis 1989 li estis prezidanto de Universala Esperanto-Asocio. De 1980 ĝis 1986 kaj denove de 2001 ĝis 2004 li estis vicprezidanto. Dum sia prezidanteo li gvidis la procedon, per kiu UEA akceptis novan statuton, li intensigis la kontaktojn kun UN kaj Unesko (kio rezultigis plialtigon de la nivelo de konsultaj rilatoj kaj rezolucion de Unesko apogan al la laboro de UEA), kaj li repacigis kaj restabiligis la Asocion post malfacila organiza kaj financa periodo. Li estas ankaŭ membro de la Akademio de Esperanto kaj profesoro de la Akademio Internacia de la Sciencoj Sanmarino.

Li prelegis en multaj landoj pri literaturo, internaciaj studoj, Esperanto kaj aliaj temoj.

Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio

Historia skizo

Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, mallonge TEĴA, estas faka asocio de UEA.

La asocio estis fondita la 19-an de novembro 1946 de nordiaj ĵurnalistoj, la svedo Einar Adamson, la finno Niilo Kavenius kaj la dano R.G. Nielsen. La sidejo fariĝis Svedio kaj ankaŭ la unua estraro estis skandinava.

Laŭ la tiama deklaro, la celo de la asocio estis servi al ĵurnalistoj profesiaj kaj amatoraj. Ĝi volis kunigi ĉiujn ĵurnalistojn, kiuj scipovas Esperanton, por komuna kunlaboro kaj kunhelpo rilate al korespondado, interŝanĝo de artikoloj, enketoj kaj informoj pri diversaj demandoj. Per uzado de Esperanto inter ĵurnalistoj ĝi volis pruvi, ke la lingvo devas servi al praktikaj celoj. En ĝi laŭ la regularo rajtis membri ĉiuj ĵurnalistoj, korespondantoj, publicistoj esperantistoj, sendepende de siaj nacieco, raso, politikaj kaj religiaj konvinkoj kaj tendencoj. La TEĴA-anoj volis zorgi pri la disvastigo de Esperanto tra la mondo pere de gazetoj, revuoj, ktp. kaj tra la ĵurnalistoj mem. Krome oni volis okazigi komunan kunlaboron en la medio de ĵurnalistoj per interŝanĝa servo, kiu pruvu al la publiko la utilon de Esperanto kiel internacia laborlingvo.

Kiam en 1953 mortis Einar Adamson, la vera motoro de la organizo, TEĴA spertis periodon de stagnado. En 1956 ĝi reorganizis kaj la iniciaton transprenis bulgara sekcio. Poste dum jardekoj la asocio estis grandparte sub la gvidado de bulgaraj esperantistoj. Multjara prezidanto estis la norvego Olav Thormodsen, vicprezidanto estis Ivan Keremidĉiev-Esperov. Ĉirkaŭ 1970 la asocio havis pli ol 300 membrojn. La membraro konsistis el du kategorioj: A-membroj, t.e. profesiaj ĵurnalistoj, kaj B-membroj, t.e. laŭokazaj kunlaborantoj de gazetaro kaj radio kaj redaktoroj de Esperantaj gazetoj. La politikaj ŝanĝoj en la orienteŭropaj landoj ŝanĝis ankaŭ la cirkonstancojn por TEĴA, kaj en 1988 ĉesis aperi ĝia fakorgano *Internacia Ĵurnalisto*.

En 1992 sub prezido de Stefan Maul la asocio estis refondita kaj aktivis dum pluraj jaroj; reaperis *Internacia Ĵurnalisto*, koresponda trejnkurso por ĵurnalistoj sub gvido de Paul Gubbins estis bone akceptita. En 1993 TEĴA havis 154 membrojn, kaj eĉ fondis Premion Privat por *agnoski meritojn pri ob-*

jektiva, sendependa kaj honesta ĵurnala agado. (Ĝin samjare ricevis la Sarajeva ĵurnalisto Zlatko Dizdarevic.) Sed baldaŭ TEĴA stagnis, eĉ regresis, la fakrevuo ne plu povis aperi pro manko de mono; el 130 membroj fine restis nur kvardeko, tiel ke la estraro proponis malfondon de *evidente superflua asocio*.

La asocio ĉesis ekzisti la 31-an de decembro 2003. Tamen poste Yamasaki Seikō el Japanio iniciatis alvokon por restarigo de la asocio. Al lia iniciato tuj aliĝis István Ertl (eksredaktoro de la revuo Esperanto) kaj Jukka Pietiläinen (esploristo pri ĵurnalismo). Subskribis la alvokon ankaŭ la redaktoro de Libera Folio, Kalle Kniivilä.

En la Vilna UK en julio 2005 la asocio estis formale reaktivigita. La kunvenon de TEĴA partoprenis ĉ. 30 Esperanto-ĵurnalistoj. El ili ĉirkaŭ triono iam estis membroj de TEĴA. UEA neniam agnoskis la malfondon, kaj la asocio daŭre havas kunlaborajn rilatojn kun UEA. Yamasaki Seikō, István Ertl kaj Jukka Pietiläinen estis elektitaj kunordigantoj ĝis la UK en Florenco. En Florenco okazis nova kunsido, en kiu estis elektita provizora estraro: István Ertl, Kalle Kniivilä, Stano Marček, Jukka Pietiläinen kaj Dieter Rooke.

El *Vikipedio*



István Ertl



Jukka Pietiläinen

Estraro de TEĴA



Stano Marček



Kalle Kniivilä



Dieter Rooke

Kio estas, kion celas TEĴA?

TEĴA estas fakasocio de ĵurnalistoj uzantaj la lingvon internacian Esperanto, profesiaj kaj amatoraj; ĝi estas fakasocio kunlaboranta kun Universala Esperanto-Asocio (UEA). TEĴA volas servi kaj al siaj membroj kaj al la Esperanto-movado, kiu sendube sen helpo de ĵurnalistoj ne povus ekzisti, ĉar ili grandparte certigas la interkomunikadon interne de l' Esperanto-movado.

Por realigi tion TEĴA

* Eldonas sian fakorganon *Internacia Ĵurnalista*, kiu aperas kvar foje en jaro. En ĝi oni traktas ĉiuspecajn temojn de ĵurnalisa laboro kaj donas praktikajn konsilojn.

* Eldonas alian materialon, kiu utilas al la membroj, ekz. jarlibreton kun adresoj por kontaktoj inter TEĴA-anoj, konsilaron pri gazetara servo dum kongresoj, kompendieton pri Esperanto por ĵurnalistoj k.s.

* Okazigas ĉiujare membrokunvenon pri specifaj temoj, kutime dum la Universalaj Kongresoj de UEA, kun kies Informa Fako ĝi kunlaboras ankaŭ por organizi gazetan servon de UK kaj aperigi kongresan kurieron.

* Funkciigas perkorespondan kurson pri ĵurnalismo kaj okazigas — kunlabore kun aliaj E-organizaĵoj — seminariojn kaj staĝojn por trejni ĵurnalistojn, precipe amatorajn. Ekzistas ankaŭ *Manlibro pri ĵurnalismo* verkita de l' prezidanto de TEĴA.

* Distingas per sia **Premio Privat** meritoplenajn ĵurnalistojn.

* Tenas kontaktojn al neesperantistaj ĵurnalistaj asocioj cele al kunlaboro kaj disvastigo de Esperanto en ĵurnalisa medio.

Statuto

de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA)

Preamblo

Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA), fondita en 1948 en Malmö, Svedio, estas demokrata, faka, neŭtrala kaj krea organizaĵo, kunlaboranta kun Universala Esperanto-Asocio (UEA). TEĴA klopodas altigi precipe la

profesian kaj la etikan nivelojn de ĵurnalismo tutmonde, aparte en evolulandoj, cele al paca, demokrata, justa kaj biosferokonforma kunvivado de l'homaro laŭ la principoj de la Universala Deklaracio de l'Homaj Rajtoj kaj de la medikoncernaj partoj de la internaciaj konvencioj kaj traktatoj. Specifa celo konforme al la Esperanto-movado estas progresigi la interkompreniĝon de la popoloj.

1. Celoj kaj Taskoj

1.1. TEĴA reprezentas la interesojn de ĵurnalistoj-esperantistoj antaŭ ŝtataj, sociaj kaj kulturaj organoj kaj institucioj, kontribuas al plibonigo de l'krea povo de ĵurnalistoj kaj provas helpi ilin ĉiamaniere, plenumi siajn taskojn ene de la Esperanto-movado.

1.2. TEĴA tenas kontaktojn al neesperantistaj ĵurnalistaj organizaĵoj por reciproka subtenado kaj por disvastigo de Esperanto en tiuj medioj.

2. Rimedoj

2.1. TEĴA, por atingi tiujn celojn, eldonas sian organon *Internacia Ĵurnalistiŝto* kaj aliajn publikigaĵojn, aranĝas proprajn konferencojn, seminariojn, kursojn k.s. kun laŭebla sciencista akompano; por plej eble efika trejnado de siaj membroj, TEĴA strebas al establo de konstanta ĵurnalisma edukejo ene de unu el la ekzistantaj kulturaj centroj de l'Esperanto-movado. En tiu kadro TEĴA klopodas ankaŭ oferti Esperanto-kursojn por ĵurnalistoj.

2.2. La oficiala lingvo de TEĴA estas la lingvo internacia, Esperanto.

3. Membreco

3.1. Membro de TEĴA povas esti ĉiu esperantista ĵurnalistiŝto, profesia aŭ amatora, laboranta ĉu kiel redaktanto ĉu kiel verkanto de gazeto, radiofonio kaj televido kaj ĉiuj aliaj amaskomunikiloj, kiel kino, vidbendo k.a., esperantistaj kaj neesperantistaj. Ĉiu membro per sia aniĝo agnoskas la celojn kaj la etikan kodon de TEĴA, kiu estas konsistiga parto de l'statuto en ties aktuala formo.

3.2. Membrecon oni akiras per subskribo de koncerna aliĝilo. Oni perdas ĝin, krom per ekŝiĝo aŭ morto, ankaŭ se laŭ rekomendo de l'arbitracia komisiono la membrokunveno de TEĴA decidas eksigon pro kompromito de la TEĴA-statuto aŭ la etika kodo.

3.3. Eblas starigi grupojn, landajn sekciojn kaj specialajn sekciojn de TEĴA; ilin devas agnoski per simpla plimulto la mebrokunveno de TEĴA. Speciala sekcio de TEĴA estas Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-Kino-Magnetofon-Amatoroj (ILEF).

3.4. TEĴA eldonas specialan membrokarton, kiu estas legitimilo por faciligi la laboron de ĵurnalistoj.

4. **Organoj**

La decidorganoj de TEĴA estas

la membrokunveno; la estraro; la arbitracia komisiono.

4.1. La supera gvidorgano estas la membrokunveno, kiu okazas minimume ĉiun trian jaron, laŭeble ĉiun jaron, kutime kadre de l'Universala Kongreso de Esperanto (UK). Ĝi elektas ĉiun trian jaron estraron kaj decidas pri la kutimaj aferoj de l'asocio per simpla plimulto; por ŝanĝoj de l'statuto necesas plimulto du-triona. La membrokunveno aprobas la gvidliniojn de la asocia laboro, akceptas la estraran labor-raporton, rajtas senŝarĝi la estraron, starigi kaj nuligi laborkomisionojn. En la membrokunveno ĉiu ĉeestanta ordinara membro havas unu voĉon. La membrokunveno aŭ la estraro povas decidi, ke oni aranĝu skriban voĉdonadon de ĉiuj membroj ekster la membro-kunveno.

4.2. La estraro konsistas el minimume 5 anoj: prezidanto, vicprezidanto(j), ĝenerala sekretario, kasisto kaj estraranoj kun specifaj taskoj. La redaktoro de *Internacia Ĵurnalisto* povas, tamen ne devas esti ankaŭ estrarano, sed ĉiukaze respondecas rekte al la estraro. La membrokunveno elektas la prezidanton aparte, la ceterajn estraranojn ĝi povas elekti bloke; por la elektoj sufiĉas simpla plimulto de l'ĉeestantaj membroj. Reelekto kiel estrarano eblas. La estraro elektas per simpla plimulto inter si la diversajn funkciulojn. La estraro donas al si reglamenton, kiu fiksas la taskojn, rajtojn kaj devojn de l'estraranoj kaj la manieron de kunlaborado.

4.3. La arbitracia komisiono konsistas el 3 personoj, el kiuj neniu rajtas esti estrarano; ilin la membrokunveno elektas aparte per simpla plimulto. La arbitracia komisiono devas aktiviĝi je peto de membro aŭ de la estraro kaj nepre en konvena tempodaŭro (maksimume du monatoj) akiri replikon je riproĉoj de l'koncerna membro. La komisiono per simpla plimulto devas rekomendi decidon al la venonta membrokunveno, kiu voĉdonas per simpla plimulto pri eksigo de la membro akuzita.

4.4. La membrokunveno elektas krome minimume ĉiun trian jaron (samtempe kun estrarelektoj) 2 kasrevizorojn.

5. **Taskoj de la estraro**

5.1. La estraro gvidas la asociajn aferojn, zorgas pri eldonado de l'organo *Internacia Ĵurnalisto* kaj aliaj publikigaĵoj, pri la administrado, organizas la membrokunvenojn kaj aliajn konferencojn, seminariojn k.s. de TEĴA.

5.2. La prezidanto kaj la vicprezidanto(j) reprezentas la asocion ĉe aliaj

esperantistaj kaj neesperantistaj instancoj, asocioj kaj institucioj kaj tenas kontaktojn al ili.

5.3. La ĝenerala sekretario zorgas pri la kontaktoj kaj kunordigado inter la estraranoj kaj plenumas organizajn taskojn laŭ la decidoj de l'estraro kaj ĝenerale helpas la prezidanton en realigado de plenumendaj taskoj, preparas kaj organizas la membrokunvenojn kaj ellaboras jaran agad-raporton.

5.4. La estraro povas fari decidojn ĉu dum kunveno ĉu koresponde.

5.5. Se estrarano eksiĝas inter du membrokunvenoj, la estraro per simpla plimulto povas koopti novan estraranon; la sekva membrokunveno devas aprobi tion aŭ elekti alian estraranon.

6. **Financaj rimedoj, sidejo de TEĴA**

6.1. La bezonatajn financajn rimedojn la asocio kolektas per membrokotizoj, kiujn fiksas la membrokunveno, abonpagoj de *Internacia Ĵurnalisto*, vendado de eldonaĵoj, donacoj k.a.

6.2. La asocio ne pagas iujn ajn rekompencojn al estraranoj kaj aliaj funkciuloj, nur repagas ties realajn elspezojn faritajn en plenumo de taskoj.

6.3. La organiza jaro egalas al la kalendara jaro.

6.4. Jura sidejo de TEĴA estas — se la estraro ne decidis ion alian — la loĝloko de la prezidanto.

7. **Honorigoj**

7.1. Multjaraj membroj de TEĴA pro meritoj pri la asocio aŭ Esperanto-ĵurnalismo povas esti nomataj Honoraj Membroj de TEĴA. Pri tio decidis la membrokunveno laŭ proponoj de estraro aŭ membroj.

7.2. La asocio povas starigi specialajn premiojn por distingi ĵurnalistojn aŭ ekzemple akceli junajn talentojn.

8. **Ŝanĝo de la statuto**

8.1. Pri ŝanĝoj, aldonoj kaj kompletigoj de la statuto decidis la membrokunveno per plimulto de du trionoj de la validaj voĉdonoj laŭ proponoj de la estraro aŭ membroj.

8.2. Proponojn oni devas direkti al la ĝenerala sekretario, kiu devas diskonigi ilin en la asocia organo, tiel ke ĉiu membro konu la tekstojn ne pli malfrue ol tri monatojn antaŭ membrokunveno.

8.3. La sama proceduro validas por malfondo de la asocio.

8.4. En kazo de malfondo la havaĵo de la asocio transiras en proprieton de Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam.

Etika kodo

de ĵurnalismaj principoj

Inter la homaj rajtoj estas tiuj de libera informado kaj informiĝado, de libera esprimado de opinioj kaj kritikoj. Sur ĉi tiuj fundamentaj homaj rajtoj baziĝas la ĵurnalisma libereco, kiu devas ne esti malhelpata per iuj ajn limigoj. Eldonistoj kaj ĵurnalistoj devas esti sendependaj kaj plenumi siajn taskojn laŭ plej bonaj scio kaj konscienco, ne influitaj de personaj interesoj kaj fremdaj personoj. Surbaze de supraj konsideroj Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio preskribas por siaj membroj jenajn principojn:

1. Respekto al la vero estas la plej alta principo de ĵurnalismo.
2. Publikigitaj informoj, ĉu tekstoj, ĉu fotoj, ĉu filmoj, devas esti zorgeme kontrolataj rilate la veron. Ilian sencon oni devas nek ŝanĝi nek falsi per prezentado, titolo aŭ bild- kaj film-klarigo. Dokumentojn oni devas komuniki fidele al ilia enhavo. Ne-konfirmitajn informojn oni devas klare karakterizi kiel onidirojn, supozojn aŭ eblojn. Se temas pri simbola foto aŭ filmo, oni klare devas indiki, ke ĝi ne estas dokumenta.
3. Aperigitajn informojn aŭ asertojn, kiuj poste pruviĝas malĝustaj, la koncerna komunikilo devas el si mem reĝustigi tuj kaj en adekvata maniero.
4. Por havigi al si informojn, materialojn, fotojn, film- kaj son-registraĵojn, oni devas ne apliki malhonestajn kaj mallojalajn metodojn.
5. Ĉiu ĵurnalisme laboranta persono devas gardi la profesion sekreton, devas ne denunci atestanton kaj devas ne konigi nomon de informinto sen ties konsento.
6. Redakciajn publikigojn devas ne influi privataj aŭ komercaj interesoj de aliaj personoj. Oni devas klare disigi redakciajn tekstojn de varbaj kaj reklamaj tekstoj. Reklamaĵoj devas esti klare ekkoneblaj kiel tiuspecaj.
7. La ĵurnalismo respektas la privatan vivon kaj la intim-sferon de l' homo. Nur se privata agado de homo koncernas publikajn interesojn, oni povas diskuti ĝin en amas-komunikiloj. Oni devas severe kontroli antaŭe, ĉu per tio estas vundataj la homaj rajtoj de nekoncernatoj.
8. Kontraŭas ĵurnalisman etikon, aperigi nemotivitajn akuzojn, precipe se ili estas malhonestigaj.

9. Artikoloj, kiuj laŭ formo aŭ enhavo povas humiligi aŭ kalumnii homojn kaj grupojn pro ties morala aŭ religia konvinko, ne konformas al la ĵurnalisma etiko; tio validas ankaŭ por ilustraĵoj, karikaturoj, fotoj kaj filmoj.

10. Oni devas eviti neadekvatan sensacian prezenton de perforto kaj brutaleco. Precipe oni atentu protekti junularon kontraŭ tio.

11. Neniu devas esti diskriminaciata pro sekso, raso, religio, nacieco aŭ lingvo.

12. Raportado pri kurantaj kriminal-enketoj kaj procesoj devas esti libera de antaŭjuĝoj. Akuziton oni devas ne prezenti kvazaŭ kondamniton antaŭ tribunala verdikto.

13. Ĉe medicinaj temoj oni devas eviti sensacian prezentadon, kiu povus provoki nemotivitan esperon. Esploradoj ne jam finitaj estu prezentataj kiel provizoraj.

14. Neniu eldonisto kaj ĵurnalisto koruptiĝu per akcepto de donacoj kaj avantaĝoj, kiuj povus redukti la liberecon de decido.

15. Altaj idealoj de ĵurnalismo devas esti pacamo, solidareco kun subprematoj kaj defendo de l'homaj rajtoj agnoskitaj de UN.

Reglamento de TEĴA

Kompletigoj kaj detaligoj laŭ paragrafo 4.2 lasta frazo de la statuto

Preamblo: La kontaktojn al UEA tenas precipe la ĝenerala sekretario, kiom koncernas administrajn aferojn, ekzemple rilate la jarlibron de UEA, kunvenejo dum UK k.s., kaj la prezidanto, kiom koncernas neordinarajn aferojn.

1.2. Pri kontaktoj al neesperantistaj ĵurnalistoj la estraranoj konsentas inter si. La estraro povas komisi ordinaran membron, reprezenti la asocion ĉe konvenaj okazoj.

2.1. **Internacia Ĵurnalisto** aperas kvar fojojn jare en amplekso de 16 paĝoj DIN A4, respektive en januaro, aprilo, julio kaj oktobro. Pri ties enhavo respondecas la redaktoro, ne la estraro. La redaktoro devas senprokraste aperigi ĉiujn oficialajn komunikojn de l' estraro aŭ de estrarano. Pri abonkotizo por ne-membroj decidas la estraro.

Pri titoloj de aliaj eldonaĵoj decidas la estraro.

Pri apartaj seminarioj kaj kursoj la estraro povas komisiu membrojn, ĉu aranĝi, ĉu partopreni ilin en nomo de TEĴA.

3.2. Membreco validas por unu jaro kaj aŭtomate plilongiĝas per la sama tempo, kondiĉe ke la membro pagas sian jarkotizon ĝis plej malfrue la fino de januaro. Ĉiu membro povas fariĝi dumviva membro paginte dudekoblan jarkotizon. Dujara nepagado de kotizo estas ankaŭ kontraŭstatuta agado kaj rajtigas la estraron, proponi eksigon de la membro al la arbitracia komisiono. Membro povas fini sian membrecon per skriba sciigo, kiu devas alveni ĉe la kasisto minimume 2 monatojn antaŭ fino de jaro.

3.3. Landan sektion povas konsistigi minimume 5 membroj. La membroj elektas sekciestron, kiu reprezentas la landan sektion ĉe la estraro, en membrokunvenoj de TEĴA kaj ĉiuj aliaj okazoj.

3.4. La membrokarto validas sen tempa limigo; estus troa administra ŝarĝo, ĉiujare pluvalidigi ĝin. La risko de misuzo ekz. fare de eksigita membro ŝajnas neglektinda kompare al tia ŝarĝo. Pri la formo de la membrokarto decidus la estraro. La membrokarton per sia subskribo validigas la kasisto.

4.1. La tagordo de membrokunveno devas enhavi minimume jenajn punktojn:

1. Agad-raporto de l' estraro (eventuale kun raporto de l' arbitracia komisiono) pri la pasinta jaro. 2. Kasraporto kun buĝet-propono kaj raporto de l' revizoroj. 3. Protokolo de l' antaŭa membrokunveno. 4. Senŝarĝo de estraro kaj kasisto (kune aŭ aparte). 5. Proponoj de membroj.

La agad-raporto devas esti prezentita buŝe, la aliaj raportoj kaj la protokolo povas esti prezentitaj ankaŭ nur en skriba formo, tiel ke ĉiu ĉeestanta membro disponas pri ekzemplero. La agad-raporto devas post aprobo de l' membrokunveno aperi en **IĴ**.

Elektaj de estraranoj okazas skribe. Kandidatoj estu prezentitaj laŭeble en la numero de **IĴ** aperanta antaŭ la membrokunveno, sed eblas proponi kandidaton ankaŭ dum la kunveno mem, se tiu ĉeestas por konfirmi sian kandidatecon aŭ — se ne ĉeestas — antaŭe skribe deklaris ĝin.

Kandidato estas elektita havante la plej multajn el la validaj voĉoj; sindetenoj ne estas voĉoj. La ĝenerala sekretario preparas por la membrokunveno slipojn por la estrar-elektoj.

La membrokunveno antaŭ elektoj al la estraro devas elekti membron, kiu gvidas la elektan proceduron; tiu ĉi gvidanto rajtas voki helpantojn. Elektojn ne rajtas gvidi membro, kiu mem kandidatas. Kandidato definitive estas elektita, kiam je la demando de la elektogvidanto li deklaras akcepton de elektigo aŭ se tia konsento jam antaŭe ekzistis en skriba formo.

Ĉiuj aliaj voĉdonoj okazas per levo de manoj; se plimulto de membroj postulas skriban voĉdonon, oni devas aranĝi ĝin.

En kazo de egaleco de nombroj jesaj kaj neaj de la validaj voĉoj, la koncerna propono estas malakceptita. La prezidanto rajtas postuli duan voĉdonon, eventuale skriban. La membroj de la estraro havas voĉdonrajton, escepte se temas pri aferoj, pri kiuj ili mem respondecas. Membroj, kiuj ne povas ĉeesti membrokunvenon, rajtas doni skriban mandaton voĉdoni en ties nomo al alia membro; tiu ĉi devas antaŭ aŭ komence de membrokunveno montri la mandaton al la ĝenerala sekretario (aŭ alia estrarano, kiam la ĝenerala sekretario ne ĉeestas) la mandaton. Unu membro rajtas havi maksimume 5 tiajn mandatojn.

Ĉe voĉdonado per levo de manoj oni kalkulas la nombrojn de mandatoj nur, kiam oni notas la precizajn nombrojn de voĉoj. Ĉe skribaj voĉdonoj, la membro kun mandato(j) ricevas tiom da voĉdonoj, kiom da mandatoj ĝi havas plus unu por ĝi mem.

Gvidlinioj de l' asocio kutime troviĝas en laborplano kompilita por la trijara funkci-periodo de l' estraro; laborplanon kompilas ordinare unu el la vicprezidantoj aŭ la ĝenerala sekretario, laŭ proponoj, sugestoj kaj direktivoj de la estraro.

La estraran agad-raporton verkas la ĝenerala sekretario minimume 2 monatojn antaŭ membrokunveno kaj sendas ĝin ĝustatempe al ĉiuj estraranoj, tiel ke ili povas kompletigi ĝin en kazo de bezono. La definitivan agad-raporton devas aprobi la estraro en kunsido antaŭ la membrokunveno.

Laborkomisiono konsistas el minimume tri membroj; ĝi raportas al la estraro laŭ interkonsentita maniero. Pri financoj por laborkomisiono estu skriba interkonsento inter la membroj kaj la estraro.

4.3. La membroj de l' arbitracia komisiono povas esti reelektataj; ili elektas inter si estron, kies adreso devas aperi konstante en la kolofono de *IĴ*. La komisionestro tuj post alveno de peto aŭ postulo pri eksigo de membro informas la aliajn membrojn de la komisiono kaj la akuziton; se ties adreso estas nekonata al la komisiono, la estro sendas koncernan let-

eron al la kasisto, kiu senprokraste devas kompletigi la koverton per la ĝusta adreso kaj ekspedi la leteron. En la letero la akuzito devas esti informata pri siaj rajtoj kaj la proceduro.

La komisionestro rajtas rifuzi akcepton de akuzo, se tiu ĉi ne estas dokumentita aŭ ne sufiĉe dokumentita; en tiu kazo li povas postuli de l' akuzinto pliajn pruvojn aŭ argumentoj kaj prokrasti ĝis ties alveno la tempodaŭron de du monatoj.

Post alveno de la repliko de l'akuzito, aŭ — se tiu ne reagis ene de la preskribita tempodaŭro — post du monatoj, la komisionestro denove informas siajn komisionanojn; tiuj donu siajn argumentojn, tiel ke la komisionestro povas formuli koncernan proponon al la membrokunveno.

Se dum la pasinta jaro la arbitracia komisiono ne estis alvokita, la komisionestro ĝustatempe komuniku tion al la ĝenerala sekretario, por ke li povu noti tion en sia agad-raporto.

4.4. Kasrevizoroj estas reelekteblaj. Ili ricevas komence de jaro skriban raporton de la kasisto pri la antaŭa jaro por kontrolo; se estas malklaraĵoj aŭ dubindaĵoj, ili rajtas postuli klarigojn kaj pruvojn de la kasisto aŭ povas postuli, ke la kasisto ebligu personan kontroladon dum kunsido antaŭ la membrokunveno. Ili devas prezenti skriban raporton subskribitan de ambaŭ al la membrokunveno, kun la rekomendo senŝarĝi la kasiston aŭ la postulo, ke la kasisto defendu iujn neklarajn punktojn en la membrokunveno.

5.2. Funkcioj de l' prezidanto: kunvokas kaj gvidas estrarkunsidojn kaj membrokunvenojn, starigas kun la ĝenerala sekretario tagordojn, organizas kun aŭ sen helpo de la ĝenerala sekretario decidojn per skriba voĉdonado de l' estraro, informas pri ĉiuj gravaj aferoj la ĝeneralan sekretario. Ĉe egaleco de jesaj kaj neaj voĉoj en la estraro, la prezidanto rajtas decidi pri akcepto aŭ rifuzo de propono. La prezidanto rajtas komisiu proprajn taskojn al vicprezidanto aŭ alia estrarano.

Funkcioj de l' vicprezidanto(j): anstataŭas en okazoj de bezono la prezidanton, ĉu kun ties konsento, ĉu (ekz. pro malsano aŭ morto) sen ĝi.

5.3. Funkcioj de l' ĝenerala sekretario: administras la asocion laŭ ĉiuj aspektoj, precipe: kolektas ĉiujn aktojn kaj dokumentojn, leterojn kaj cirkulerojn en arkivo; preparas teknike estrarkunsidojn kaj membrokunvenojn kaj aliajn aranĝojn; starigas en interkonsento kun la prezidanto tagordojn; verkas la protokolojn de estrarkunsidoj kaj membrokunvenoj;

raportas per cirkuleroj al la estraranoj; aranĝas en interkonsento kun la prezidanto skribajn voĉdonadojn de l' estraro; verkas kaj prezentas buŝe al la membrokunveno jaran agad-raporton; tenas la kontaktojn al komisionoj kaj sekcioj; tenas la kontaktojn al la kasisto rilate membrecojn.

6.1. Funkcioj de l' kasisto: enkasigas mem kotizojn kaj donacojn aŭ komisiastion al aliaj (sekcioj por ties membroj, Flandra Esperanto-Ligo); akceptas aliĝilojn kaj ekziĝojn; administras la membroliston; plenigas, subskribas kaj sendas membrokartojn; pagas fakturojn; librotenadas, verkas kasraporton kaj starigas jaran buĝeton; sendas komence de jaro la kasraporton al la revizoroj; proponas al la estraro fiksadon aŭ ŝanĝon de membrotizoj.

Estraranoj: plenumas specialajn taskojn laŭ interkonsento de la estraro; rajtas proponi sin por tiaj taskoj kaj funkcioj; informas pri ĉiuj gravaj aferoj la ĝeneralan sekretariojn; sendas kopiojn de leteroj adresitaj al la prezidanto aŭ aliaj estraranoj al la ĝenerala sekretario.



Dumonata ilustrita revuo

Abonebla ĉe UEA kaj
Litova Esperanto-Asocio:
p.k. 167, LT-44002 KAUNAS

L I T O V I O

litovastelo@takas.lt, litova.ea@mail.lt

**Kaunas, L.Zamenhofo 5
Vilnius, Rotundo 5**

Ankoraŭfoje pri la Esperanta gazetaro

Plonĝo en la pasintecon

Estas preskaŭ neeble supertaksi la rolon de la Esperanta gazetaro en la vivo de la esperantista lingvo-komunumo, kaj estas facile imagi ĉi tiun rolon en la pionira epoko de Esperanto, kiam mankis ne nur interreto, radio kaj telefono, sed eĉ esperantistaj renkontiĝoj kaj internaciaj vojaĝoj. Estis nur kelkaj broŝuroj, estis personoj kiuj decidis eklerni la novan lingvon, kaj estis mondlingva klubo en Nurenbergo, kies membroj decidis forlasi Volapukon kaj akcepti Esperanton kondiĉe ke en tiu lingvo estos fari-taj ŝanĝoj.

Zamenhof jam en 1888, kiam la lingvo estis unujara, adresis sin al la ĉefadministracio ruslanda pri gazetaro kun peto permesi eldonon de ĉiusemajna revuo *La internaciulo* (Международник). En sia peto li klarigis, ke por ke la internacia lingvo komencu alporti utilon al la homaro, ĝi devas perfektigi, kaj por tio estas necese, ke en tiu lingvo

aperadu iu perioda eldonaĵo, kiu per sia ekzisto montrus praktike, kiomgrade la lingvo taŭgas por preciza esprimo de homa penso, kiomgrade ĝi kapablas anstataŭi aliajn lingvojn (krom gepatra, kompreneble), kio en ĝi ankoraŭ mankas ktp.; tiu ĉi eldonaĵo okupiĝus pri prilaboro de la lingvo, konatigus inter si amikojn de tiu ĉi lingvo kaj, koncentrigante iliajn disigitajn fortojn, farus ilian agadon efektive fruktodona kaj aktiva por la socio.

Oni scias, ke Zamenhof ne ricevis la permeson, kaj ke la unua Esperantogazeto en Ruslando fondiĝis nur en 1904, sed en Nurenbergo 1 sep 1889 aperis la unua numero de *La Esperantisto*: “gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto”. Ĝia eldonanto estis la nova prezidanto de la Mondlingva Klubo en Nurenbergo, Christian Schmidt. La gazeto ebligis al la legantoj konatiĝi kun la agado de alilandaj samideanoj, legi regulan adresaron de la novaj esperantistoj, interŝanĝi agadspertojn, diskuti pri la lingvaj problemoj.

Krome ĝi enhavis originalajn kaj tradukitajn beletraĵojn, distraĵojn kaj soci-kulturajn informojn ne ligitajn kun Esperanto. La gazeto fariĝis ĝermo de la esperantista “popolo”.

En 1889 *La Esperantisto* aperis trifoje kun tekstoj en la lingvoj germana kaj Esperanto; sekvontjare aperis naŭ kajeroj nur en Esperanto, kaj poste ĝi ĉiumonatiĝis. En la unua abonjaro la revuo havis 112 abonantojn, plejparte el Ruslando. En 1892 la abonantaro atingis 544 en 12 landoj (Ruslando 335, Germanio 124, Svedio 56, aliaj landoj 29). En 1893 la abonantaro kreskis ĝis 889. Entute aperis 66 numeroj ĝis la maja-junia kajero 1895, eldonita en aŭgusto.

Ĝis decembro 1895 esperantistoj restis sen komuna ligilo, ĝis en Upsalo (Svedio) aperis la unua numero de *Lingvo Internacia* — “monata organo por la lingvo Esperanto”. Ĝin kunfondis svedo Valdemar Langlet kaj ruslandano Vladimir Gernet. Ili interkonsentis, ke la gazeton eldonos la klubo esperantista en Upsalo, kaj Gernet estos ĝia redaktoro kaj financa direktoro. Kvankam Zamenhof de tempo al tempo kontribuis al *Lingvo Internacia*, li apenaŭ influis la enhavon kaj la eldon-politikon de la revuo. Pro tro longa poŝta korespondado inter Ruslando kaj Svedio, en 1897 la redaktadon transprenis upsalano Paul Nylén, kiu redaktis ĝin ĝis la jaro 1901. Poste *Lingvo Internacia* aperis en Budapeŝto (1902–1904) kaj fine en Parizo, kie dum 1907–1914 ĝin redaktis Théophile Cart. Entute aperis 252 numeroj sur 6574 paĝoj.

Sed pli influa ol *Lingvo Internacia* estis *L'Espérantiste*, kiun en 1898 ekredaktis Louis de Beaufront, la dua patro de Esperanto. Ĝi estis dulingva, en Esperanto kaj en la franca lingvo, kaj pro tio eŭropaj kleruloj ricevis regule informojn pri Esperanto sen lerni la novan lingvon, dum esperantistoj trovis multajn interesajn tekstojn kaj organizajn rekomendojn en ĝi.

La unuaj gazetoj evoluigis la lingvon, formis kernon de la esperantista komunumo, kreskigis la literaturan aplikadon.

Ni forlasu la historion kaj vidu la nunan staton de la Esperanta gazetaro kaj ties problemojn.

Kiaj gazetoj?

Oni povas dividi la Esperanto-gazetojn laŭ pluraj kriterioj: laŭ landoj, laŭ aper-ofteco, laŭ amplekso, laŭ statuso (organo de asocio aŭ sendependa), sed eble la plej kutima estas divido laŭ la temoj kaj celoj. Ni sekvu ĝin.

El ĉi tiu vidpunkto la tri menciitaj gazetoj (*La Esperantisto*, *Lingvo Internacia* kaj *L'Espérantiste*) apartenas al la kategorio

Internaciaj movadaj gazetoj

Ili aperis antaŭ la unua mondmilito. En la sama periodo (en 1905) 23-jara franco Paul Berthelot fondis la revuon *Esperanto*, kiun en 1907 li cedis al 20-jara sviso Hector Hodler. Post la fondo de UEA en 1908 ĝi iĝis ties organo. *Esperanto*, malkiel la tri menciitaj gazetoj, ne atentis lingvajn temojn, sed servis por praktika uzado de la lingvo. Ĝi ekzistas ĝis nun, kaj ĝi estas la plej vaste legata Esperanto-gazeto en la mondo.

En la intermilita periodo *Esperanto* aperigis tekstojn ankaŭ pri ĝeneralaj kulturaj kaj historiaj temoj kaj beletraĵojn, same kiel *La Esperantisto* kaj *Lingvo Internacia*, sed en la nuna tempo ĝi raportas nur pri la Esperanto-movado (laŭ la vidpunkto de UEA) kaj pri lingvopolitikaj aferoj. Tradicie, unu numeron ĉiujare plenigas raportoj pri la Universala Kongreso, kaj unu el la aliaj kajeroj donas multe da spaco al la Estrara Raporto de UEA.

La unua numero de *Esperanto Triumfonta*, fondita de Theodor (Teo) Jung en Germanio aperis 14 apr 1920, je la mortodato de Zamenhof. Ekde novembro 1920 komenciĝis ĉiusemajna aperado, kiu finiĝis nur pro la interveno de Gestapo en junio 1936. En januaro 1925 la ĵurnalo eknomiĝis *Heroldo de Esperanto*, kaj dum unu jaro ĝi aperis *duonsemajne*. Okaze de UKoj en Germanio (1923 kaj 1933) ĝi estis *ĉiutaga*. Dum kelkaj jaroj ĝi raportis ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri mondaj novaĵoj, kaj tio ne ĉiam plaĉis al legantoj el landoj kritikataj.

Apenaŭ estis en Esperantujo gazeto pli populara ol *Heroldo*. Sed ne pro pli ol 2000 aperintaj numeroj kaj ne pro tio, ke Teo Jung — kombininta siajn fakajn konojn kun la entuziasmo pri Esperanto — iĝis unu el nemultaj sukcesaj profesiaj esperantistoj (per sia Esperanto-laborado li perlaboris pension). Plej gravas, ke *Heroldo* de Teo Jung estis konsekvenca protagonisto de la sendependa ĵurnalismo en Esperantujo. Tion ĝi atingis per honesta sinteno pri la demandoj, en kiuj la logiko eble konsilis akcepti pli sekuran flankon, kaj kvankam tiu sinteno foje provokis konflikton kun la “movadestroj”.

Heroldo ne identiĝis kun iu el movadaj partioj (escepte de kelkaj antaŭmilitaj jaroj kiam ĝi estis organo de IEL). Teo Jung kaj Ada Fighiera-Sikorska (ŝi redaktis *Heroldon* dum 1962–1996) ne evitis diri sian opinion pri konfliktoj en Esperantujo kaj pro tio ĝi havis streĉitajn interrilatojn

kun, interalie, *Germana Esperantisto* kaj Ellersiek en la jaroj 1920aj, UEA en la 1930aj, Ivo Lapenna en la 1970aj...

En 1996 *Heroldo* ekposedis LF-koop, kaj poste ĝi profiliĝis kiel gazeto raŭmisma, ne tutesperantuja. Kreskis la pres-kvalito kaj akurateco, sed la transtendenceco malaperis. Kvankam ĝiaj legantaro kaj influo ŝrumpis, ĝi restas la plej ofta papera Esperanto-gazeto kun trisemajna eldonritmo (17 numeroj jare).

Sed dum unu jardeko *Heroldo* cedis sian plejoftecon al ***Eventoj***, fondita de László Szilvási (Hungario). La unua numero aperis 2 mar 1992, kaj poste ĝi estis duonmonata (kun kelkaj paŭzetoj kaj duoblaj numeroj) ĝis decembro 2002. Entute dum iom pli ol dek jaroj aperis 244 numeroj kun kelkaj utilaj suplementoj (adresaroj kaj fakaj temoj). La abonantaro variis inter 1000 kaj 1500.

Eventoj heredis la temaron de ĉiumonata *Budapeŝta Informilo* — ĝi raportis pri Esperanto-novaĵoj kun speciala atento al faka aplikado kaj al la reto, sed, malkiel *Budapeŝta Informilo*, ne naci- sed internaci-skale. La redakcio ne sukcesis esti neŭtrala en Esperantujo, kaj ĝi, interalie, prisilentis sukcesojn kaj emfazis mankojn de la Esperanta Civito kaj de la Ruslanda Esperanto-Asocio kaj *Sezonoj*. Ĝis nun kelkaj rubrikoj de *Eventoj* daŭras en la samnoma reta Esperanto-Centro, interalie, kalendaro de Esperanto-renkontiĝoj kaj Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko (STEB).

Ĉi tiu centro funkciigas novaĵservon *RetInfo*. Krom ĝi funkcias novaĵservoj *Heroldo Komunikas* kaj *Gazetaraj Komunikoj de UEA*. Ilin uzas dekoj da movadaj gazetoj.

La Ondo de Esperanto — apud *Esperanto* kaj *Heroldo* — estas la tria nuntempa internacia movada gazeto. Tamen ĝia temaro estas pli vasta. Krome, nun ĝi estas la sola *tutesperantuja* primovada gazeto, ĉar *Esperanto* traktas ĉefe la vivon de UEA kaj de ties landaj kaj fakaj asocioj, kaj *Heroldo* estas organo civitisma kun negativa sinteno al la plej grava esperantista asocio UEA. *La Ondo* disponigas sian spacon por informi pri la agado de UEA kaj de SAT, pri eventoj en diversaj landoj, pri la Esperanta Civito, pri la faka agado, pri agado de socie marĝenaj Esperanto-grupoj, pri la movado ĝenerale. Aperas ne nur informoj, sed ankaŭ intervjuoj, komentarioj kaj polemikaĵoj, ofte kontraŭdiraj, sen kio diskutado ne povas okazi.

Pro ĉi tiu plurismo de opinioj *La Ondo* estas nomata jen “laŭtparolilo de Roterdamo”, jen marioneto de l’ raŭmismoj. Sed ĝi estas tia, kia ĝi estas — internacia sendependa magazino en Esperanto.

Estas klare, kio estas *internacia*, sed kio estas *sendependa* kaj *magazino*?

Esti **sendependa** ne signifas sendependon absurde absolutan, kiu ne povas esti, ĉar ĉiu gazeto ne aperas per si mem, sed apartenas al iu grupo aŭ individuo. Temas pri sendependeco de la menso, pri kapablo agi kur-aĝe, cedante nek al promesoj pri privilegioj, nek al tendenco al skandalema bulvardiĝo, nek al natura agaco trempi la plumon en galon. Tiu sendependeco devigas la redaktoron aperigi honestan opinion, malgraŭ tento ne komenti, prisilenti, laŭdeti — jen pro premo de la patrona instanco, jen pro facile komprenebla memcenzuro.

La **magazineco** de *La Ondo*, kiu aperas en Ruslando ekde 1991, unue dumonate kaj ĉiumonate ekde 1998, videblas en ĝia vasta temaro — ne nur movada kroniko kaj polemikado, sed ankaŭ beletro, interlingvistiko, ĝeneraj temoj kulturaj kaj sociaj, beletraĵoj, recenzoj, muziko, konkurstaskoj kaj multaj ilustraĵoj. *La Ondo* okazigas literaturan kaj fotistan konkursojn kaj kunordigas la projekton “La Esperantisto de la Jaro”.

Magazinoj estis ankaŭ *La Praktiko* (1932–1970) de la Internacia Cseh-Instituto en Nederlando kaj *Esperanto-Gazeto* (komence *IOE-Gazeto*) de la Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto, aperinta dum 1966–1972.

Sed la plej sukcesa Esperanto-magazino (NPIV: ”**Magazin/o**. Perioda revuo, ĝenerale ilustrita, k enhavanta artikolojn pri tre diversaj temoj”) estas *Monato*.

Ĝeneralaj magazinoj

Monato naskiĝis en 1978 kiel *Semajno* — forme kaj enhave simila al la plej prestiĝaj nacilingvaj semajnaj magazinoj: *Time*, *Newsweek*, *Der Spiegel*. Ĉi tiu provo kaŭzis grandan entuziasmon, sed la ideo de Stefan Maul kolekti 10 mil abonojn montriĝis nerealigebla. La plano ŝajnis mortinta, kaj nur en 1980 aperis la unua *Monato*.

Malgraŭ la ŝanĝoj de la eldoninto (Torben Kehlet, GCA de UEA en Antverpeno, FEL), malgraŭ kelktempa distanciĝo de la ĉefredaktoro Maul, malgraŭ la evoluo de la tekniko, *Monato* plu restas la sola internacia magazino en Esperanto, kiu traktas ĉiujn temojn de la moderna vivo krom

unu — krom Esperanto, al kiu sin dediĉas plejparto da aliaj Esperanto-gazetoj. Pro tio *Monato* reale konkurencas ne kun aliaj Esperanto-gazetoj sed kun pli riĉaj kaj pli amasaj nacilingvaj gazetoj, el kiuj esperantistoj povas ĉerpi informojn pri la samaj temoj.

Gravas ne nur la temaro, sed gravas la principo — malkiel en la menciitaj mondfamaj semajngazetoj, en *Monato* raportojn pri eventoj verkas lokaj ĵurnalistoj kiuj konas la lokajn cirkonstancojn kaj parolas la lokajn lingvojn, sed ne gastĵurnalistoj senditaj de la redakcioj al diversaj landoj, kiuj eble havas bonan profesion nivelon, sed ne konas la lokajn realaĵojn. Ĉi tiu principo, kiun *Monato* havas ekde la jaro 1980, nur en la 1990aj jaroj komencis aplikiĝi en gazetoj nacilingvaj, sed ne tiel plene kiel en *Monato*.

Monato estas grava ankaŭ pro tio, ke ĝia 28-jara funkciado pruvis ke oni ja povas uzi Esperanton por informi internacie pri politiko, ekonomio kaj kulturo de la tuta mondo. Ĉi tio havas du kromefikojn: unue, la ĵurnalistoj de *Monato* (entute, ĉirkaŭ cent el multaj landoj) riĉigas kaj aktualigas la lingvon, kiu danke al ili taŭgas por priskribi la modernan vivon, kaj, due, *Monato* estas montrinda gazeto, kiu pruvas al neesperantistoj la vivantecon de Esperanto.

Magazineca estas ankaŭ **Kontakto**, dumonata soci-kultura gazeto de TEJO, fondita en 1963, tamen ĝi traktas ne ĉiujn, sed nur kelkajn (foje marĝenajn) vivosferojn (nun denove per temaj kajeroj, kiuj pli frue estis taksitaj kiel malavantaĝo). Pro ĉi tiu malaktualeco, pro identec-problemoj ligitaj kun ofta ŝanĝo de redaktoroj, kaj pro la falo de la individua membraro de UEA (ĉiuj junaj membroj de UEA ricevas *Kontakton* sen aparta kotizo), ĝia abonantaro duoniĝis dum la lastaj dek kvin jaroj, dum la abonantaro de *Monato* restas stabila. Tamen ĝiaj legantaro kaj kunlaborantaro estas ankoraŭ sufiĉe grandaj, kaj la financa subteno de UEA garantias, ke la esperantista junularo plu havos sian propran gazeton.

Temoj neesperantaj estas en aliaj gazetoj, kaj en la historio de Esperanto estis multaj landaj gazetoj kun ĝenerala temaro.

Landaj gazetoj malplimultiĝas

La plej bona inter ili senkonteste estis *El Popola Ĉinio* (1950–2000), kiu dum duona jarcento aperis bele presite, lingve senriproĉe kaj — malmultekoste, ĉar ĝi estis nur unu el lingvaj versioj de la granda ŝtata revuo

(tamen ĉiu versio havis sufiĉe vastan aŭtonomion, kaj en la Esperanta *EP*, aperis multe da tekstoj verkitaj pri Esperanto en Ĉinio kaj internacie, kiuj mankis en aliaj versioj).

Ĝia ekstereŭropeco, ĝia amplekso, ĝia ekstera aspekto, ĝia nesimileco al ĉiuj aliaj Esperanto-gazetoj alportis al ĝi grandan popularecon en Eŭropo, Japanio kaj Usono, kaj la legantoj pardonis al ĝi la preskaŭ senkritikan bildon de Ĉinio. Sed pro la kreskanta pragmatismo en Ĉinio, la ŝtato ĉesis subteni Esperanton kiel informkanalon — la eldonanto decidis, ke en la jaro de sia 50-jariĝo ĝi ĉesu aperi paperforme kaj fariĝu reta eldonaĵo.

Pro perdo de ŝtata subteno, aŭ de privilegioj ĉesis pluraj revuoj tiaspecaj, ekzemple, *Hungara Vivo* kaj *La Espero el Koreio*. Eĉ pli frue malaperis *Vjetnamio Antaŭenmarŝas*, *Nuntempa Bulgario*, *Ripozoj* kaj *Okcidentgermana Revuo*. Tio ne estas escepta kazo de Esperanto. Fremdlingvaj propagandaj gazetoj fariĝas malpli oftaj; ili mortas aŭ transformiĝas al turismaj prospektoj. Ni do devas akcepti, ke la Esperanta gazetaro nun devas esti financata de esperantistoj mem.

Nur *Litova Stelo* kaj *Brazila Esperantisto* reprezentas nun la iam grandan grupon de prilandaj Esperanto-gazetoj, sed ambaŭ servas samtempe ankaŭ kiel movadaj informiloj por sialandaj esperantistoj, kaj eble pro tiu duobla karaktero ili estas malpli popularaj ol siatempe estis *EP*, kaj *Hungara Vivo*, kiuj nur iomete traktis la movadon, ĉar en tiuj landoj aperis movadaj gazetoj. *Hungara Vivo* estis ne nur prilanda, sed ankaŭ kultura revuo.

Kulturaj gazetoj

1 sep 1906 en Parizo ĉe *Hachette* aperis la unua numero de *La Revuo*, kun la subtitolo “Internacia Monata Literatura Gazeto, kun la konstanta kunlaborado de D-ro L.L. Zamenhof”. En *La Revuo*, direktata de Carlo Bourlet kaj redaktata de Félicien Menu de Ménil (la komponinto de la Esperanta himno *La Espero*), Zamenhof ricevis la eblon ĉiumonate aperigi siajn famajn tradukojn, interalie, el la Biblio. Pro la kunlaboro de Grabowski, Kabe, Vallienne, Boirac, Privat kaj aliaj gravaj aŭtoroj ĝi estis la plej prestiĝa Esperanta revuo antaŭ la unua mondmilito. Post la forpaso de Bourlet (1913) *Hachette* malinteresiĝis pri Esperanto, kaj *La Revuo* ne aperis postmilite.

La plej fama kulturgazeto en Esperanto iĝis ne *La Revuo*, produktita de unu el la plej konataj eldonejoj de la mondo, sed *Literatura Mondo*, fondita

en Budapeŝto de Tivadar Soros (Teodoro Ŝvarc), la patro de la fama entreprenisto George Soros. Post malpli ol kvarjara aperado (1922–1926) ĝi ĉesis kaj estis refondita en 1931 de Vilmos Bleier kiu ĝin eldonis ĝis la Dua Mondmilito.

En ĝi sub la redakto de du hungaraj poetoj Kálmán Kalocsay kaj Julio Baghy kunlaboris la plej famaj tiutempaj aŭtoroj: estonino Hilda Dresen, hungaroj Ferenc Szilágyi kaj Lajos Tárkony, francoj Gaston Waringhien kaj Raymond Schwartz kaj multaj aliaj. Ĝi aperigis elstarajn literaturajn verkojn originalajn kaj tradukajn, en ĝi pulsas la literatura vivo kaj floris kritiko. Lingve, stile kaj literatur-guste ĝi estis preskaŭ senriproĉa, kaj ne estas mirinde, ke ĝi estas konsiderata kiel la sola centra literatura Esperanto-revuo, dum la antaŭaj kaj postaj revuoj ne sukcesis respeguli la tutan gamon de la Esperanta literaturo.

Post la nelonga postmilita eldon-periodo de *Literatura Mondo* (1947–1949) pasis sep jaroj ĝis ekapero de ***La Nica Literatura Revuo*** (1955–1962, red. Gaston Waringhien) kaj de ***Norda Prismo*** (1955–1975, Ferenc Szilágyi ĝis 1967, William Auld ĝis 1972, laste Vilho Setälä). Ambaŭ revuoj estis interesaj literature kaj kulture, kvankam *La Nica* eble pli elstaris pro eseoj, recenzoj kaj zamenhofologiaj tekstoj ol pro beletraĵoj.

Literatura grupo *La Patrolo* ekeldonis en 1970 ***Literaturan Foiron*** (redaktoroj: Giorgio Silfer ĝis 1980, Perla Martinelli ĝis 1995, Ljubomir Trifonĉovski ekde 1996). Ĝi aperas ĝis nun kaj estas la plej longe aperanta Esperanto-kulturgazeto sed, same kiel la du supre menciitaj, ĝi ne atingis la influon de *Literatura Mondo*, eble ĉar ĝi donas tro da loko al la raŭmisma ideologio, kiun akceptas ne ĉiuj potencialaj legantoj kaj aŭtoroj, kiuj eble abonus aŭ kunlaborus, se ĝi enhavus malpli da ideologiaj tekstoj.

Plu aperas ankaŭ ***La Gazeto***, kies 23a jarkolekto jam komenciĝis. Ĝi estas ne literatura, sed ĝeneral-kultura gazeto kun forta filozofia influo de la redaktoro, Eugène de Zilah.

Ĉi tiuj kvar revuoj estis/estas dumonataj, sed ***Fonto***, fondita en oktobro 1980 en Brazilo ĉe samnoma eldonejo, estis ĉiumonata, kaj en ĝi literaturaj tekstoj dominis. Sub la sinsekva redaktado de William Auld, Daniel Luez kaj Gerrit Berveling entute aperis 306 numeroj — pli multe ol de iu ajn alia literatura revuo en Esperanto, sed *Fonto* “provizore” ekpaŭzis fine de 2006 pro kresko de poŝtaj tarifoj kaj ŝrumpo de la abonantaro, supozeble ankaŭ pro manko de eldon- kaj kultur-politiko.

Fine de 2007 estis lanĉita la jarduona *Beletra Almanako*.

Literaturaj tekstoj aperas en pluraj aliaj gazetoj — nuntempe en *Monato*, *La Ondo de Esperanto*, *Scienco kaj Kulturo*, *Pola Esperantisto*. Ni ne forgesu pri *La KancerKliniko* (Francio), al kiu ties eldonanto, Ĵak le Puil, aldonis la subtitolon: “politika, kultura, skandalema, ajnista”.

Sportaj, muzikaj, erotikaj, modaj revuoj ... ne ekzistas

Foliumante la revuojn, oni povas konstati, ke esperantistaro estas sufiĉe literaturema — en la eta diaspora lingvo-komunumo aperas kelkaj literaturaj kaj kulturaj revuoj, sed nur unu ĝenerala magazino (*Monato*), kaj neniuj gazetoj sporta, filma, teatra, muzika, erotika, neniuj modrevuoj, neniuj revuoj pri komputiloj, pri aŭtoj, pri turismo, pri ĝardenoj, pri fiŝado, neniuj reklamgazetoj ktp. Nu, tiaj gazetoj nacilingvaj kutime estas pli oftaj ol unumonataj kaj ili estas aĉetataj en kioskoj, sed ne abonataj. Esperantistoj do preferas legi pri tiaj temoj nacilingve, ne en Esperanto.

Tamen aperis kaj aperas kelkaj gazetoj religiaj, inter kiuj menciendas *Espero Katolika* — la plej longe aperanta inter ĉiuj niaj gazetoj (ekde 1903) — kaj protestanta *Dia Regno* (1908). Krom ili estas pluraj lokaj kaj landaj periodaĵetoj kristanaj.

Sennaciulo, *Sennacieca Revuo*, *Internaciisto*, *La Sago* estas politikaj gazetoj. Pli socia ol politika estas la nova revuo *Femina*.

Juna Amiko estas revuo por infanoj kaj komencantoj. La problemoj de tiaj gazetoj estas, ke infanoj adoltiĝas kaj komencantoj perfektigiĝas aŭ kabeas.

Fakaj Esperanto-gazetoj estas kutime asociaj bultenoj, informantaj pri la asocia agado kaj pri renkontiĝoj de samfakuloj. Interesaj fakaj tekstoj estas malmultaj. Eble nur *Internacia Pedagogia Revuo* kaj *Internacia Fervojisto* kontribuas al evoluo de siaj fakoj per Esperanto. *Sciencia Revuo* kaj *Scienco kaj Kulturo* aperigas tekstojn diversfakajn, sed mankas kontinueco al ambaŭ; foje oni pensas, ke ĉi tiuj revuoj aperigas nur tion, kion oni hazarde sendis por aperigo, sen klara eldonpolitiko (same pri *Fonto*).

Nacilingvaj gazetoj pri Esperanto restas ekster la kadro de ĉi tiu prelego, same kiel ili restas ekster la merkato.

Kio do estas la cetero inter la supozeble 250 aperantaj gazetoj?

Ili estas lokaj kaj landaj bultenoj, informantaj pri la vivo de la societoj, kiuj eldonas ilin. Kutime ili aperas dumonate aŭ trimonate, kun neregula eldonritmo kaj varia paĝonombro. Malmultaj havas dignan aspekton. Ofte ili ne zorgas pri abonantoj, ĉar la membroj de la societo/asocio ricevas la bultenon kontraŭ sia societa kotizo.

Inter ili la plej interesaj estas: *Le Monde de l'Espéranto* (Francio), *Esperanto aktuell* (Germanio), *Esperantolehti / Esperanta Finnlando* (Finnlando), *La Espero* (Svedio), *Kataluna Esperantisto* (Hispanio), *Skota Esperantisto* (Britio), *Tempo* (Kroatio), *Esperanto USA* (Usono), *Esperanto sub la Suda Kruco* (Aŭstralio), *Israela Esperantisto* (Israelo) kaj la jam menciitaj *Pola Esperantisto* kaj *Litova Stelo*.

Menciinte ĉi tiujn du orient-eŭropajn gazetojn, ni haltu en ĉi tiu regiono por rememori la grandan ŝanĝiĝon, kiu okazis en la lasta jar-dudeko.

Katastrofa falo en la Oriento

Dum pli ol tridekjara poststalinisma epoko la orient-eŭropa esperantistaro ĝuis trankvilan vivon. Kun nemultaj zorgoj pri panakiro, relative kontentigaj vivkondiĉoj kaj kun abunda libera tempo, sufiĉe multaj povis dediĉi parton de tiu tempo al Esperanto. La aŭtoritatoj modere subtenis la esperantistojn, kondiĉe de ties lojaleco al la reĝimo kaj de aparteno al la trunka landa asocio, establita kaj kontrolata de la ŝtato.

En ĉi tiu forcejo bele floris Esperantaj gazetoj, havantaj relative vastan legantaron en la “soclandaro”, kie loĝis duono da aligitaj membroj de UEA. Tiuj gazetoj havis neniun konkurencon (gazetoj okcidentaj preskaŭ ne povis penetri) kaj ricevis certan helpon de ŝtataj strukturoj. La eldonkvantoj multe superis la okcidentajn: *Bulgara Esperantisto* (6500 ekz.), *Budapeŝta Informilo* (5500), *Der Esperantist* (5000), *Juna Amiko* (4500), *Horizonto de Soveta Litovio* kaj *Slovaka Esperantisto* (po 3000)...

Laŭtakse, orient-eŭropaj legantoj meze de la 1980aj jaroj konsumis ĉ. 50 mil abonojn jare. Sian senzorgan ekziston la gazetoj pagis per ideologia tributo, jen tute dominantaj (*Paco*), jen apenaŭ senteblo (*Juna Amiko*).

Sed la Berlina muro falis. Disfalintaj brikoj frakasis la gazet-forcejon. Komenciĝis dolora periodo de adaptiĝo aŭ agoniado. Eble duono de la revuoj ne plu aperas. Plej bedaŭrinde estis, ke *Hungara Vivo* — la sola ori-

ent-eŭropa kulturgazeto en Esperanto — “fermis la butikon” post la 30-jara ekzisto. La redakcio ne povis “teni la revuon en la ĝisnuna formo”, ĉar el 2 mil abonantoj (el ili ĉ. 1 mil en Sovetunio) restis nur(!) 500.

Tamen orient-eŭropaj esperantistoj — ne plu dekmiloj, sed ja miloj — daŭre prezentas certan merkaton, kiu “ne toleras la vakuon”.

Kelkaj asociaj gazetoj ne malaperis, sed mizeriĝis aspekte kaj amplekse. La abonantaro de *Bulgara Esperantisto* ŝrumpis de 6500 al 300; el ĉiumonata ĝi iĝis trimonata.

Troviĝis pluraj riskemuloj, kiuj enmondigis provnumerojn de novaj gazetoj, sed nur kelkaj atingis relativan sukceson (eŭfemismo por “restis vivaj”).

Iuj, kiel *Ruslanda Esperantisto* kaj *Kroata Esperantisto* (heredintaj la nomojn el la pasinteco), provis vivteni sin per enlandaj abonantoj, sed ili devis ĉesi, sen alilandaj kotizoj kaj sen subteno ekstera.

Aliaj, kiel *Eventoj*, *Litova Stelo*, *La Ondo de Esperanto*, serĉis abonantojn ankaŭ en la okcidenta merkato. Sed la internacia merkato estas saturita, kaj por nova gazeto aliregiona estas malfacile trovi multajn abonantojn en la pli riĉaj landoj de la Okcidenta Eŭropo, Norda Ameriko kaj Orienta Azio.

Cetere, se temas pri abonantoj, vidu la eldon- kaj abon-kvantojn de kelkaj gazetoj internaciaj kaj naciaj por la jaro 2006.

Internaciaj gazetoj

Titolo	Eldon- kvanto	Abon- kvanto	Landoj kun plej multaj abonantoj
Esperanto	5500	4089	Francio 396
Monato	1900	1700	Germanio, Francio, Belgio, Usono, Japanio
Heroldo de Eo	1100	1000	Svislando 200
Kontakto	1100	893	Francio 95, Hispanio 83, Brazilo 63, Usono 48
Sennaciulo	1000	850	Francio 320, Japanio 102, Brazilo 64
Literatura Foiro	850	750	Pli ol 100 al PEN-Centroj
Juna Amiko	1100	700	Italio 90, Hungario 70, Francio 60, Brazilo 50
Espero Katolika	1000	675	Ĉeĥio, Italio, Germanio
TEJO-Tutmonde	800	626	Francio 68, Germanio 54, Ruslando 38
Internacia Pedagogia			
Revuo	800	596	Germanio, Italio, Brazilo
La Ondo de Eo	700	545	Ruslando 93, Pollando 66, Germanio 44

La Gazeto	360	280	Francio 61, Germanio 27, Nederlando 25
La Kancerkliniko	300	?	Francio, Belgio, Usono
Femina	500	200	Svislando, Japanio
Naturista Vivo	90	90	Hungario, Francio, Pollando

Landaj gazetoj

**Titolo (lando, se necese) Eldon- Abon- Eksterlandaj abonoj
kvanto kvanto**

La Revuo Orienta (Japanio)	1800	1315	8 ekster Japanio
Esperanto aktuell (Germanio)	1400	1000	100 ekster Germanio (ĉefe Aŭstrio)
L'esperanto (Italio)	?	950	
La Lanterno Azia (Koreio)	1000	835	6 ekster Koreio
Le Monde de l'Espéranto (Francio)	1000	700	50 en Kanado kaj kelkaj diverslande
La Espero (Svedio)	?	550	kelkaj ekster Svedio
Starto (Ĉeĥio)	660	500	2–3 ekster Ĉeĥio
Horizontaal (Flandrio)	600	400	50 en Nederlando
Tempo (Kroatio)	550	352	
Esperanta Finnlando	400	350	50 ekster Finnlando (kun donacoj)
Bulgara Esperantisto	320	300	nur en Bulgario
Pola Esperantisto	300	280	40 ekster Pollando
Litova Stelo	600	245	100 ekster Litovio
REGo (Ruslando)	250	210	15 ekster Ruslando

La redakcioj (redaktoroj) de aliaj gazetoj ne respondis.

Tro da fokoj, maltro da ĉasistoj

Antaŭ pli ol dek jaroj la slipara katalogo de Rondo Takács registris **10 mil 440** Esperanto-gazetojn kun pli ol 37 mil jarkolektoj (*Periodaĵoj*, 1993, №1, pĝ. 2). Kiu scias, kiom da Esperantaj periodaĵoj ekzistas nun? La adresaro de *Eventoj* (1993) enhavis 188 erojn. La katalogo de UEA (1988/89) mencias 108 titolojn. Sed oni povas facile aldoni kelkajn dekojn da pliaj gazetoj. Kredeble, ne malpli ol 250 periodaĵoj nun aperas.

Kion signifas 250? Plejparte temas pri lokaj bultenoj, mizeraspektaj, parte nacilingvaj kaj apenaŭ periodaj. Por miloj da iliaj abonantoj tio sufiĉas.

Estas naive kredi, ke ili subite ekabonos al pli grava internacia, kultura aŭ socia gazeto. Por tio necesas altigo de la lingvo-scio, vastigo de la intereso, pli granda mon-investo (bultenojn oni ne abonas sed ricevas kontraŭ la membro-kotizo) kaj sufiĉa tempo por konsumado de *ankoraŭ unu gazeto*: pli ampleksa, pli ofta, pli komplika lingve kaj teme. Kaj en tiu gazeto ili ne plu legos pri la kara grupo, ili trovos nek konatajn nomojn, nek informojn nacilingvajn.

La transiro povas okazi ne dank' al, sed malgraŭ aŭ preter la ekzistantaj bultenoj.

Temas ne pri konkurenco, sed pri ekzisto de dunivela esperantistaro, kiun oni dividu ne je komencantoj (por kiuj la lokaj bultenoj) kaj lingvo-rutinoj, sed prefere konsiderante engaĝitecon en la vivo esperantista.

Nur unu ekzemplo, por ne esti teoria. En mia urbo Jekaterinburg loĝis veterano, sperta esperantisto N. K., kiu lernis la lingvon antaŭ 70 jaroj, kontentige parolis ĝin kaj ĉiujare faris du-tri vizitojn al la urba klubo kutime je la Zamenhofa tago, kiam li aĉetis librojn kaj pagis sian kotizon. Neniam lin interesis gazetoj sociaj aŭ kulturaj en Esperanto, ĉar “ekzistas ja multaj ruslingvaj”, sed nur unu informilo movada... En la najbara urbo Permo juna pentristo L.P., hazarde kontaktinta Esperanton, tuj konceptis ĝin sia arta esprimilo kaj, fascinita de poemoj de War-inghien en *Literatura Foiro*, li ekverkis mem, neniam partopreninte la lokan kluban vivon, nek leginte movadan bultenon. Similajn ekzemplojn ĉiu povas rememori.

En 2006 UEA anoncis aboneblon por 37 gazetoj. Landaj perantoj anoncas kutime ĉ. 20 gazetojn. Por la kvardeko da periodaĵoj perataj internacie ekzistas limigita legantaro, apenaŭ superanta 20 mil personojn. Penetri en tiun merkaton eblas nur malfacile: jen okupinte merkatan niĉon, jen investinte grandan sumon por reklamo, jen atutinte per malalta prezo.

Ankaŭ la menciita kvardeko neniel estas modela. Eble nur dek gazetoj internaciaj (*Esperanto, Femina, Kontakto, La Espero Katolika, La Ondo de Esperanto, Literatura Foiro, Monato*) kaj naciaj (*Esperanto aktuell, Le Monde de l'Espéranto, Litova Stelo*) estas redaktataj kaj produktataj profesie aŭ profesinivele (mi arbitre elektis dek, sed eblas iomete longigi la liston). En la ceteraj facilas trovi unu aŭ plurajn mankojn...

Internacieco, ĉu avantaĝo aŭ malavantaĝo?

Ekzistas objektiva faktoro, bremsanta populariĝon de la Esperanta gazetaro — la diaspora karaktero de la Esperanta komunumo. Pro tio niaj gazetoj ne estas disportataj ĉiumatene al la abonantoj, nek vendataj en kioskoj. Probable, se ĉiuj esperantistoj loĝus en la sama urbo ili havus eĉ tagĵurnalon (ankaŭ radion, televidon, teatron, lernejojn, infanvartejojn...), sed nun oni devas uzi poŝton — tio estas multekosta kaj malrapida. Eble necesas pli atente studi la sperton de aliaj internaciaj diasporaj grupoj naciaj (judoj, romanoj) kaj nenaciaj (hobiaj, fakaj...) por havi pli adekvatan koncepton pri nia gazetaro kaj ties problemoj, ĉar komparado kun grandaj naciaj kaj internaciaj gazetoj ne multe helpas.

Amatoreco — nia ĉefa plago

Estas ankaŭ subjektivaj faktoroj. Ni menciis, ekzemple, nekonsideron de la merkato ĉe multaj el niaj gazetoj. Ege negative efikas ankaŭ amatoreco, precipe nun, kiam la komputiloj kaj ofsetaj presiloj ebligas preskaŭ al ĉiu entuziasmulo nemultekoste aliĝi al la gildo de la esperantistaj redaktoroj. Poste oni povas de tempo al tempo investi tolereblan sumon el propra poŝto por presi du- aŭ tri-foje en la jaro pliajn cent ekzemplerojn kaj daŭre nomiĝi ĉefredaktoro de — ĉiel plorinda, sed ja aperanta — “gazeto”.

Inter la ceteraj negativaĵoj ni emfazu ankoraŭ kelkajn:

Manko de kohera redakto-politiko, el kiu fontas nesufiĉa identeco de l' gazeto.

Bagatela enhavo, ofte ripetata en pluraj gazetoj: estas normale, ke multaj movadaj periodaĵoj informas pri la universala kongreso, sed krom la bazaj informoj aperu ankaŭ komentario laŭ la gazeta profilo, ne priskribo de la “giganta paeljo” en Valencio.

Malbona lingva nivelo kaj abundaj komposteraroj, pro nesufiĉa aŭ neniulingva reviziado kaj provlegado.

Manko de spertaj redaktoroj kaj kunlaborantoj, plejparte pro nekontentiga kompenso (kiu ne nepre estu materiala) de ilia laboro. Ofte asociajn gazetojn redaktas ne kompetentuloj, sed tiuj, kiuj afable konsentas esti redaktoro por unu-du jaroj inter la kongresoj de la asocio.

Nestabila eldonritmo kaj tro da duoblaj kajeroj.

La listo daŭrigeblas, sed estas klare, ke la amatoreco estas la ĉefa inter ili, kaj ke nur profesiigo povas mildigi la efikon de la amatoreco.

Reto: ĉu vere (mal)amiko?

La progresanta komputil-tekniko efikas dumaniere al nia gazetaro.

Unuflanke, la redaktado kaj pres-pretigado fariĝis pli facila kaj pli malmultekosta. Pli da gazetoj povas aperi, kaj pli da amatoroj kapablas teknike fari gazeton. La reto ebligas rapidan internacian kunlaboradon, tujan ricevadon de informoj kaj fotoj. Oni povas redakti la gazeton en unu lando, kie estas bona redaktoro, kaj eldoni ĝin en alia kun malpli kosta presejo aŭ pli favora poŝta tarifo. Ĉi tion faras, interalie, la Esperanta Civito, *La Ondo*, kaj UEA. Ekzemple, *Kontakto* estas administrata en Nederlando, redaktata en Ukrainio (antaŭe en Usono) kaj presata en Pollando.

Aliflanke, la reto ebligas disvastigi informojn pli rapide kaj malpli koste ol la tradicia gazetaro. Pro la malapero de *Eventoj* kaj de *El Popola Ĉinio* kelkaj ekparolis pri baldaŭa morto (aŭ pri enretiĝo) de la papera Esperanta gazetaro, ĉar la ret-informoj sufiĉas. Tamen tio ne okazis. En aprilo 2007 neniuj el la ses redaktoroj de la plej gravaj Esperanto-gazetoj, intervjuitaj de *La Ondo* nomis la reton inter la problemoj (sed la poŝtaj tarifoj estis nomitaj de kelkaj).

Ankaŭ la nacilingva gazetaro kontentige fartas. La reto, simile al radio kaj televido, kiuj liveras informojn pli rapide kaj malpli koste ol la gazetoj, ne elpuŝis la tradiciajn gazetojn, kiujn pli damaĝas ne la reto, sed senpagaj reklamgazetoj, kiuj ne plu aperigas nur reklamojn kaj TV-programojn, sed ankaŭ artikolojn, amuzaĵojn kaj eĉ poemojn.

La reto, same kiel radio kaj televido, pruviĝis bona rimedo por reklami la gazetaron. En Esperantujo, kie la radio kaj televido estas malpligravaj ol en la “Granda Mondo”, ĉi tio bone rimarkeblas. En dissendolistoj kaj forumoj estas prezentata la enhavo de gazetoj. Multaj gazetoj havas senpagajn retejojn kun novaj kaj malnovaj artikoloj. *La Ondo de Esperanto* kaj *Monato* ofertas aboneblajn pdf-versiojn, sed la nombro da ret-abonantoj ne estas granda malgraŭ malaltaj kotizoj — la publiko preferas la tradiciajn gazetojn. Kaj, tute freŝdate, *La Ondo* lanĉis podkastan servon, kiu popularigas la revuon. Entute, inter la gravaj gazetoj nur *El Popola Ĉinio* enretiĝis, sed, se la redakcio de *EP*, estus memstara, tio, verŝajne, ne okazus.

Lastatempe aperis nova fenomeno: iuj legantoj revenas al tradicia papera abono post provado de la reta. (En BET-43 en Ŝiauliai belga abonanto faris alpagon por la papera abono de *La Ondo*, ĉar li “ja elprintas la revuon post la ricevo de la revuo en la formato pdf”.)

Krom la rapideco de informado estas bezonataj aliaj aferoj, kiujn la reto mem ne donas. Elektado de informoj aperigendaj, redaktado, provlegado, grupigo de informoj, verkado de (sub)titoloj kaj foto-subskriboj, enmeto de ilustraĵoj estas same malfacilaj en la reto, kiel en la papero, kaj por multaj tekstoj rapideco estas malpli grava — artikoloj ĝeneralaj kaj fakaj, prilingvaj, recenzoj, poemoj kaj noveloj povas aperi en paperaj gazetoj iom malpli frue ol en la reto, sed pli bone pretigitaj. Ĉiuokaze, ne la reto kaŭzis la ĉeson de *Fonto* aŭ *Iltis-Forumo*, kiuj malhavis urĝajn informojn.

Paradokse, pro la reto suferis ne novaĵ-rubrikoj, kiel iuj misprognozis, sed diskut-paĝoj, kaj en esperantistaj dissendolistoj, novaĵoj estas malpli multaj ol polemikaĵoj, dum en la tradiciaj gazetoj estas male.

Krome, dum la paperaj gazetoj, almenaŭ la plej bonaj el ili, danke al redaktado kaj provlegado prezentas bonan lingvaĵon kaj, pretercele, havas lingvo-instruan efikon, la reta lingvaĵo (ne nur en Esperanto, sed ankaŭ nacilingve) ofte estas fuŝa.

Kelkaj konsideroj

Neniu prelego, artikolo, seminario aŭ decido povas radikale ŝanĝi la situacion. Malgraŭ la reto, la rolo de la gazetaro restas grandega. La interna vivo de la esperantistaj organizoj neprigas regulan informadon, kaj tro multaj organizoj strebas havi por tiu informado propran revuon... Kaj la konata alvoko “Ni bremsu papersvarmon!” ne povas havi iun efikon.

Kelkaj subaj konsideroj eble estas utilaj al la komencantaj redaktoroj kaj asociaj funkciuloj:

1. Necesas klare distingi inter **bulteno**, priservanta iun celgrupon, kaj **gazeto**. Merkata esploro povus evitigi fiaskon, aŭ eĉ rezigni la planon pri gazeto favore al bulteno laŭnecese eldonata en amplekso bezonata.

2. Ĉiu gazeto klare difinu siajn proprajn kultur- kaj redakto-politikojn, siajn proprajn terenon kaj profilon. Kaj poste oni daŭrigu kaj subtenu tiun propran unikecon. Ŝanĝoj necesas, sed ne necesas ke ĉiu nova redaktoro ŝanĝu la koncepton pri la gazeto.

3. Egala atento pri la enhavo kaj aspekto estas baza kondiĉo por la gazeto, kiu intencas progresi kaj konkurenci internacie.

4. Sen kompetenta fakulo amatoroj ne povas fari bonan gazeton. Ideale oni havu profesion redaktoron. Sed manke de taŭga kandidato oni ne timu konsulti fakulon; poste la investo revenos per novaj abonoj al pli konkurenca gazeto. Ne preterlasu okazon perfektigi, se aperas eblo en formo de kurso, staĝo aŭ seminario (la asocio, ne la redaktoro, pagu la kuroskotizon). Estas multaj nacilingvaj fakaj libroj, sed oni studu ankaŭ la esperantlingvan *Manlibron pri ĵurnalismo* de Stefan Maul kaj Judith Junger.

Oni havas sufiĉajn eblojn perfektigi mem aŭ perfektigi sian gazeton. Sed unue oni konsciiĝu pri la neceso de tiu perfektigo. Ke tiu neceso estis sentebla antaŭ preskaŭ 100 jaroj, montras la felietono de Czesław Kozłowski, aperinta en *La Ondo de Esperanto*, per kiu mi finas la hodiaŭan revuadon.

Aleksander Korĵenkov

Czesław Kozłowski

Pri Esperanta Gazetaro

Mi komencas per demando: ĉu ekzistas esperantisto, kiu *neniam* estus havinta la intencon eldoni gazeton? Nu, ekzistas nenia dubo, ke tia fenomeno ankoraŭ ne naskiĝis. Se iu esperantisto diras, ke li *neniam* deziris eldoni ĵurnalon, tio montras nur la profundan mensogemon de lia karaktero: por mi estas pli facile kredi eĉ tian absurdon, ke li ne verkis poemojn!

Mi estas homo (kaj nenio homa — krom eldonisto por miaj geni-verkoj — estas al mi fremda) kaj esperantisto. Nu... kompreneble ankaŭ mi revis pri eldonado de propra gazeto.

La komenco estis jena:

— S-ro Iksowski, mi volas al vi komuniki gravan aferon.

— Nome?

— Mi intencas de Januaro komenci eldonadon de granda semajna ilustrata revuo. Formato: 76 × 60. Ĉiu numero po 70 ĝis 80 paĝoj. La papero dika, luksa. Ĉu vi konsentas esti mia kunredaktoro?

— Plezure, s-ro Kozlowski. Antaŭ ĉio ni devas elekti titolon. Mi proponas: “*Tempo*”.

— Mi preferus: “*Madagaskara Stelo*”.

— Sed pro kio do *Madagaskara*? Ni ja estas Kievanoj.

— Nu, tio estas pravigebla, ekzemple, per... Cetere, la titolo povas esti “*Stelego*”, aŭ “*Steletio*”, aŭ io simila.

— Eble “*Kvinpinta Stelo*”?

— Estu tiel! Ni povos tion simbole signi per:



La unua estas *kvin*, la dua *pin*, la tria *tas* kaj la kvara — kapo de infaneto, kiu anstataŭ *tero* elparolas *telo*; la tuto kune: *kvinpintastelo*! Genie, ĉu ne?

— Nu, tiu kvara iom similas la konatan anekdoton. Tamen, entute estas nemalbone... Sed, ĉu vi havas monon por la eldono?

— Ho, je diablo! Tion mi tute forgesis! Ha, kiel estas malagrabla! Do, ni devas informiĝi kiom kostos la gazeto... ĝis la revido!

Post unu semajno mi ekscias, ke tia gazeto kostus tro multe. “La revoj dolĉegaj forflugas”...

— S-ro Iksowski, eble ni “hektografus” nian revuon.

— Tio estus ebla en *Madagaskar*. Sed ĉi tie estas malpermesate al privataj havi hektografon.

— Eble, litografi?

— Nu, litografi po 80 ĝis 90 paĝoj ankaŭ ne estas tre malmultekosta afero.

— Jes... Tiaokaze, eble nur 16 paĝoj?

— Konsentite! Sed kiamaniere ni presigus artajn ilustraĵojn? Iom dubinda arteco... litografita!

— Do, sen ilustraĵoj?

— Tamen ĝi kostos kare... kaj versimile ni ne havos abonantojn... La gazeto devos morti post 2 numeroj... Niaj malamikoj malice ĝojos.

— Jes, vere. Kion do fari? Jen, ideo! Ni simple *skribu* nian gazeton!

Postnelonge ni “eldonis” №1 de “*Kvinpinta Stelo*”. Sed, ĉar ĝi estis skribita de s-ro Iksowski kaj de mi, neniu povis tralegi eĉ unu literon, kaj nature neniu volis “malpurigi manon” transskribante ĝin.

Tiamaniere nia entrepreno finiĝis bone, sed kiom da entreprenoj finiĝas malbone? “En la internacia helplingvo Esperanto estas eldonataj *pli ol 200* ĵurnaloj”, triumfe krias propagandistoj. Sed, mi persone opinias, ke grava estas *ne kvanto, sed kvalito*.

Efektive, jen estas ordinara enhavo de kelkaj Esper. gazetoj:

1) *Ĉefartikolo* de la redaktoro, kiu deklaras, ke “kvankame mi solnure de unun semajnon instruiĝas le Esperanto, sed tamen mi nun jam perfekta konas tiu-ĉin mirebla linguo”.

2) *Versaĵo!* Neimageble terura.

3) *Nekrologo*, okupanta duonon da №1. Iafoje versaĵo kaj nekrologo ku niĝas en unu teruregaĵo. Ekzemple, mi legis nekrologon versaĵon, en kiu pro rimo al *vundo*, oni nomis la mortinton... *hundo!*

4) Iu tre naiva sentimentala *novelo*, tradukita per plorige malbona Esperanto, sed kiu tamen prezentas al tutmonda esperantistaro specimenon de “nia belega literaturo”.

5) *Bibliografio*, kiu nur atestas, ke la recenzanto neniam legis la libron recenzatan.

Do! Mi demandas, ĉu ne estus dezirinde, ke niaj tro multenombraj gazetoj kunfandiĝu en kelkaj, sed bonegaj?

Ĉu ne estus dezirinde, ke “*La Ondo de Esperanto*” organizu jenan konkurson:

Oni elektus komitaton el kompetentaj esperantistoj (*ne redaktoroj*) po unu persono de ĉiu gazeto, kiu aperas jam pli ol unu jaron. Ili devus plej atente enregistradi ĉiun gramatikan kaj stilan eraron. La gazeto, kiu enhavos plej malmulte da eraroj gajnus premion por...

— S-ro Kozlowski!

— Mi petas, s-ro Iksowski?

— Ĉu vi jam havas monon por la premio?

— Ho, je diablo! Pri tio mi tute forgesis, s-ro Iksowski...

“Es ist eine alte Geschichte”... (“Estas malnova historio”).

Prelegantoj de la Kongreso



Audrys Antanaitis (1959). En 1982 en Universitato de Vilnius diplomiĝis pri litova lingvo kaj literaturo kaj tuj eklaboris kiel direktoro de la lernejo en la regiono Šalčininkai. Ekde la jaro 1985 laboris en Instituto de litova lingvo kaj literaturo. En 1988 kunfondis litovan junularan komunumon *Lituanica* kaj baldaŭ elektiĝis kiel ĝia prezidanto. En 1990 ekestris fakon pri rilatoj kun eksterlandaj litovoj en Ministerio pri kulturo kaj klerigo. Dum 1997-2000 estis asistanto de kelkaj parlamentanoj. Ekde la jaro 2000 estas ĵurnalisto kaj programgvidanto en radiostacio *Žinių radijas* (Radio de Novaĵoj). En 2003 estis premiita en la konkurso de Litova Ĵurnalista Asocio. Ekde 2004 — programgvidanto en televidĉenoj *Vilniaus televizija*, poste — *5 kanalas*. En 2004 prezidanto

de Litovio honoris lin per ordeno „Pro meritoj al Litovio“. Ano de Litova Ĵurnalista Asocio. Ekde 2007 vicprezidanto de LĴA.

Amaskomunikado en Litovio

La nova amaskomunikado de Litovio jam kalkulas la duan centjaron. En 1863 okupacia registaro de cara Rusio malpermesis gazetaron en litova (latina) skribo. Litova socio neniam paciĝis kun tio, tial ekis fenomeno de „libroportado“, kiam simplaj urbanoj kaj vilaĝanoj ĉiumaniere disvastigis litovajn gazetojn kaj librojn. Rezulte la 7an de majo 1904 cara registaro estis devigita abolicii gazetaran malpermeson. Tiu dato signis kvalitan salton en anima vivo de litovoj, kio grave kontribuis al rekreo de sendependa ŝtato.

Hodiaŭa amaskomunikado de Litovio — gazetaro, interreta amaskomunikado, radio, televido — estas vere multflanka. 4 naciaj televidĉenoj, pli ol 10 naciaj radio stacioj, 4 naciaj kaj pli ol 100 regionaj kaj lokaj gazetoj. Bedaŭrinde, ne ĉiu konsiderindas kiel kvalita socia eldonaĵo aŭ ĉeno. Fakte litova amaskomunikado estas „spicigita“ per bulvardaj elementoj, kiuj garantias grandan eldonkvanton, samkiel popularecon. Tamen litova registaro ne kontrolas amaskomunikadon ĉar amaskomunikado mem havas instituciojn de memkontrolado. Funkcias Etika komisiono de ĵurnalistoj kaj eldonantoj, Etika inspektisto de ĵurnalistoj kaj eldonantoj. Amaskomunikado agas laŭ Etika kodekso de Litoviaj ĵurnalistoj kaj eldonantoj. La ŝtato subtenas nur kultur- kaj klerig- direktan amaskomunikadon. Tiucele funkcias Fonduso por subteno de gazetaro, radio kaj televido. En

Litovio ekzistas ankaŭ parte el buĝeto financata nacia elsendanto — Litova radio kaj televido.

Amaskomunikado plenumas trioblan mision. Ĝi rolas kiel informfonto, diskutejo de civitanoj kaj organizaĵoj kaj protektilo de demokratiaj valoroj. Vere, amaskomunikado en Litovio sufiĉe bone plenumas du unuajn. Tamen en deĵoro de demokratio litova amaskomunikado ankoraŭ forte dependas de influo de posedantoj kaj kapitalo. Do, por ĝia futura perfektigo ankoraŭ restas sufiĉe vasta spaco.



Petras Čeliaskas (1929), litovo, instruisto de matematiko en mezlernejo, nun emerito. Esperantiĝis en la jaro 1957, spertiĝis en tradukado de litova poezio. Ekde 1975 aktive partoprenas en BEToj. Dek unu jarojn (1995 – 2005) estis redaktoro de **Litova Stelo**, ankaŭ redaktis ĉiutagajn informilojn de multaj BEToj okazintaj en Litovio. Verkis libron *De Babelo ĝis Esperanto* (litovlingve, 1989), koncizan historion de la lando *Litovio dum jarcentoj* (2002), Bibliografion de Litoviaj E-eldonaĵoj (2007). Aperigis kelkajn esperantigitajn poemojn de litovaj verkistoj. Honora membro de UEA (1999).

Kontribuo de *Litova Stelo* al formigo de bildo pri la lando

Sub Esperanta firmamento konstante aperas kaj malaperas diversaj landaj periodaĵoj. Kia estas ilia rolo, kial ili lumas tiel mallonge?

Aperante 4 – 6 fojojn en la jaro ili ne povas ludi rolon de ekspres-informiloj. Nuntempe, en la erao de interreto, tio eĉ ne estas necesa. Aliflanke landaj periodaĵoj ne povas preteriri esperantologiajn temojn, sen tio ili ne estus interesaj por E-publiko. Tamen restas ankoraŭ unu tereno, kiun oni ne povas forgesi. Nome – konatigo de tutmonda esperantistaro kun historio kaj kulturo de la lando. En la mondo vagas diversaj mitoj, kiujn iam disvastigas eĉ ĵurnalistoj, kvankam ili devus esti kleraj homoj. Ekzemple, dum la Tutmonda Ekspozicio en Hannover (2000) *Expo Journal* skribis, ke Litovio estas lando de ursoj kaj ke ĉefa trafiko en Litovio estas internaj akvaj vojoj(!). Oni povas citi pli multe da similaj absurdaĵoj.

Feliĉe inter esperantistoj estas sufiĉe da scivolaj homoj, kiuj interesiĝas pri aliaj landoj. La revuo *Litova Stelo* dum lastaj 18 jaroj konstante strebis kontentigi ilian scivolemon. En la revuo aperadis artikoloj pri his-

torio kaj kulturo, pri vizitindaj lokoj, pri litovaj verkistoj kaj tradukitaj fragmentoj de iliaj verkoj. Legantoj interesiĝis pri religio de antikvaj lito-voj, pri historio de litova lingvo. La revuo akiris konstantan rondon de amikoj, kiuj ne nur interesiĝis pri la lando, sed ankaŭ vizitadis ĝin.

Bedaŭrinde, kontribuo de la revuo al formigo de bildo pri la lando estas tre limigita pro ĝia malgranda eldonkvanto. Ricevante nenian ŝtatan subtenon, la revuo ne povas pli vaste reklami sin. La ŝtato elspezas grandajn monsumojn por formigo de bildo pri la lando en eksterlandoj, sed ne trovas monon por *Litova Stelo*, kiu faras la saman laboron inter esperantistoj.



Barbara Pietrzak (1944), polino. Ĵurnalisto ekde la komenco de la profesia laboro ligita kun la E-Redakcio de *Pola Radio*, en kiu ŝi laboris — kiel redaktoro, komentisto, publicisto kaj sekve Estro de la Redakcio — preskaŭ tuj post studoj pri la pola lingvo en porinstruista altlernejo. Kunlaboranto de la periodaĵo de la Pola E-Junularo **Tamen** (1962-1965), redaktorino de unu jarkolekto de **Pola Esperantisto** en la 80-aj jaroj, **Bulteno** de la pola IKUE-sekcio en la 90-aj jaroj. En sia profesia rikolto ŝi havas i.a. plurajn tradukojn de la pola literaturo en E-on, artikolojn kaj felietonojn, ciklajn magazinojn dediĉitajn al kulturo, sociaj demandoj, E-movado, raportaĵojn pri E-aranĝoj landoj kaj eksterlandaj, intervjuojn kun mezaj kaj elstaraj figuroj de la E-movado. Plurfoje la E-movado, la kreinto de la lingvo, d-ro L.L.

Zamenhof, la historio de E-o en la radiofonio kaj E-gazetaro, kontaktoj kun la monda esperantistaro estis temo de ŝiaj felietonoj, intervjuoj por diversaj programoj de *Pola Radio* kaj en ĝia periodaĵo. Plurfoja raportisto de la Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj gvidantino de la dumkongresaj renkontiĝoj de aŭskultantoj de la E-radiofonioj. Aktuale flanke de UEA, kiel estrarano pri informado ligita kun la envivigo de la projekto info.net. Membro de UEA kaj PEA. Membro de AdE kaj EVA. Ĝenerala Sekretario de UEA.

Esperantlingva radiofonio en interkultura komunikado – sojle de la 50-jariĝo de la E-elsendoj de Pola Radio

Ĉu la poreksterlandaj radioprogramoj, kiel oficiala oferto de konkreta ŝtato povas servi al la interkultura komunikado aŭ servas sole kiel propaganda kanalo de la emisianto? Aparteco de la esperantlingva radiofonio fone de la nacilingvaj programoj (ĉefe laŭ ekzemplo de Pollando). Faktoroj favorintaj ĝian kreskantan rolon en la pozitiva interkultura komunikado.



Claude Nourmont (1945). Laŭ nacieco franca, vivas de pli ol 30 jaroj en Luksemburgio. Magistro pri filozofio (Univ. Aix-en-Provence), licenciito pri psikologio (Univ. Aix-en-Provence), licenciito pri arthistorio (Univ. Parizo). Diplomita pri industria psikologio (Instituto pri Psikologio en Parizo). Laboris en Francio kiel instruistino pri filozofio, kaj kiel instruistino-dokumentistino. De pli ol 40 jaroj agas por diskonigi E-on. Okupis diversajn postenojn en Unuiĝo Franca por E-o (dum multaj jaroj kiel ĝenerala sekretario, poste dum 7 jaroj kiel prezidanto), kaj en TEJO, kie ŝi zorgis pri i.a. seminarioj malfermitaj al ne-esperantistaj organizaĵoj; prezidanto de TEJO inter 1975 ĝis 1977, kaj poste, ĝia honora prezidanto. Dum multaj jaroj estis komitatano de UEA. Prezidanto de LKK por la UK en Montpellier, 1998. Ekde 2004 vicprezidanto de UEA, estrarano pri kulturo, kongresoj,

edukado. Ekde 2003 ĉefredaktoro de **Le Monde de l'espéranto**, dulingva magazino de Unuiĝo Franca por E-o. Redaktoro de la rubriko **Arto de Monato**.

Kiel koncepti magazinon?

Kiel koncepti magazinon, kiu respondu al la nunaj bezonoj?

Necesas unue difini la celitan publikon, kaj sekve la bezonojn tiurilatajn. Ĉu ni celas ekskluzive esperantlingvan (membroj de la asocio kaj aliaj E-parolantoj), ĉu ni celas pli vastan publikon, nacilingvan, komencantojn, interesiĝantojn, kaj aliajn? Ĉu ni celas ekzemple abonigi bibliotekojn, montri la magazinon en ekspozicioj, foiroj, al potencialaj interesiĝantoj?

Post difino de la celita publiko, sekvas la demando: kion ni proponu, kiu adekvate respondu al la atendoj de tiu publiko kaj allogu ĝin.

Pripensenda estas kompreneble la enhavo, sed ne malpli grave la grafika aspekto. Necesas difini la oftecon, la nombron da paĝoj, havante en konsidero la financajn rimedojn.

Koncerne la enhavon, oni difinos diversajn rubrikojn, kaj se temas pri dulingva magazino necesas elekti en kiu lingvo aperigi la rubrikon, kiu celas, ĉu interesiĝantojn, ĉu nur aktivulojn: ekzemple dosieroj nacilingvaj pri temoj rilataj al problemoj kiuj povas interesi ĝeneralan publikon, dulingvaj paĝoj kun traduko de literaturo originala, pure internaj novaĵoj nur en E-o.

La eksteraj aspektoj tre gravas por la sukceso de la magazino. Kiel grafike organizi la magazinon, kaj tute aparte la kovrilpaĝon? Kiel elekti trafan titolon, kiu rilatu al la enhavo (ja temas pri E-o) kaj ne estu nur pri E-o (se ni celas la eksteran publikon)? Kial UFE elektis kiel titolon de sia magazino: *Le Monde de l'Espéranto*?

La diversajn demandojn starigitajn ĉi tie ni faris okaze de la preparo de la ĵus citita magazino, kio helpos ilustrati la prezenton.

En la nuna tempo de reta kaj paperŝpara mondo oni ofte starigas la demandon: ĉu paperaj magazinoj plu necesas? Sed se temas pri la koncepto de reta magazino la problemoj ne tiom diferencas de tiuj de papera revuo.



Kalle Kniivilä (1965), finno. Eklernis E-on en 1982. Studis en la universitatoj de Helsinko, Leningrado kaj Lund. Profesia ĵurnalisto ekde 1989, unue en la finnlingva redakcio de la regiona radio en Malmö, suda Svedio, poste ĉe la finna gazeto *Kansan Uutiset*. Moskva korespondanto de *Kansan Uutiset* 1991-92. Ekde 1997 ĵurnalisto ĉe *Sydsvenskan*, la ĉefa taga gazeto en Malmö. En Esperantujo ekde 1985 dum kelkaj jaroj regula kontribuanto al *Monato*. Redaktoro de la oficiala gazeto de TEJO, TEJO tutmonde, 1993-1997. Membro de Loka Kongresa Komitato de la Universala Kongreso en Tampere 1995. 1998-2001 estrarano de UEA pri informado. Verkis la daŭre validajn Gvidliniojn por informado pri Esperanto de UEA, kies lasta frazo estas: „Pli gravas la kvalito ol la kvanto de la informado“. Ekde ĝia fondo en aprilo 2003 redaktas la retan movadan bultenon *Libera Folio*. Edzo de Maria Sandelin, patro de Ville (1995) kaj Alva (1998).

Konformismo en la Esperanta gazetaro

Esperantistoj ofte konceptas sin ĝuste kiel istojn, anojn de ia movado kun komuna celo, kaj kun komuna ideologio, la esperantismo. Aparte klare tiun asertatan komunan ideologion spegulas la E-gazetaro, aŭ almenaŭ grandaj partoj de ĝi.

Unu el la ĉefaj trajtoj de la E-gazetaro tial estas la tendenco konformiĝi al la reganta movada idearo kaj la tradiciaj formoj kaj ceremonioj de la esperantisma aktivado. La E-gazetoj raportas pri ĉiam novaj sukcesoj, kvazaŭ daŭre klopodante konvinki la subtenantojn de la tradicia esperantismo, ke pravas nur ili, kaj se eksteruloj ne favore sintenas al E-o, tio okazas pro la blindeco de la cetera mondo.

Tia sinteno al la ĉirkaŭa mondo pensigas pri la funkciado de partia gazetaro en unupartia, totalisma ŝtato: ekzistas unu anticipe difinita vero, pri kiu oni volas konvinki la tutan mondon. Tamen la ĉefan fortostreĉon la E-konformisma gazetaro faras, klopodante konvinki la propran publikon pri la praveco de la reganta ideologio, kaj ŝirmante ĝin de malicaj kritikoj de eksteruloj.

E-ujo kompreneble feliĉe ne estas totalisma ŝtato, sed en la E-lingvaj amaskomunikiloj evidentas la tendenco al konformismo anstataŭ multflanka prilumigo de movadaj evoluoj kaj strebado al objektiveco. Sed kio estas objektiveco, kaj ĉu eblas ĝin atingi?



István Ertl (1965), hungaro/franco loĝanta en Luksemburgio. Instruisto, tradukisto. En 2002-2003 informoficisto de Eŭropa Reto Kontraŭ Rasismo (Bruselo), de 2003 tradukisto ĉe la Eŭropa Revizora Kortumo. Redaktis la revuojn *Internacia Pedagogia Revuo* (1987-1991), *Opus Nigrum* (1987-1990), *Kontakto* (1990-1991) kaj *Esperanto* de UEA (1992-2001). Kunfondis en 2003 la retan bultenon *Libera Folio*. Unu el la tri redaktoroj de *Beletra Almanako*, konstanta kunlaboranto de *La Ondo de Esperanto*, multjara kontribuanto al *Monato*. Komitatano de UEA ekde 2004, membro de la Elekta Komisiono (2005-). Estrarano de Tutmonda Ĵurnalista Asocio (2006-) kaj de Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (2005-), komitatano de Esperantlingva Verkista Asocio (2007-), sekretario de Fondaĵo Grabowski (2008-). Edzo de Fabienne Berthelot, patro de Klára (1995), Ruben (1997) kaj Dorián (2003).

Interreto: La defioj de tuj-ĵurnalismo

Pro la apero de **Interreto**, la profesio de ĵurnalisto en la lasta jardeko ŝanĝiĝis eble pli ol en tuta jarcento antaŭa. En la radiko *ĵurnal'*, kaŝigas la ideo de „tago”, sed ĵurnalisto nuntempe devas esti, se tiel diri, „minutisto”. La du ĉefvortoj malantaŭ la ŝanĝegoj estas: „ĉie” kaj „tuj”. Informoj estas nun, praktike, ĉerpeblaj de **ĉie** kaj alireblaj **ĉie** (kompreneble, la limigoj al tiu ĉieo meritis alian prelegon), kaj **tuj** kiam ili estas produktitaj (eĉ -ataj).

La **kvanto** de informoj tutmonde fluantaj kreskis kaj kreskas. Sed ĉu temas pri esenca, enhava multiĝo, aŭ ĉu grandparte pri sterila akumuliĝo de informoj, ofte samfontaj? Kio stiras kaj difinas tiujn inform**fluojn**? Ĉu la plimultiĝo pli koncernis inform-perilojn kaj informsurfacojn ol enhavojn mem?

Ankaŭ la **kvalito** de la monda informaro levas demandojn. Informproduktiloj iĝis tiom pli facile **alireblaj** ke principe ĉiu povas sin improvizi ĵurnalisto. Sed kiel garanti tiukaze la kvaliton? Kaj eĉ por profesiuloj, ĉu la imperativo de tujeco ne ŝovas al la fono tradiciajn virtojn de precizemo kaj zorga kontrolado?

Interreto ebligis al la inform-konsumanto **fariĝi aktiva rolanto** de la informada procezo. Legantoj povas, same ĉie kaj tuj, aldoni siajn scierojn kaj komentojn al informproduktoj. Aperis novaj ĝenroj kiel blogoj kaj komunumaj retejoj, siavice ekfunkciantaj kiel informfontoj.

La reto favoras **multlingvecon**, ĉar malaltiĝas la investo-sojlo por novaj produktoj en lingvoj eĉ malmulte uzataj. Aldone, informfontoj multlingviĝas – sed, interese, ĉi tio ŝajnas malpli okazi ol la plinombriĝo de informiloj ene de la unuopaj lingvoj.

Kiel ĉi tiuj fenomenoj efikas kaj esprimiĝas **en Esperantujo**? Kiajn specifaĵojn havas la komunikilaro nialingva? La dua duono de la prelego prilumos tion per konkretaj ekzemploj.



Stano Marček. 55-jara, ekde 2002 redaktoro de la revuo *Esperanto* de UEA. Antaŭe li redaktis la gazetojn *Esperantisto Slovaka* (1985-95), *Esperantista Vegetarano* (1982-97) kaj *Heroldo de Esperanto* (1999-2001). Li tradukis kaj eldonis *La Zamenhof-strato'n* en la slovaka (2006), estas aŭtoro kaj eldoninto de *Esperanto per rekta metodo* (la lernolibro aperis en 18 lingvoj), *Krucenigmoj kaj humuro*, *Instrua Amuzo*, *107 krucenigmoj en Esperanto*, didaktikaj helpiloj, KD-oj kun voĉlegitaj fabeloj (Andersen, fratoj Grimm...), DVD Aŭdo-vida konversacia kurso de E-o. En la jaroj 1986-1995 li estis manaĝero de la en tiam Ĉeĥoslovakio tre fama rokmuzika grupo *Teamo*, kiu eldonis diskon ankaŭ en E-o kaj koncertis dum la UK en Brajtono, IJK en Kerkrade kaj SAT-Kongreso en Illertisen.

100 jaroj de la revuo *Esperanto*

En la jaro 2005 la revuo *Esperanto*, la nuna oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, kaj la plej grava, plej legata E-periodaĵo, fariĝis 100-jara. Se ni konsideras la paŭzojn, dum kiuj ĝi ne aperis, dum la 1-a kaj 2-a mondmilitoj, ĝi aperas jam plenajn cent jarojn.

La gazeton fondis en la jaro 1905 nur 24-jara franca junulo Paul Berthelot (Paŭlo Bertelo, pseŭdonime Marcelo Verema), iom ekstravaganca anarkiisto, iniciatinto de plia E-gazeto, *Internacia Socia Revuo*. La unua numero de *Esperanto* aperis la 18-an de junio 1905 en la sudfranca urbeto Céret, proksime de Perpignan. Ĝi estis tiam grandformata (48x34cm), dulingva gazeto, en E-o kaj en la franca, kaj estis „aĉetebla en ĉiuj francaj kaj svisaj stacidomoj“. Berthelot eldonis *Esperanton* nur du

jarojn: en 1907 li transdonis ĝin, pro ekonomiaj kialoj, al Hector Hodler en Ĝenevo, kaj mem elmigris al Brazilo, kie li post tri jaroj, en la aĝo de 29 jaroj, mortis pro ftizo. En la jaro 1908 Hector Hodler fondis UEA kaj la gazeto fariĝis ĝia oficiala organo.

Ĝis la jaro 1914 la gazeto aperis du-foje monate en granda formato kaj ĝia ĉefa ideo estis „harmonia kunlaboro de ĉiuj popoloj pere de Esperanto”. Hector Hodler estis la posedanto kaj la redaktoro ĝis la jaro 1920, kiam li mortis kaj la revuon heredis, kune kun la biblioteko de Hector Hodler kaj monsumo por kovri eblajn defecitojn, UEA. La biblioteko de UEA portas la nomon laŭ ĝia fondinto. La nova redaktoro tiam fariĝis Edmond Privat, kiu fidele sekvis la tradicion de la revuo igi ĝin tribuno de plej noblaj ideoj. Dum sia 100-jara vivo la revuo havis dudekon da redaktoroj:

1905 - 1907: Charles Lambert, franca univ. profesoro, brila propagandisto kaj kursgvidanto (la posedanto estis tiam Paul Berthelot). 1907 - 1920: Hector Hodler, sviso, kunfondinto kaj iama direktoro de UEA, filo de la fama pentristo Ferdinand Hodler. 1920 - 1934: Edmond Privat, francilingva svisa e-isto, doktoro pri historio, docento ĉe la Ĝeneva Universitato, ĵurnalisto, historiisto kaj iama prezidanto de UEA, fervora propagandisto, oratoro, verkisto. 1934 - 1942: Hans Jakob, germandevena sviso, studinto de komerco, direktoro de la CO, redaktanto de *Oficiala Jarlibro de la E-movado*. 1936 - 1940: Teo Jung, germana ĵurnalisto, ankaŭ nederlanda civitano. Redaktoro kaj fondinto de la gazeto *Heroldo de Esperanto*, verkisto, eldonisto. 1940 - 1947: Cecil Charles Goldsmith, angla e-isto, iama oficiro en brita armeo, vundita en Francio. Organizanto de E-kongresoj, direktoro de *Esperanto Publishing* kaj de CO de UEA, sekretario de tri UK-oj. Mason Stuttard: brita e-isto, aŭtoro de lernolibro *The Esperanto Teacher* kaj kunaŭtoro de *Nelsons Esperanto Course*. 1846 - 1946: Denove Hans Jakob. 1947 - 1954: Hans Jakob kaj Mason Stuttard. 1955: Reto Rossetti, svisa, poste brita e-isto, profesoro, E-poeto (*Kvaropo*) kaj tradukisto el la angla *Otelo* de Shakesperare), kunredaktoro de *Angla Antologio* (kun W.Auld). 1955 - 1958: William Auld, skota poeto en E-o, profesie licea vicdirektoro, redaktoro de pluraj E-revuoj (*Monda Kulturo*, *Norda Prismo*, *La brita esperantisto*, *Fonto*, kunlaboranto kun *Monato*). Aŭtoro de poemaroj (*La infana raso*), antologioj (*Angla Antologio*), kantaroj kaj lernolibroj (*Paŝoj al plena posedo*), prurfoje proponita al Nobel-premio. 1958 - 1960: Kirsten Zacho (kun helpo de H.V. Rasmussen). 1961

- 1962: William Auld. 1963 - 1973: Victor Sadler (helpredaktoro 1970-73: Akiko Woessink-Nagata), brita lingvisto, direktoro de la CO de UEA, estrarano pri financoj. Membro de AdE. Kiel fonetikisto li partoprenis en la komputila traduk-projekto DLT de la firmao BSO, en kiu E-o ludis kernan rolon. 1974 - 1984: Simo Milojeviĉ, naskiĝis en Bosnio, iama Jugoslavio kaj laboris multajn jarojn en Roterdamo. Li estis membro de AdE, Ĝenerala Direktoro de la CO, laboris profesie ĝis sia emeritiĝo en 2002 en la CO de UEA. 1984 - 1986 Geoffrey Sutton (en la CO de UEA). 1986: Milojeviĉ, Buller, Fettes. 1987 - 1991: Mark Fettes, usonano, studinta en Britio, ĵurnalisto, doktoro pri edukado, estis estrarano de UEA, instruis E-on ĉe la Ŝtata Universitato de San-Francisko, direktoro de ESF, Fonduso por Esperantologiaj Studoj. 1992 - 2001: István Ertl, hungaro, jardekon loĝinta en Roterdamo, nun en Luksemburgio, instruisto, verkisto kaj tradukisto de la Eŭropa Revizora Kortumo, kunfondinto de la reta gazeto *Libera Folio*. Ekde 2002 la revuon redaktas Stano Marĉek.



Jukka Pietiläinen (1966). Doktoro pri sociaj sciencoj (ĵurnalistiko, Universitato de Tampere, 2002). Lia disertacio temis pri evoluo de regionaj gazetoj en Ruslando ekde 1985 ĝis 2002. Li havas ĵurnalisman edukon, sed nur malmulte laboris kiel ĵurnalisto en diversaj finnlandaj gazetoj kaj revuoj. Nuntempe li esploras Ruslandan socion kaj ĵurnalistikon en Aleksanteri-instituto de Universitato de Helsinki. Li estas aktiva e-isto, eksa prezidanto de E-Asocio de Finnlando, kaj ankaŭ publikigis parton el siaj sciencaj verkoj en E-o.

Nuntempaj defioj al internacia ĵurnalismo

La tradician ĵurnalismon minacas diversaj novaj fenomenoj. Interreto ebligas al interesitoj havigon de pli plena kvanto de informoj el iu specifa temo ol ebla al neniu gazeto. Nur lingvoscio estas la sola limigo al tiuj, kiuj havas aliron al la reto. Ĉu la gazetaro tiel perdas sian pozicion kiel perantoj inter publiko kaj informfontoj?

Transnaciaj televidaj novaĵoj strebas doni senton de samtempeco kaj ĉeesto, sed ofte novaĵojn tie prezentas paraŝutaj ĵurnalistoj, kiuj ofte ne havas kompletajn fakajn konojn pri lokoj pri kiuj ili raportas.

Por publiko eblas senti ĉeeston, sed ĉu ĝi lernos ion aŭ informiĝos kial es-

tas grava ke ĝuste de tie oni raportas. Krome tia raportado gvidas elekton de novaĵoj al lokoj, kien eblas iri facile kaj de kie eblas krei senton de ĉeesto.

Memreguligo kaj etiko en ĵurnalismo

Ĵurnalisma etiko estas aparta formo de aplikata etiko, kiu donas gvidliniojn al agado de ĵurnalistoj. Kial ĵurnalisma etiko evoluis kaj kial estas bezonata aparta etika regularo al ĵurnalistoj? Ĉu ĵurnalisma etiko estas necesa elemento en ĵurnalismo aŭ ĉu eblas vivi per reguloj de ĝenerala etiko? Kion leĝoj de divasaj landoj diras pri etikaj principoj de ĵurnalismo? Ĉu ĵurnalisma etiko estas universala aŭ ĉu ekzistas regionaj variaĵoj en ĝi? Kiel etika regularo de E-ĵurnalistoj rilatas al la ĝeneralaj principoj de ĵurnalisma etiko?

La prelego celas respondi al tiuj demandoj surbaze de komparo de diverslandaj etikaj kodoj de ĵurnalistoj.



Renato Corsetti. Post unua doktoriĝo en 1964-a pri Ekonomio en la Universitato de Romo *La Sapienza*, kaj post kromaj studoj en la Universitato de Torino pri organizado, ek de la jaro 1974-a okupiĝis pri studoj pri lingvoj kaj aparte pri soci-lingvistiko, pri lingvo-planado kaj pri lingvo-politiko. Li laboris intertempe en itala banko. Poste, ek de la jaro 1980-a, okupiĝas pri esploroj pri infana dulingveco kunlabore kun profesoro T.Taeschner de la Fakultato pri Psiĥologio de la sama universitato. De 1992 ĝis 2000 kunlaboras en la Eŭropa Kunlabor-Projekto por modelo de instruado de fremdaj aŭ duaj lingvoj al infanoj. De la universitata jaro 1991-92 kunlaboras kun la Fakultato de Psiĥologio de la universitato *La Sapienza* de Romo kun instru-taskoj por la temoj: Observado de la Infana Konduto, Laboratorio pri Lingvo kaj Komunikado, Psiĥolingvistiko, kaj fine kiel profesoro pri Psiĥopedagogio de Lingvo kaj Komunikado. Verkis en E-o kaj en la itala pri E-o kaj pri sociolingvistikaj kaj psiĥolingvistikaj temoj.

Inter la reto kaj la papero — situacio de la naciaj E-inform-kanaloj

Unu el la plej grandaj revolucioj en la strukturo de la lernantaro de E-o estas okazanta sub niaj okluloj en ĉiuj ekonomie evoluantaj landoj. La lernantaro en la tradiciaj ĉeestaj kursoj estas daŭre mapli ekzistanta, dum amaseto da homoj trovas E-on en la reto.

Tio kuntrenas inform-kanalojn por ili tute malsamajn ol la tradiciaj paperaĵoj, kiujn oni abonas. Cetere, tio ne estas apartaĵo de la E-mondo.

Statistikoj pruvas la fakton, kiun la aŭtoro ekzempligas per sia filo. Li, plenkreska kaj plenedukita — preskaŭa doktoro pri fiziko, neniam en sia vivo aĉetis paperan ĵurnalon, nek sentas la neceson pri tio. Se li volas informiĝi pri io, li havas sian komputilon.

Do, samtempe nia tradiciaj E-asocioj devas zorgi kaj pri ĉi tiuj junaj esperantistoj, por kiuj pagado de kotizo estas io komplete fremda, kaj pri la malnovaj membroj, por kiuj komputiloj estas io relative fremda, kaj bezonas fizike tuŝi la paperajn revuojn.

La prelego montras la solvojn, kiujn oni utiligas. *El Popola Ĉinio* montris la vojon jam antaŭ jaroj al forigo de paperaj gazetoj favore al retaj informoj. Tiun vojon sekvas ĉiam pli da asocioj. Aliaj asocioj, ekzemple la itala, staras en meza pozicio kaj provas ankoraŭ eldoni la paperan revuon kaj retan informilon. Ankoraŭ aliaj asocioj restas nur paperaj.

Certe ni estas en transira fazo, kiu ĉiam pli evoluos al reta informado.



Roman Dobrzyński (1937), polo. Esperantistiĝis en 1955, studis en la Varsovia Universitato, magistriĝis pri juro (1961) kaj ĵurnalismo (1963) pere de verko *Funkcioj de la Esperanto-gazetaro*. En la sesdekaj jaroj li aktivis en la pola kaj internacia E-movadoj, redaktis la revuojn **Tamen** de PEJ **Pola Esperantisto** de PEA kaj **Kontakto** de TEJO. Sian ĵurnalan karieron komencis en la pola studenta revuo *itd*, 1973-2006 li konstante laboris kiel ĵurnalisto de la unua kanalo de la Pola Televido. Li fariĝis tutpollande konata kiel specialisto pri latinamerikaj temoj. 1980 li estis rekonita de la Asocio de Polaj Ĵurnalistoj la plej bona publicisto pri internaciaj aferoj. Krom amaso da televidaj programoj kaj dokumentaj filmoj li publikigis naŭ librojn pri Hispanio, Portugalio kaj diversaj latinamerikaj landoj. 1987 li ricevis prestiĝan premion *La Argenta Globo* pro sia monografia libro pri Portugalio. En 2003 li publikigis en Litovio sian unuan libron en E-o *La Zamenhof-strato*, kiu sekve estis tradukita kaj ĝis nun eldonita en dek diversaj lingvoj. En 2005 dum la Universala Kongreso de E-o en Vilno li estis nomita honora membro de UEA.

Esperanto — mia profesia pontolingvo

En 1984 mi estis sendita de la Pola Televido al Brazilo kun la celo fari kelkajn dokumentajn filmojn pri tiu lando. Estante en la ĉefurbo Braziljo mi eksciis pri la proksime situata E-edukejo *Bona Espero*. Mi tien veturis kun la

tuta filmskipo kaj restis nur tri tagojn, sed la rezulto de tiu mallonga vizito estis filmo *Angulo de Bona Espero*, kiun oni rekonis kiel la plej interesa el inter ĉiuj aliaj. La laborlingvo de la filmo estis E-o, sed la temo koncernis edukadon de la infanoj enkadre de la helpo por la tria mondo. Do, kvankam la temo tute ne estis E-o, la filmo montriĝis granda poresperanta propagandaĵo.

Tiel hazarde malkovritan metodon, mi poste plurfoje uzis en mia profesia laboro. Ekzemple, en 1989 mi reĝisoris por la Pola TV filmon *La reveno al Finnlando*, en kiu oni rakontis pri la konstruado dum la dua mondmilito de fervojo fare de germanoj trans la polusa cirklo uzante la sklavan laboron de la polaj militkaptitoj. La historion grandparte rakontis en E-o Osmo Buller.

Pli malpli samtempe pere de E-o estis subskribita kontrakto inter la Pola TV kaj la aŭtoritatoj de la provinco Tai Shan en Ĉinio. Rezulte estis produktita komuna filmo, kies ĉefa versio estiĝis en E-o.

En la prelego estos prezentitaj ankaŭ aliaj kazoj de la utiligo de E-o por la profesiaj taskoj.



Dr Seán Ó Riain. Irlanda Diplomato kaj lingvisto. Li laboris dum 28 jaroj en la irlanda diplomatia servo en Aŭstrio, Aŭstralio, Pollando, Germanio kaj ĉe la EU en Bruselo. Lia doktora tezo ĉe *Trinity College, Dublin* havas la titolon *Lingvoplanado en Irlando kaj Québec, 1919-1985*. La irlanda ministrejo pri eksteraj aferoj pruntedonis lin al la Eŭropa Komisiono pro la oficialigo de la irlanda lingvo fare de EU la 1-an de januaro 2007.

Esperanto: Malamiko aŭ amiko de plurlingveco

Multaj ne-esperantistoj opinias, ke E-o estas kontraŭanto de plurlingveco kaj celas anstataŭigi plurajn lingvojn per nur unu — E-o. Ekzemple, en la sola voĉdonado pri E-o, kiu okazis en la Eŭropa Parlamento ĝis nun, la mana voĉdonado pri la raporto Dell'Alba en aprilo 2004, plimulto de proksimume 57% kontraŭis mension de E-o ĉar, por ili, estis „evidente, ke ĝi kontraŭas la plurlingvecon“. Sed la afero havas tute alian flankon.

Serio de eksperimentoj en lernejoj diverslandaj ekde 1921 montris, ke Esperanto helpas la lingvolernadon ĝenerale! La konferenco celis montri kiel, kaj donos konkretajn ekzemplojn.



Aleksander Korjenkov (1958). Li naskiĝis en Kamyŝlov (Ruslando). Laboris kiel inĝeniero en Tjumenjo kaj en Sverdlovsk (1980–1991). Ekde 1991 redaktoro kaj eldonanto. En lia eldonejo **Sezonoj** aperis pli ol cent libroj en kaj pri E-o. La revuo **La Ondo de Esperanto**, kiun li redaktas, atingis en majo 2008 sian 163an kajeron. Ekde 2001 loĝas en Kaliningrado. E-isto ekde 1976. Komitatano de UEA (1995–2004), vicprezidanto (1992–1995) kaj estrarano (1995–2001) de TEJA, prezidanto de REU (1995–1997) k.a. Verkis centojn da artikoloj, eseoj, recenzoj en la rusa lingvo kaj en E-o. Aŭtoro, tradukinto kaj kompilinto de pluraj libroj, i.a. de *Historio de Esperanto* (2005). Fondinto kaj gvidanto de *Radio Esperanto* (2008). Prelegvojaĝis en multaj landoj.

Zamenhof kaj la gazetaro

Zamenhof estis ne nur lingvoaŭtoro, vortaristo, verkisto, tradukanto, movadorganizanto kaj ideologo, sed ankaŭ gazetisto. Li verkis artikolojn pri judaj temoj antaŭ la apero de la *Unua Libro*. Sian lingvon li ekdisvastigis per anoncoj en gazetaro, kaj preskaŭ tuj post la lanĉo de la lingvo li klopodis eldoni E-gazeton. Ne sukcesinte en 1888 en Ruslando pri *La Internaciisto*, li en 1889 iniciatis *La Esperantiston*, kaj estis ĝia redaktoro ĝis la lasta numero (1895). Ankaŭ poste li kunlaboris en gazetoj, interalie, en *Ruslanda Esperantisto*. Dum 1906–1914 liaj verkoj ofte aperis en *La Revuo*. Atentindaj estas lia intervjuo en *Jewish Chronicle* (1907), liaj intervenoj pri naciaj problemoj en *Di Varhajt* (1912) kaj en *Pola Esperantisto* (1914).



Andreas Künzli (1962), lic. phil., nask. en Lucerno, Svislando. Loĝas en Berno. Studis slavan filologion (slavistikon), orienteŭropan historion kaj internacian juron en la Zurika universitato (magistra diplomo en 1992). Liaj tri profesiaj agadkampoj estas filologio-historio, interlingvistiko kaj informadiko (diplomo de retfakulo en 1998). Iniciatis la retujon www.osteuropa.ch kaj realigis dudekon da aliaj retprojektoj. Esperantisto de 1979. Fondis kaj redaktis la lokan E-bultenon **La Lucerna Progreso** (1979–85), estis ĉefredaktoro de **TEJO-tutmonde** (1985–91), kaj redaktoro-parolisto de la E-fako de Svisa Radio Internacia (1986–92). Aŭtoro de Svisa Planlingva Enciklopedio (2006). Kunlaboris/as al diversaj E-revuoj. Fakdelegito de UEA. Membro de Societo por Interlingvistiko (GIL, Berlino). Liaj aktualaj projektoj koncernas germanlingvan biografion pri L.L. Zamenhof kaj disertacion pri la historio de la planlingva movado en orienta Eŭropo. Iniciatis la retujon www.planlingvoj.ch.

Tradicia percepto de la planlingva demando far la svisa gazetaro

La nacilingva gazetaro de Svislando frue interesiĝis pri la demando de neŭtrala universala lingvo kaj ne hezitis raporti pri ĝi. Neŭtralaj universala lingvoj signifis por la samtempoj ĉiam interesan aŭ iom kuriozan objekton, kaj ne mankis ardaĵoj por kaj kontraŭ la afero mem kaj ĝiaj protagonistoj.

La tenoro de la svisa gazetaro rilate al E-o kaj planlingvoj ĝenerale estis pozitiva aŭ bonvola, neŭtrala, informa, scivolema, afabla, respektema, aŭ skeptikema. Negativaj kaj polemikaj kontribuoj estis unuopaj, kompare maloftaj, kaj evidentiĝis, ke ĝiaj verkintoj ofte estis ne sufiĉe serioze dokumentitaj kaj tendencis supraĵe trakti la planlingvan demandon. Kiam la komputiloj kaj la novaj komputilaj lingvoj fariĝis popularaj, ne malofte E-o estis metafore uzata por komputilaj lingvoj. Sed la metafora uzado estas observebla ankaŭ en aliaj kazoj. La prelego celas ilustrati la sintenon de la svisa gazetaro vidalvide de E-o per trafikaj elektitaj ekzemploj tra jardekoj.

Senpagaj novaĵ-gazetoj por labor-pendolantoj — revolucio en Eŭropo kaj en la svisa amaskomunikilaro

Malgraŭ sia malgrandeco, Svislando tradicie estas lando de multaj gazetoj kaj ankoraŭ pli multaj gazetlegantoj. Ekde la jaro 2000 Eŭropon inundas ondo de senpagaj novaĵ- kaj varbgazetoj, kiuj alvenis ankaŭ en Svislando. Ili estas direktataj al la ĉefa celpubliko de la dungitoj kaj vojaĝantoj, „pendolantaj“ inter sia loĝ- kaj laborloko. La financado de tiuj gazetoj okazas pere de gajno el varbado. Dum iuj fakuloj parolas pri vera revolucio en la pejzaĝo de la amasakomunikilaro, aliaj kredas, ke temas pri provizora fenomeno, kiu verŝajne malaperos baldaŭ favore al elektronikaj solvoj. Ankaŭ en Svislando cirkulas nuntempe minimume kvar tiaj etformataj tabloidaj taggazetoj en du lingvoj. La konsumanta publiko kaj la varba branĉo ĝojas pri tiu multpromesa senpaga servo. Aliflanke la tradiciaj gazetproduktistoj staras antaŭ novaj defioj. La prelego celas montri la svisan kazon kaj klarigi, kial tiu nova gazetkoncepto, importita el Skandinavio, ekhavis grandan sukceson en Svislando.



Aleksandro S. Melnikov. D-ro hab., prof., la estro de la katedro pri fremdaj lingvoj de la farm-maŝinkonstrua akademio (u. Rostov-na-Donu). La doktora disertacio traktis la ĉefajn principojn de lingvoplanado, la habilitacia (publikita kiel 631-paĝa ruslingva libro) — lingvan personecon de e-istoj kaj ligojn inter E-lingvo kaj -kulturo. Aŭtoras ruslingvaj popularigan libron pri E-o *Portreto de ideo kun malordinaruloj anstataux la fono...* kaj lernilon *Esperanto por harfenduloj*, E-lingvaj: *Instruado sen turmentado...*, *Esperanto - lingvo de kulturo kaj personeco* k.a. Elplumigis duoncenton da sciencaj kaj centon da ĝeneraltemaj artikoloj, ĉefe ligitaj kun E-o, en deko da periodaĵoj el tri kontinentoj.

Reflektiĝo de la specifa E-kulturo en publicistiko

La preleganto esploris milojn da paĝoj el duoncento da diversstiloj E-periodaĵoj kaj konstatis, ke ĉiuj ili enhavas tekstojn, kiujn ne eblas kompreni/apreci sen specialaj scioj pri la E-kulturo. Temas pri:

Komunaj fonaj scioj de t.n. tipa esperantisto/TE, kiuj ebligas adekvate percepti humuron, ironion, satiron, parodion/travestion, efekton de “trompita atendo”, aludon, konfronton de realo kaj fikcio, “Esperantian” kolorecon, kaŭzas komunan por TE asoci-vekon kaj aliajn efikojn kaj efektojn.

Vortoj kun kultura ingredienco (esperantonimoj), inkluzive specifajn nur por la E-kulturo flugilhavajn vortojn, kiuj estas uzataj kiel:

- a) metaforoj, perifrazoj, komparoj k.a. rimedoj de esprimeco;
- b) transkultura “ponto” inter la “Esperantia” kaj “ekstera” mondoj;
- c) lingva karakterizo de literatura protagonisto;
- ĉ) fonto de nomoj por pli postaj E-kulturaj artefaktoj, inkluzive titolojn de E-periodaĵoj aŭ rubrikaj.



Detlev Blanke (1941). Li estis respondeca sekretario de la E-organizaĵo de GDR (GDREA, 1970-1990), doktoriĝis (1976) kaj habilitaciis (= profesornivela instruarĵto, 1985) pri interlingvistikaj/esperantologiaj temoj ĉe Humboldt-Universitato en (orienta) Berlino, tie havas instrukomision pri interlingvistiko (kiel honoraria docento ekde 1988-). Li estas prezidanto de la leĝe registrita scienca *Gesellschaft für Interlinguistik e.V.* (Societo pri Interlingvistiko, 1991-), verkis multajn studojn, dekon da monografioj, eldonis/redaktis pli ol 30 librojn kaj organizis naciajn kaj internaciajn sciencajn aranĝojn. Li redaktis **der esperantist**, organo de GDREA (1970-1990); redaktas *Interlinguistische Information* (1992-) kaj *Informilo por Interlingvistoj* (1992-); estas membro de la eldonkomitatoj de *Language Problems & Language Planning* (LPLP, 2001-) kaj *Esperantologio - Esperanto Studies* (EES, 1999-) kaj ofte havas kontakton kun diversmediaj ĵurnalistoj.

Informado en lingvistikaj medioj

Lingvistoj profesias pri lingvoj, sekve ilin konsultos sciencaj kaj politikaj decidinfluaĵoj kaj ofte ankaŭ ĵurnalistoj por informiĝi aŭ decidi pri la rolo kaj statuso de E-o (i.a. en lernejoj, universitatoj, eldonejoj, ŝtataj kaj interŝtataj organizaĵoj k.s). Malgraŭ tio la E-komunumo ne havas sufiĉe efikan kaj stabilan strategion, adekvatajn metodojn kaj rimedojn por alfronti la defion. La prelego traktos la specifaĵojn de la lingvista celgrupo kaj klarigas la kialojn de la ofte malakceptema sinteno inter lingvistoj al E-o. La preleganto mencias principojn de fake kaj metode adekvata moviĝo en la lingvistika medio kaj, surbaze de germanaj kaj internaciaj spertoj, prezentos proponojn pri celkonforma informado, kiu rezultigu reciproke fruktodonan kunlaboron inter diversdisciplinaj lingvistoj kaj interlingvistoj/esperantologoj.



Árpád Máthé. Hungaro, doktoro de natursciencoj; emerita docento pri organika kemio kaj kemia teknologio en la ŝtata universitato *Eötvös Loránd* (ELTE) Budapeŝto; emerita scienca ĉefkunlaboranto de Kemia Esplorinstituto de Hungara Akademio de Sciencoj. Lekciisto pri historio kaj movado de E-o en la Filologia Fakultato de ELTE. E-isto de 1956. Redaktoro de ***Budapeŝta Informilo*** (1975 - 1987), ***Kongresa Budapeŝta Informilo*** (1983), ***Periodaĵoj*** (1992-1995), kunredaktoro de *Bibliografio de periodaĵoj en aŭ pri Esperanto*. Prelegserioj pri E-kulturo en landoj Bulgario (1982, 1984), Danlando (1992), Hispanio (1997, 2000, 2007) kaj Slovakio (1978-1982). Prelegis en la Kongresaj Universitatoj en Rotterdam (1988), Brighton (1989) kaj Vieno (1992). Sekcia prelego pri la *Budapeŝta Skolo* en UK 2005 en Vilnius. Kunaŭtoro de du instrukajeroj pri literaturo de E-o en Universitato ELTE (1975-1976), kunlaboranto pri kemio kaj sporto de "Magyar Eszperantó Kéziszótár" (1996), aŭtoro de *Hungara-Esperanta verba vortaro* (2004).

Bibliografio de periodaĵoj en aŭ pri Esperanto

Varba kaj informa roloj de periodaĵoj en la E-movado (*La Esperantisto*, *Lingvo Internacia*, *Esperanto (UEA)*, *Esperanto Triumfonta*, *Heroldo de Esperanto*, *La Praktiko*). Prezento de listoj, katalogoj kaj bibliografio de E-periodaĵoj (G. Davidov, J. Amades, P. Stojan, J. Takács, P. Tarnow). Pe-

riodaĵo-listoj de pluraj gravaj E-bibliotekoj/muzeoj de la Mondo. Agado de kolektantoj de E-periodaĵoj (Ramon Molera, Luis Hernández Yzal, Cesar Vanbiervliet). Bibliografia esploralaboro de Rondo Takács (Luis Hernández Yzal, Ana Maria Molera, Árpád Máthé, Rafael Hernández Massana). Bibliografia Fondaĵo ĉe UEA. Prezento de la stato de kompila/redakta laboro de la aperonta verko *Bibliografio de periodaĵoj en aŭ pri Esperanto*. Propono pri organizita kolektado kaj registrado/arkivado de la malnovaj kaj aktualaj E-periodaĵoj.



Gian Carlo Fighiera. 79-jara, italo, diplomito pri agronomiaj sciencoj, emerita funkciulo de interŝtata organizaĵo, e-istiĝis en 1947. Dum ok jaroj li unue agadis por la internacia lingvo en Torino, kiel kursgvidanto kaj propagandanto; tiam li fondis la informan servon de Itala E-Federacio, kies vicprezidanto li fariĝis. Inter 1955 kaj 1961, li deĵoris kiel surloka Konstanta Kongresa Sekretario (KKS) de UEA; en 1956 li fondis la Internaciajn Infanajn Kongresetojn. Inter 1961 kaj 1996, nome ĝis la morto de la edzino Ada Sikorska, li kunlaboris kun ŝi en la eldonado en Bruselo, Madrido kaj Torino de la tiam sendependa **Heroldo de Esperanto** kaj tie aktivis por E-o. Nuntempe li estas membro de la juĝkomisiono de la Belartaj Konkursoj de UEA,

diversmaniere laboras por la internacia lingvo kaj periode helpas kiel volontulo en la E-urbo Herzberg. Krom multaj artikoloj kaj verkoj en E-o, li aperigis ses librojn kaj plurajn esplorojn en naciaj lingvoj pri kongresistiko, fako kiun li instruis dum 18 jaroj en superaj lernejoj.

Konsideroj pri la Kongresa Gazetara Servo

Dum la UK en Florenco ŝajnis, ke ĝia Kongresa Gazetara Servo (KGS) ne sukcesis vaste informi la publikan opinion pere de la ĵurnalismaj medioj: novaĵ-agentejoj, radioj, televido kaj gazetaro (entute kelkmiloj da ili en granda lando). Ĝia gvidanto devis samtempe zorgi la nacilingvan informadon kaj eldonadi dum la UK la tagan E-kurieron.

Jen la proponoj. Unue, disdividi la eksteran informadon disde la eldonado de la kongresa kuriero. Due, komisiu la gvidadon de la ekstera informado ne al unu, sed al 2 aŭ 3 gvidantoj. Pri la ekstera informado rimarkindas:

a) Laboremaj, kompetentaj helpantoj maloftas inter ni, tamen LKK havas du jarojn da tempo por trovi taŭgajn gvidantojn de la KGS. Ilia laboro ne limiĝas al dissendo de komunikoj, sed etendiĝas ankaŭ al daŭraj per-

sonaj kontaktoj kun redakcioj kaj ĵurnalistoj. Necesas, ke CO/KKS transdonu sian sperton al nespertaj LKK-oj kaj sekvu ĝian aplikon. b) Koncerne la komunikojn, sekvendaj estas la profesiecaj konsiloj de Maul. Gravas eviti propagandan tonon, sed reliefigi eventojn, kiuj interesas la legantojn. Surbaze de la programo, eblas prepari kelkajn dumkongresajn komunikojn jam antaŭe. Denove, la persona helpo de CO/KKS, eĉ preter la kongresa regularo, nepras.

Ankaŭ la gazetaraj konferencoj (Estraro UEA) bezonas antaŭpreparon.



Jiri Caletka. 50-jara ĉeĥo el urbo Opava, kiu apartenis al lokoj kun la plej aktiva E-movado en Ĉeĥio. Dum sia vivo li studis diversajn fakojn kaj ŝanĝis laborsferojn. Li laboris kiel teknika inĝeniero, pedagogo aŭ psikologo. Nuntempe li laboras kiel analizisto de la gazetara departemento de la Ministerio pri defendo en Prago. Malgraŭ, ke li jam ok jarojn loĝas en ĉefurbo Prago, li daŭre estas membro de la E-klubo en Opava.

Japana ĵurnalisto pri ĉeĥa kulturo per Esperanto

La celo de la prelegeto certe ne estas la prezento de sufiĉe fama kaj konata japana e-isto Kurisu Kei, sed la rigardo je tiu ĉi tradukisto, ĵurnalisto kaj verkisto per okuloj de ordinara ĉeĥa esperantisto.

Kurisu Kei, la honora membro de UEA, havas grandegan meriton pri propagando kaj disvastigo de ĉeĥa literaturo kaj kulturo en Japanio. Dum sia longa vivo li influis ne nur la vivon de multaj Japanoj, kiuj dank'al li havis eblecon konatiĝi kun dekoj da ĉeĥaj verkoj kaj kun kultura kaj ĝenerala vivo en Ĉeĥio aŭ iama Ĉeĥoslovakio, sed li influis ankaŭ agadon de multaj ĉeĥaj e-istoj, kiuj havis eblecon almenaŭ iomete kontribui al lia unika kaj neripetebla verko.

Modesta laboro de ĉeĥaj e-istoj helpis pruvi ke E-o estas la plej taŭga helpa rimedo por perfekta traduko de tiaj grandaj verkoj kiel estas ekzemple la libro *La Avinjo de Bozena Nemcova* aŭ fama romano *La Aventuroj de brava soldato Ŝvejk* de Jaroslav Hasek.



Peng Zhengming (1958). Kiel redaktoro de Internaciaj Novajoj laboras por **Changjiang** (Jangzi-Rivero) ĵurnalo, kiu estas la plej granda ĵurnalo en Wuhan, Ĉinio. Li eklernis E-on en 1985. Partoprenis aziajn kaj UEA kongresojn, organizis multajn lokajn E-aranĝojn kiel estrarano de la urba kaj provinca E-asocioj. Li estas UEA-delegito en la urbo Wuhan kaj konstanta konsilanto de Ĉina E-Ligo. En la urbo surbaze de sia libera domo li lanĉis la unuan E-Domon kun E-biblioteko, ekspoziciejo kaj gastejo, kiu estas la ununura simila en Ĉinio... Li verkis artikolojn pri EM por diversaj ne-esperantaj kaj E-gazetoj gazetoj. Li kunlabore kun aliaj dum

4 jaroj eldonadis la ĉinan literaturan monatan revuon **Penseo**, kiu nun ankoraŭ eldoniĝas rete. Nun li estas kunredaktoro de la dulingva (E k. ĉin) monata gazeto **Tra la Mondo**.

Konciza historio de ĉinaj Esperanto-gazetoj

Prezentiĝas la historio de ĉinaj E-gazetoj, kiu konsistas el 4 tempperiodoj:

1. Pratempo de historio de ĉinaj E-gazetoj. Esperanto eniris en Ĉinion komence de la pasinta jarcento, pere de ĉinaj junuloj, kiuj studis en kelkaj fremdlandoj kiel Rusio, Francio kaj Japanio. Do, la plej fruaj ĉinaj E-gazetoj fakte naskiĝis ekster Ĉinio. Materialo montris, ke la unua ĉina E-gazeto estas **La Novaj Tempoj**, kiu eldoniĝis en Francio fare de ĉinaj studentoj. Pratempa periodo daŭris ĝis la jaroj ĉirkaŭ 1920. Tiam en Ĉinio, akompanante de politika revolucio, ankaŭ revoluciis intelektuloj je kulturaj aferoj. Esperanto per sia gazetara formo partoprenis en la granda reformo kaj revolucio. Enlande sinsekve naskiĝis E-gazetoj.

2. Dum la militaj tempoj, ĉefe dum la japan-rezista periodo, ĉinaj esperantistoj per Esperanto partoprenis en la internacia kontraŭfaŝista movado kaj en la propagando por savi sian patrion de japana okupo. Diversaj gazetoj venis en la ekzisto. Tiu periodo daŭris dum kvar jaroj de la Interna Milito.

3. Post stariĝo de Nova Ĉinio, ĝis la fifama Granda Kultura Revolucio, ĉefe registaro funkciigas gazetan sistemon, reprezentitan de **EPĈ**, kiu ja estas tre bela, tre enhavriĉa E-gazeto, sed evidente kiel propagandilo de registaro por eksterlandanoj. Kontraste, pro politikaj kialoj, ne tre viglis la ĝenerala gazetara aktivado, kvankam kelkaj ekzempleroj mencioblas.

4. Post Granda Kultura Revolucio ĝis nun, de furora svarmo ĝis nuna preskaŭ silento. Ekde iom antaŭ ol 1980 ĝis mezo de '80-jaroj, la sumo de diversaj E-gazetoj superis pli ol 300 specoj tra la tuta lando, krom Tibeto. Tamen nun aktivadas nur kelkaj. Eĉ **EPĈ**, iama famulo, aperas nur en sia reta versio. Analizindas kaj pensigas la fenomeno...



László SZŐKE (37 j.). Profesia ĵurnalisto de 1990. Rumania civitano, nuntempe deĵoranto ĉe la dua plej granda tag-ĵurnalo pri publikaj aferoj el Hungario, *Magyar Nemze*, kie establis kaj gvidas la internan temo-agentejon priservantan per informoj/temoj pli ol 300 ĵurnalistojn laborantajn ĉe la sama presfirmao. Naskiĝis kaj vivis ĝis 2002 en hungara urbeto en Rumanio Székelyudvarhely (hungare), Odorheiu-Secuiesc (rumane). Fondinto de pli da lokaj gazetoj, komerca radio kaj televido, kunlaboranto ĉe pluraj naciaj radioj kaj televidoj el Rumanio kaj Hungario. Adoleska memlerninto de E-o, iama kunlaboranto neregula ĉe *Monato* kaj *La Gazeto* kiam li estis 17-19 jaraĝa. Eniĝis en E-movado en julio 2007, kiam li iĝis la oficejestro de Hungarlanda E-Asocio. Fondinto kaj redaktoro de esperantlingva retejo *Esencoj* (<http://esencoj.info>), inciatinto kaj prizorganto de la t.n. Esperanto 2.0 TV ([http://worldtv.com/esperanto_2.0 tv](http://worldtv.com/esperanto_2.0_tv)).

Diversnivela komunikado kun nacilingva presaro pri Esperanto

Demandoj respondotaj (enhavo):

Kiel komuniki pri E-o kun la nacilingva presaro? Kiel “stultigi” diversajn informojn pri E-o tiom, ke ili estu kaj restu allogaj ankaŭ al diverstipaj gazetoj, radioj kaj televidoj (publikservaj, bulvardaj, fakaj) nacilingvaj? Kiel komuniki sukcese, konsiderante kaj uzante la strukturojn kaj specifajojn de la presaro mem? Aliflanke: kiel helpi E-organizaĵojn kaj iliajn decidpovulojn pri komunikado ekster la E-movado? Tiujn demandojn provos respondi tiu ĉi prelego helpe de konkretaj ekzemploj (laŭ la hungara presa medio)...

Mesaĝi malpli anstataŭ troigi (metodoj trovi mesaĝojn kaj komuniki kun ĵurnalistoj)

E-istoj, E-movadanoj ofte falas en tiu eraro, ke ili provas komuniki ĉion pri Internacia Lingvo kiam kontaktiĝas kun ĵurnalistoj. Movadanoj ofte superŝutas ĵurnalistojn kun informoj, kiam aperas la eblo publikigi ion ajn rilate E-on. Kvankam necesas nur(!) trovi la plej gravajn mesaĝojn, kiujn oni volas distrumpeti. Ekzistas ĵurnalisme jam testitaj metodoj priserĉi tiujn mesaĝojn. Kaj ne forgesi: ĵurnalistoj – estimo al esceptuloj! – estas ĝenerale tro supraĵaj, ĉar ili laciĝas dum la pelado trovi la plej freŝan presinform(er)on. Eĉ, ĵurnalistoj plie servas siajn ĉefojn/redaktorojn, ol la t.n. meritplenan konsumantaron de informoj. Indas kalkuli kun tiuj tristaj(?) faktoj...


Elprofiti ŝtoniĝitajn strukturojn (metodoj pri interveno de profesiuloj)

Iel-tiel ĵurnalistoj jam konas, aŭ espereble havas informojn pri la strukturo de presaro, pri ĝiaj funkciado kaj regularo. Tiuj ĵurnalistoj, kiuj prenas sur sin servi kiom ajn E-komunumojn, samtempe surprenas al si ankaŭ la taskon informi decidpovulojn pri la teknikaj sciendaĵoj. Teknikajn, laŭ la senco de funkciado! Ĉu havas tiajn taskojn E-ĵurnalistoj? Kiuj kaj kiaj estas ili? Kiu devas fari la unuan paŝon en la komunikado inter la ĵurnalistoj kaj diversnivelaĵoj E-organizaĵoj? Kiumaniere? Eĉ, ĉu devas kaj eblas iamaniere interveni en la natura evoluo de organizoj? Ĉu eblas kaj devas iu organizo de profesiaj ĵurnalistoj, ekzemple TEĴA, prilabori la metodojn de interveno? Aŭ simple lasi ĉion (mal)evolui de si mem, ĉu?

Ekstere kontemplantoj aŭ partoprenantoj interne (metodoj trovi nian ĝustan lokon)

Kia profesio estas ĵurnalismo? Ĉu ni trovis nian lokon en niaj (E-) komunumoj? Kiajn rolojn ni havas? Jen ebla respondo laŭ iu figuro poetika:

Leono kuŝanta digne en kaĝo observadas triste la homojn ekster kradoj, kaj tiel bedaŭras pri ili: kiom malgaje al tiuj, kiuj eĉ ne konscias pri tio, ke mi estas ekstere kaj ili interne...



Dimitrije JANIĈIĈ (1935). Studis ĵurnalismen, laboris kiel instruisto kaj ĵurnalisto en Nikŝiĉ (Montenegro) kaj Beogrado (Serbio). Lernis Esperanton en la sepdekaj jaroj de pasinta jarcento. Laborinte kiel ĵurnalisto kaj redaktoro en diversaj gazetoj, aperigis dekojn da rakontoj kaj poemoj en diversaj revuoj kaj gazetoj de iama Jugoslavio. Dum kvar jaroj li estis ĉefredaktoro de *Jugoslavia stelo* kaj plurjara vicredaktoro de *Jugoslavia fervojisto*. Li estis premiita kelkfoje pro originala E-prozo kaj poezio (Hispanio, Rusio, Bulgario, Litovio). Tradukis rakontojn de serbaj verkistoj, verkis multajn artikolojn, rakontojn kaj poemojn. Li loĝas en Beogrado kiel emerita ĵurnalisto kaj aktiva esperantisto.

Eblecoj kaj formoj de kunlaboro de malgrandaj E-gazetoj

Ĉi tiu verkaĵo estas provo difini kaj sistematigi la enhavon de malgrandaj (societaj, regionaj, grupaj) E-gazetoj kaj helpi al pli ofte senspertaj libervoluloj, kiuj redaktas ilin, pli facile krei pli bonan gazeton. Verkaĵo enhavas proponojn de iuj formoj de kunlaboro de E-gazetoj kaj tiamaniere fari malgrandajn E-gazetojn pli bonaj, pli enhavemaj, pli influaj, pli interesaj kaj pli kunlaboremaj.



Petro Chrde. Origine inĝeniero pri elektrotekniko, doktoriĝis ĉe la Instituto pri Radioelektroniko pri Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj, laboris kiel esploristo kaj instruis ĉe Teknika universitato ČVUT en Prago kaj Trafika altlernejo VUD en Žilina (filio Prago). Asociita docento ĉe AIS San Marino, kie li plenumis dum 4 jaroj funkcion de Senata sekretario. En la jaro 1992 li fondis la Kongresan kaj Klerigan Agentejon *KAVA-PECH*, kiu dekomence uzas Esperanton samrajte kun la ceteraj laborlingvoj: la ĉeĥa, la angla kaj la germana). La agentejo, agas ankaŭ kiel eldonejo (110 eldonitaj libroj kun propra ISBN kaj proksime la sama nombro laŭmende). Tial li pli profunde okupiĝis pri la aŭtoraj rajtoj. Siajn spertojn el entreprenado pere de Esperanto li resumis en la verketo *Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj*.

Aŭtoraj rajtoj en EU

La kontribuo traktas la aŭtorajn rajtojn en internacia skalo ne nur el la vidpunkto de aŭtoroj (do plej parte iliaj rajtoj), sed ankaŭ el la vidpunkto de uzantoj (ĉefe eldonejoj, do plej parte devoj).

Post la difino de la objekto de protekto (necesaj trajtoj de la verko ke ĝi estu protektata laŭ la aŭtoraj leĝoj) la ĉefa atento estas fokusita al klarigo de la plej ĉefaj nun validaj internaciaj interkonsentoj: de la Interkonsento de Bern (1886) tra Interkonsento pri fondo de Monda Organizaĵo de spirita posedaĵo (Stokholmo, 1967) kaj Ĝenerala interkonsento pri aŭtora rajto (Ĝenevo, 1952) ĝis la Gvidlinioj de EU-konsilio pri harmoniigo de protektodaŭro de aŭtora rajto 93/98/EHS) kaj la rilatoj inter ili kaj inter aldonaj duflankaj interkonsentoj inter unuopaj landoj.

Oni traktos ĉion ĉi el la vidpunkto de EU (kiam kaj la aŭtoro, kaj la uzanto de la verko estas civitanoj de EU, ĉu personaj, ĉu juraj) tamen flanke oni mencias ankaŭ la situacion ekster EU, kiun tamen la aŭtoro mem konas nesufiĉe.



Kazimierz Leja (1956). Polo, e-isto ekde 1977. Edukita kiel ekonomikisto, laboras kiel konsultanto pri komputila programaro en kelkaj grandaj eldonejoj kaj presejoj. De 17 jaroj estas posedanto de propra eldonejo *Hejme*, kie prilaboras librojn kaj magazenojn por presado, prizorgas projektojn de aliaj eldonistoj, krome, dum 8 jaroj instruas en la privata supera lernejo pri tipografio kaj mastrumado de komputilaj programoj. Dum 2003-2007 estis ĉefredaktoro de la revuo ***Pola Esperantisto***; ekde 2008 estas kunredaktoro de la revuo ***Spegulo*** — socikultura revuo en E-o. Membro de Krakova Societo *Esperanto*, UEA, ILEI, EVA.

Perkomputila teksto-prilaboro por ĵurnalistoj kaj redaktoroj. Komputilo ne estas antikva skribmaŝino

En la ĉiutaga laboro de raportistoj kaj ĵurnalistoj ne povas manki komputilo – moderne ekipita per ĝusta programaro kaj iloj, kiuj ne povas superregi la uzanton, sed servi al li. Redaktoroj kaj eldonistoj postulas de siaj kunlaborantoj tekstojn ne nur interesajn, sed ankaŭ teknike bonajn, facilajn por tuja uzo, sen tro granda devo de plua prilaboro.

Sur E-kampo ne mankas iloj, faciligantaj laboron de ĵurnalistoj: teksto-redaktiloj, literumiloj, vortaroj, klavaroj kun E-supersignoj ktp. Ilia ĝusta uzado estas unu el devoj de la moderna ĵurnalista, kaj – feliĉe – plimulto de ili estas senpagaj kaj facile akireblaj.

Tipografio estas parto de tiu „mistera kono”, kiu – ofte ignorata – decidas pri bona (aŭ malbona) legado de presitaj tekstoj, diveno de partoj pli aŭ malpli gravaj. Tre oftaj tipografiaj eraroj, videblaj en preskaŭ ĉiuj mez-nivelaj hodiaŭaj eldonaĵoj, malbone atestas pri profesieco, aŭ bone atestas pri malprofesieco de iliaj redaktoroj kaj eldonantoj. Ĉio ĉi estas facile plibonigebla (kaj plibonigenda) kun iom da bona volo de interesitoj.



Josip Pleadin (1958). Kroato. Esperantisto de 1977. Movada aktivulo, tradukisto kaj verkisto. Posedanto de presejo kaj eldonejo *Grafokom*, kiu, interalie, okupiĝas ankaŭ pri E-eldonado. Li estis dum 7 jaroj profesia esperantisto. Mallonge redaktoro de ***Tempo*** (oficiala organo de Kroata E-Ligo), redaktoro de kongresaj bultenoj de la 85-a kaj 86-a UK-oj (Tel-Avivo kaj Zagrebo). Nuntempe redaktoro de ***Zagreba Esperantisto***. Verkis artikolojn por pluraj Esperantaj kaj nacilingvaj gazetoj. Ĉefaj libroformaj verkoj: *Biografia leksikonod e kroatiaj esperantistoj* (2002) kaj *Ordenod e Verda Plumo* (2006). Aparte okupiĝas pri E-historio (fako: biografioj).

E-ĵurnalismo kaj gazeteldonado en novaj teknologiaj kondiĉoj

Teknologiaj novaĵoj kaj novaj kondiĉoj en grafika industrio grave ŝanĝis la presteknikojn kaj entute distribuon de informoj. En tiaj kondiĉoj ankaŭ la rolo de ĵurnalistoj draste ŝanĝiĝis. La presteknologioj malplikostiĝis kaj samtempe donas pli kvalitan presrezulton. Multaj paperaj gazetoj aŭ plene transiris al sia interreta versio, aŭ samtempe aperas en ambaŭ eldonteknikoj. Tiuj ŝanĝoj, kiuj fulme evoluis dum pasintaj dudek jaroj, ankaŭ al E-gazeteldonado peris postulojn pri pli bona kvalito de presaĵoj, kaj antaŭ E-ĵurnalistojn metas postulojn pri pli rapida reago kaj distribuo de informoj.



Yu Jianchao (1956). Raportistino de Ĉina Radio Internacia (ĈRI). Studis la anglan lingvon dum 1979—1981 en Qingdao-Normala Kolegio kaj poste instruis la anglan ĝis 1992; magistro pri Ĉinaj Lingvo kaj Literaturo de Shandong Normala Universitato. Eklernis E-on en 1981, kaj estis konsiliano de Qingdao-a E-Asocio (fondiĝinta en 1985). En 1987, kune kun samideanoj projektis, faris kaj sukcesigis la TV instruon filmon *Espero* kun la partoprenado de Qingdao-a TV Stacio. Inter 1989 kaj 1991 studis ĵurnalismojn kaj E-on en Pekina Brodkasta Instituto (nuna Ĉina Komunikada Universitato) kaj poste eklaboris (1992) en ĈRI kiel raportisto, redaktoro, kaj estro de ĝia E-Redakcio (1995—2006). Nun ŝi estas vicprezidanto de Ĉina E-Ligo, samtempe dungite instruas (Ĵurnalismojn kaj E-on) en Internacia Komunikada Instituto.

Ĉina Radio Internacia, multimedia amaskomunikilo en la 21-a jarcento

Temas ĉefe pri la E-elsendo kaj ĝiaj derivataj multimedia-rimedoj: reto, papera gazeto, korespondado kun aŭskultantoj ktp. Per elsendo-verkoj oni klarigos la strukturon de la tradicia elsendado en la pasintaj pli ol 40 jaroj, la nunan staton kaj la disvolvan perspektivon de E-elsendo de ĈRI. Pluraj rimedoj pliriĉigas kaj larĝigas la elsendadon, ke ĝi estu multimedia komunikilo de la nova jarcento. Reto disvastigas la bazan funkcion de elsendado kaj donas senprecedencan defion al tradicia disaŭdigo. Ĝeneralaĵo de ĈRI: disvolvo de novaj komunikiloj, karaktero kaj formo de novaj komunikiloj, ĈRI-Surlinio (www.cri.cn), reta elsendostacio, reta televido, elsendo-televido sur poŝtelefono, novaĵa redaktorado sur reto.



Vlado Jurkovic (1931). Kroato. Naskiĝis en Zagrebo. Emerita ĵurnalisto. Laboris ĉe Radio-Televido Zagrebo. Esperantisto de 1955. Fakdelegito de UEA pri radio-ĵurnalismo kaj membro de TEĴA. Ekde 1956 teknika reĝisoro kaj poste ĵurnalisto kaj raportisto de E-elsendoj de Radio Zagrebo. Aparte aktiva kiel raportisto el Universalaj Kongresoj.

Dek kvin jaroj forpasis de kiam silentas E-programoj de Kroata Radio

La temo rilatas la historion de E-elsendoj de Radio Zagrebo (poste Kroata Radio), kiuj komenciĝis en majo 1953 okaze de la 38-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Zagrebo samjare. La elsendoj post plejnaj 39 jaroj da kontinua funkciado, finiĝis per arbitra decido de Kroata Radio en la jaro 1992.



Zlatoje Martinov (1953), literaturisto, kritikisto, tradukisto, publicisto kaj ĵurnalisto. Verkas serblingve kaj E-e. Serblingve verkis tri librojn de noveloj, unu libron de literaturaj eseoj kaj unu pri la historio de la E-movado kaj lingvo. Tradukis el la serba en E-on du librojn de la serbaj verkistoj (David Albahari, *Eklampsio en remizo* kaj Desanka Maksimovic *Ozono de naskiĝloko*) faris antologion de la serba porinfana poezio, tradukis ĝin esperanten kaj publikis ambaŭlingve sub titolo *Al la mondo donace* (la antologio estas proklamita libro de la jaro dum UK en Adelaide Aŭstralio, 1997). Momente laboras kiel vic-ĉefredaktoro de la beograda *Republika*, la monata revuo politika, socia kaj kultura. Same kunlaboras en multaj serbaj kaj E-literaturaj revuoj. Ekde 1997. estas membro de E-PEN centro.

Interligo de naciaj literaturoj kaj esperanto kiel literatura medio

La literaturo en E-o ekde la komenco tre klare kaj sendube anoncis la procezon de aŭtentika literatura riĉeco surbaze de propraj esprimaj rimedoj, sed ankaŭ surbaze de utiligado de naciaj literaturoj pere de tradukista aktivado.

La fino de la 19-a kaj la komenco de la 20-a jarcento estas ĝenerale periodo de forta interpenetrado de naciaj kulturoj, akceptado de fremdaj influoj, noviganteco, nestado, sed ankaŭ glorado de propra tradicio.

La internacia lingvo estis praktike ideala spaco de interkruciĝo de la plej diversaj kulturinfluoj.

Pere de ĝi oni proksimigas la plej malproksimajn kulturojn kaj literaturojn. La avantaĝo de E-o estas ĝia evidenta kapablo pli egalmezure dispersi la tradukojn de la tiel nomataj “malgrandaj nacioj” kaj “malgrandaj” kulturoj.

Nome dum oni tradukas en sian nacian lingvon la plej grandajn verkojn mondajn verkitaĵoj je same “grandaj” lingvoj (la angla, la germana, la franca, la rusa), pere de E-tradukoj de la nesufiĉe konataj literaturoj (kiel ekzemple de la vjetnamia, flandra, islanda, litova, serba, kroata, albana, k.s.) oni povas konatiĝi kun tiuj kulturoj kaj konsciiĝi, ke ili ne estas tiom “malgrandaj” kaj nesignifaj.



Jianhua Li. De septembro 2003 ĝis julio 2005 lernis Esperanton en la Ĉina Komunika Universitato (en aŭgusto 2004, li laboris kiel volontulo por la 89-a UK). De julio 2005 ĝis nun, li laboras kiel esperantisto-raportisto en la redakcio de la reta ***El Popola Ĉinio***. De aŭgusto 2006 ĝis nun li estas redaktoro de www.raporto.info.

Novaj interretaj teknologioj kaj E-movado

Kiam la homa historio eniris en la 21-an jarcenton, ankaŭ la interreto enpaŝis en la novan eraon — Web 2.0. Dum tiu erao, retumantoj estas ne nur akceptantoj de informoj, sed ankaŭ kreantoj kaj transportantoj de informoj.

Esperantistoj senĉese esploris por akceli E-movadon per novaj interretaj teknologioj. Ĝis nun aperis en Esperantujo la E-blogo, reta E-radio kaj E-podkasto, samtempe, ankaŭ tradiciaj radioj uzis retan radion por disvastigi ilian influon. Krome, multaj E-videoj kaj eĉ E-filmoj aperis sur video-dividaj retejoj, la nombro de la vortoj en Wikipedia multiĝis tago post tago. Laŭ tiuj karakteroj de la nuna interreto, resumante la sperton de E-movado en la nova interreta erao, prezentiĝas proponoj pri E-disvolviĝo en la nova erao. Ekzemple, organizo de reta UK, fondo de Reta Zamenhofa Instituto, konstruo de reta E-librejo de la tuta mondo, ktp.



Tomasz Chmielik (1957), polo. E-isto de 1972. Li instruas germanan lingvon en liceo. Tradukis el multaj lingvoj verkojn de H.Krall, A.Szczypiorski, R.Kapuściński, F.Dürrenmatt, D.Ugrešić, G.Kanovič. S.Beckett, Ŝ.Aŝ, I.L.Perec, ankaŭ ĉiujn romanojn kaj rakontojn de I.B.Singer. Libroforme aperis liaj tradukoj de *La lada tambureto* (2000) de G.Grass, *Ebono* (2001) de R.Kapuściński, *Alia Venecio* (2006) kaj *Mediterranea brevierio* (2007) de P.Matvejevič. Inter 1987-2007 li kolektis kaj ordigis la franclingvajn kaj E-artikolojn de Edmond Privat, kiujn li aperigis papere kaj diskete en sia eldonejo *Libro-Mondo*. Ĉefredaktoro de la kvaronjara revuo ***Spegulo***. Li gvidas la redaktan stabon de la trivoluma *Pola antologio*.

Edmond Privat (1889-1962) — la patro de la moderna E-ĵurnalismo

Nek la plurfoje reeldonata famega legolibreto *Karlo*, nek la konataj biografioj *Vivo de Zamenhof* kaj *Vivo de Gandhi*, nek la ankoraŭ leginda *Historio de Esperanto* kaj nek la atentokapta libro kun rememoroj *Aventuroj de pioniro* formas *opus magnum* de tiu svisa e-isto, sed ĝuste la artikolaro, kiun li senlace publikigis kiel ĵurnalisto en gazetoj de Romandio: la socialistaj *Le Droit du Peuple* (1919-1935) kaj *La Sentinelle* (1920-1956), la kooperativaj *Le Coopérateur genevois* (1929-1944) kaj *Coopération* (1921-1922. 1930-1962), kaj ankaŭ la liberpensema *L'Essor* (1916-19919, 1931-1932, 1934-1962). Post la morto de H.Hodler li redaktis dum jaroj la revuon de UEA *Esperanto* (1920-1933), kiu fariĝis tiutempe unu el la plej gravaj opinikreaj centroj de E-ujo. Per tiu ĵurnalista agado de Privat ni havas la unikan ŝancon vidi la politikan, socian kaj kulturan vivon sur ĉiuj kontinentoj, kun ĝiaj diverseco, amplekseco kaj komplikeco de la fino de la 1-a mondmilito ĝis la komenco de la 60aj jaroj de la pasinta jarcento. Post iel-tiela kompletigo, kiu daŭris preskaŭ dudek jarojn, kies sekvo estis aperigo de la tuta artikolaro, el la plumo de Edmond Privat, franclingva kaj esperanta, nun venas la tempo por esploroj kaj kritikaj analizoj. Por ĉiuj ĵurnalistoj en E-o Edmond Privat estas kaj restos modelo de objektiveco, honesteco kaj persona kuraĝo, kiam li iasence malkovris por la mondo Gandhion, Martinon Luther King, Danilon Dolci, kiam li apogis liberigajn batalojn de koloniaj popoloj, kiam li severe kondamnis faŝistajn kaj komunistajn krimojn, ĉiajn persekutadojn kaj subpremadon pro raso, lingvo kaj religio...

Ryszard Kapuściński (1932-2007) - la majstra ĵurnalisto kaj raportisto pri la mondo pereanta

Antaŭ unu jaro forpasis Ryszard Kapuściński, la aŭtoro de la famkonataj verkoj — *La imperiestro*, *La ŝahinŝaĥo*, *La imperio*, *Ebono kaj Vojaĝoj kun Herodoto*. Kiel ĵurnalisto li tramigris ĉiujn kontinentojn serĉante la veron pri homoj el diversaj nacioj kaj religioj en gravaj momentoj de la historiaj ŝanĝoj. La problemoj, kiujn li priskribis, estas ligitaj kun rimarkindaj demandoj: pri la loko de homo en la mondo, pri la etika flanko de bono kaj malbono, vero kaj justeco. Samtempe li klopodis starigi aksiologian hierarkion de racio, kuraĝo kaj ekzisto. Li estis vidanto kaj partoprenanto de la eventoj, kiuj pereigis la mondon de la imperioj abisena, ŝaĥa, kolonia kaj sovetia. Hodiaŭ la gazetaro, radio kaj televido (*CNN*, *Sky News*) prezentas simpligitajn informojn, kiuj celas plejparte sensacion kaj amuzon. Kiel majstra kaj serioza ĵurnalisto Kapuściński ĉiam inkliniĝis al verkado spronanta la atenton de aktivaj legantoj, kiuj deziras ekscii ion pli koncerne la realon ne nur en formo de mallonga raporto, sed ankaŭ per sinteza klarigo kaj globala rigardo al la problemoj de la nuntempa mondo.



Ahmad Reza Mamduhi (1960). Eklernis E-on dekkelk-jaraĝe ĉefe helpe de anglalingvaj memlernolibroj kaj vortaroj. Ekde la naskiĝo de **Monato** — internacia magazino sendependa — en 1980, li fariĝis ĝia korespondanto en Irano. Li licenciĝis pri arkitekturo en la Nacia Universitato de Irano (Ŝahid Beheŝti), kaj magistriĝis pri urb-desegnado en la sama universitato. Li estis la unua ĉefdelegito de UEA en Irano kaj nun estas la prezidanto de la Irana E-Asocio (IREA). Krom kontribuado al diversaj E-periodaĵoj (**Monato**, **Esperanto**, **El Popola Ĉinio**, **Heroldo**), li verkis perslingvan lernolibron *Asantarin Zabane Donja* (La plej facila lingvo de la mondo), por lerni/instrui E-on. Li nun ĉefe kontribuas al **Irana Esperantisto**. Lastatempe lia nova perslingva verko pri E-o publikiĝis sur 410 paĝoj: *Padideje Esperanto*, *Rahe Halle Mosxkele Zabane Bejnolmelali* (La Fenomeno E-o, La Solvo por la Problemo de la Internacia Lingvo).

Kiel Esperanto ĵurnalistigis min?

Kiam en 1980 aperis la unua numero de *Monato* – Internacia Magazino en E-o – kun surkovrila foto pri Irano, mi sendis leteron al ĝia tiam – kaj nuna – ĉefredaktoro, s-ro Stefan Maul. Li aperigis mian leteron kiel la unuan en la letera rubriko, kaj proponis al mi fariĝi korespondanto de *Monato* en Irano. Mi tion volonte akceptis, kaj... mi fariĝis ĵurnalista! Tiam mi estis apenaŭ 20-jaraĝa.

Interesa afero ankaŭ estas tio ke: ĝis tiam – kaj eĉ por iom da tempo poste – mi ne estis renkontinta iun ajn esperantiston, eĉ mia-landan! Do E-o pruvis al mi, ke ĝi kapablas ellerniĝi kaj eĉ ĵurnalistigi onin ankaŭ en tuta izolo! Tio laŭ mi estas vera miraklo – se ni komparu E-on kun ĉiuj aliaj lingvoj de la mondo. En neniu alia lingvo vi povas trovi tian okazaĵon; ĉu vi? Eble tio inspiris min titoli mian memlernolibron de E-o en la persa lingvo *Asan-tarin Zaban-e Donja* (La Plej Facila Lingvo de la Mondo) – 25 jarojn poste!

Unua mia interparolo en E-o okazis en 1981 probable. La parolato estis sino Mouxlud Sagafian. Tiam ŝi gvidis konversacian kurson en Tehrano. Kiam mi diris al ŝi, ke mi lernis E-on aŭtodidakte, ŝi ŝerc-demande diris: ”Sed vi bone parolas E-on, kiel vi praktikis konversacion? Ĉu antaŭ spegulo kun vi mem?”

Kaj ankoraŭ... tiam mi lernis E-on ĉefe per angla-lingvaj memlernolibroj (de Montagu C.Butler kaj W.J.Downes) kaj vortaroj (de Montagu C.Butler kaj John C. Wells) – kaj ne en mia gepatra lingvo persa! Mia angla certe ne estis tiom bona tiam. Eĉ ankoraŭ – loĝinte kaj laborinte kiel arkitekto kaj urb-desegnisto dum 4 jaroj en Anglio — mia E-o multege superas mian anglan!



Frimpong Ampomah Badu (1974). Li naskiĝis en Ganao. Esperantiĝis en 1990 dum la studado en altlernejo. Li ĉefe lernis per korespondado kun S-ro Hans Bakker kaj S-ro Cameron Sackey. Pro la kuraĝigo de amikoj, la unua E-Societo *Amikeco* estis fondita. Li studis Agrikulturon, Sciencon kaj Afrikajn Studojn ĉe la kolegio. Dum la vizito de S-ro Atilio Orellana Rojas en 1994 li havis eblecon studi la instruadon laŭ la Cseh metodo kaj diplomiĝis kiel Cseh Instruisto en 1996. Antaŭ ses jaroj li translokiĝis al Aŭstralio. Antaŭ du jaroj li revenis al E-io kaj nun redaktas la revuon **Telepeo**, la organon de E-Federacio de Nova Suda Kimrio.

Esperanto kaj kulturoj en Afriko

Afrikaj kulturoj estas tre kompleksaj kaj diversaj. Homoj multfoje miksas la kutimojn kunekun la influoj de Eŭropaj kulturoj (okcidentaj kulturoj). E-o kulturo estas tre unika kaj similas plej parte al la Afrikaj kulturoj.

Rolo de Esperanto en la nuntempa mondo

Ĉie ajn en la mondo homoj timas pri teroristaj atakoj tiel, ke homoj timas unu la alian. Ni konstante vivas en timo. Registaroj elspezas multajn sumojn por protekti iliajn civitanojn kontraŭ atakoj. Ĉar ili timas.

Ĉu E-o povas helpi nin solvi la problemon de timo? Probable jes. Ĵurnalisitoj kaj redaktoroj povus helpi, ĉar nur en E-ĵurnaloj oni legas nenion pri timo.

E-o havas tre grandan kaj valoran rolojn en nia socio aŭ komunumo. La Lingvo Internacia estas pli ol lingvo.



Vjačeslav (Slavik) Ivanov (1978). Instruisto en la fililogia fakultato de Sankt-Peterburga Ŝtata Universitato. Programisto kaj lingvisto laŭ la universitata klero (2000, 2003), finis jarlongan kurson pri ĵurnalismo en 2007. Membro de UEA, li estis B-komitatano en la jaroj 2004-2007. Ekde la jaro 2000 okupiĝas pri informado pri E-o en interreto, redaktas ruslingvan informilon **Esperanto novosti** (e-novosti.info) kaj i. a. partoprenas la internacian projekton *Aktuale.info*; aktivas en la E- kaj alilingvaj *Vikipedioj*, kunlaboras kun *La Ondo de Esperanto* kaj aliaj gazetoj.

Mia sperto de interreta ĵurnalismo

Pli kaj pli novaj manieroj liveri informon al la konsumantoj aperas lastatempe. Por sukcese ĉeesti en la informa medio E-movado devas ekuzi tiujn novajn metodojn frue, laŭmode eblas nomi tion „moderniĝo“ de E-ĵurnalismo.

Iniciato de Andrej Grigorjevskij, la ruslingva informilo pri E-o kaj E-parolanta mondo aperis en 1999 kiel retpoŝta dissendo ĉe servilo *Subscribe.ru*, tiam unu el la plej popularaj paĝaroj de ruslingva interreto. La te-

maro de la informilo ekde pli poste inkluzivas lingvan demokration, lingvodefendajn eventoj kaj agadojn, minoritatajn lingvojn k.s. Vasteco de la tuŝataj temoj havigas al la informilo pli vastan legantaron.

Nun la kvanto de la abonantoj ĉe tri diversaj serviloj superas 5 mil personoj. *Esperanto novosti* estas ankaŭ legebla en Interreto: en ĝia paĝaro kaj per RSS. Do, la tuta legantaro estas eble ĉ. 10-15 mil personoj monate. Ĉe la novaĵa paĝaro ekfunkciis ankaŭ aktiva prilingva forumo, kiu estas inter la plej aktivaj ĝenerale prilingvaj forumoj de la ruslingva interreto.

Multe helpas al *Esperanto novosti* REU kaj la internacia krea grupo *Esperanto ĉe Interreto*, en kies servilo (*ikso.net*) funkcias plejparto de la servoj.

Kio estas la novaj eblecoj por modernigo en reta informado pri E-o? Ankorau subevoluinta restas la blogaro en E-o (dum la lastaj 2-3 jaroj okazas pozitivaj ŝanĝoj pri tio, blogantoj trovas internacie interesajn temojn ktp.), mankas profesinivelaj informejoj en E-o (kiel *Libera Folio* kaj *Eventeo*), nesufiĉe glate funkcias kaj ne de ĉiu retumanta e-isto konatas la informkolektaj sistemoj kiel *Klaku.net*, nacilingve mankas podkastoĵoj pri E-o kaj interlingvaj demandoĵoj, restas multo farebla pri kreado (kaj disvastigo) de multimediaĵoj pri E-o.



Alfred Schubert (1958). Studado de franca, angla kaj hispana lingvoj ĉe la universitato *Ludwig-Maximilians-Universität* en Munkeno. Ekleris E-on en 1980, aktivis en E-Klubo Munkeno dum dek jaroj kiel instruisto kaj en la estaro. Eldonis tutmondan anoncgazeton *Monda merkato* komence de la 1990-aj jaroj, produktis *Esperanto en Bavario*, la bultenon de Bavara E-Ligo, dum dek jaroj. Ekde 2006 redaktoro de ***Esperanto aktuell***, oficiala organo de Germana E-Asocio kaj Aŭstria E-Ferderacio. Ekde 1983 memstara ĵurnalisto, ekde 1994 ankaŭ afergvidanto de la firmao *lb linguistisches bureau gmbh*. Ĉefaj interesoj estas novaj teknologioj, evoluo de la socio, tutmondaj efikoj de agoj kaj sistempensado. Aliaj aktivecoj: kunlaboro en la preparo de la germanlingva eldono de *Encarta*, verkado de dokumentaj priskriboj de industrimaŝinoj, traduko de diverstipa literaturo, teknika kaj ĵurnalista fotado.

La situacio de Esperanto-gazetoĵoj en Germanio

En Germanio ekzistas multaj informleteroĵoj, informiloĵoj kaj malgrandaj E-gazetoĵoj. La plimulto de ili havas nur kelkdek legantoĵojn. Nur kelkaj atingas pli ol cent legantoĵojn. Pli ol mil legantoĵojn havas nur ***Esperanto aktuell***, la oficiala

organo de Germana E-Asocio kaj Aŭstria E-Federacio. La eldonkvanto de la gazetoj kaj presitaj informiloj ĝenerale malkreskas pro la pli kaj pli ofta utiligo de la retaj informiloj. Se la situacio ne ŝanĝiĝas, la plimulto de la gazetoj malaperos dum la venontaj dek jaroj. Solvo de la problemo estus kunlaboro. La merkato estas kaj restos sufiĉe granda por unu enhavoriĉa gazeto.

La estonteco de esperantlingvaj gazetoj

Pro la kreskanta influo de la interreto la eldonkvantoj de multaj gazetoj malkreskis kaj malkreskos. Pro la laŭ-inflacia kresko de la bazaj kostoj de presado kaj la malkreskanta kvanto de pagantaj legantoj eldonejo jam havas — aŭ ekhavas — problemojn. Se la eldonejoj reagas per malaltigo de kvanto aŭ kvalito, ili perdas abonantojn. Se ili altigas la prezon de la gazeto ili ankaŭ perdas abonantojn. Neelirebla cirklo gvidante suben komencas. Estas pluraj — kombineblaj — solvoj de la problemo:

1. Pligrandigi aŭ/kaj plibonigi la gazeton por allogi novajn legantojn.
2. Serĉi novajn celgrupojn, ekzemple junulojn, kiu ĝis nun nur legas retgazetojn.
3. Enspezi parton de la produktadkostoj pere de vendado de spaco por komerca varbado.
4. Verki parton de la artikoloj en nacia lingvo por atingi celgrupojn ekster E-io.
5. Interŝanĝi laŭbezone artikolojn inter la redakcioj.
6. Traduki artikolojn al naciaj lingvoj kaj vendi ilin al lokaj gazetoj.
7. Eldoni plurlingvajn gazetojn.
8. Krei per-E-an novaĵagentejon.
9. ...



Vilhelmo Lutermano (1936). Germano. Studis germanistikon kaj romanistikon, filozofion kaj pedagogion en la universitatoj de Göttingen, Freiburg, Vieno, Munkeno kaj Berlino (FU). Vivis kaj laboris kiel gimnazia instruisto pri la germana kaj franca lingvoj, pri stenografio kaj biciklo-sporto en Okcidenta Berlino (Germanio) kaj unu jaron en Bordoza (Francio). Li estis aktiva propagandisto kontraŭ *Esperanto* ĝis 1988, kiam li E-istiĝis sekve al radioelsendo de *France-Inter*, kiu konvinkis lin pri la lingvaj kvalitoj de E-o. De 1989 ĝis 2002 E-igo de germana literaturo (Bertolt Brecht, Heinrich Böll, Georg Büchner, Hans Magnus Enzensberger, Franz Kafka, Karl Marx, Reiner Maria Rilke, Arthur

Schnitzler, Botho Strauss, Patrick Süskind, Georg Trakl) kaj franca (José Bové, Catherine Millet) - ĉio ĉi videbla en la retejo <http://vlutermano.free.fr>, de 2002 ĝis nun E-igo de artikoloj por *Le Monde diplomatique en Esperanto* (<http://eo.mondediplo.com>). Krome, ekde 2005, agado, ĉefe per tradukado de artikoloj kaj eldonado, en la *Monda Asembleo Socia (MAS)* (<http://mas-eo.org>).

La kontribuo de la DIPLO al la Esperanta ĵurnalismo

1. Enkonduke estas prezentataj la kialoj de lia engaĝiĝo por „Le Monde diplomatique”. Pluraj ekz-oj de efika manipulado de informoj kaj analizoj, kiuj efike trudas sin al la opinio kaj al la reala politiko.

2. Kial ĝuste la franca „Le Monde diplomatique”?

3. Personaj dispozicioj kaj kondiĉoj.

4. La aventuro de liaj unuaj paŝoj ĝis la momento en kiu la pariza skipo de LMD proponis la starigon de E-eldono de la DIPLO.

5. Starigo kaj evoluo de la reta eldono de *Le Monde diplomatique en Esperanto*.

6. Okazaj paperaj eldonoj de nia DIPLO.

7. La fondo de la Monda Asembleo Socia (MAS) kaj ĝia rilato kun la DIPLO; ĝia aktiveco, interalie la eldonado de libroj.

8. La loko de la DIPLO kaj de MAS en E-ujo.

Laŭ la disponebla tempo detaligos aŭ transsaltos iujn el la menciitaj punktoj, esperante dediĉi relative grandan spacon al diskutado kun la ĉeestantoj.



Yves NEVELSTEEN (1974). Li loĝas en Flandrio (Belgio) kaj havas du infanojn. Li studis komunikadon (opcio ĵurnalismo/informado) kaj ĝis januaro 2008 laboris kiel tradukisto de komputilaj programoj kaj verkisto de akompanaj manlibroj. Li eklernis E-on en 1989 kaj estis prezidanto de la Flandra Esperantista Junulara Asocio de 2004 ĝis 2007. Ekde 2004 s-ro Nivelsteen redaktas la revuon **JEN**, kiu sin direktas al junaj E-parolantoj kaj interesitoj en Flandrio kaj Nederlando. Kiel estrarano de **E@I** li realigis la projektojn Manlibro pri Vikipedio kaj Komputeko.

Komputeko

E@I prezentas sian plej novan eldonon: *Komputeko*. Temas pri profesie presita, bindita libreto en formato A5, 96-paĝa kun pli ol 7500 prikomputilaj terminoj. Yves Nivelsteen, **E@I**-estrarano kaj kunordiganto de la projekto, rakontos pri ĝia evoluo kaj planoj.

S-ro Nivelsteen komencis kolekti prikomputilajn vortojn en E-o en aprilo 2006. Li diskutis interalie kun membroj de la tradukteamo de Drupalo, Firefox, KDE kaj OpenOffice.org. Kolektiĝis tiel ĉi jam pli ol 7500

tradukojn al E-o. Temas verŝajne pri la plej granda kaj (pli grave) plej ĝisdata kolekto de tiaj terminoj en E-o. Kunlaboras al la projekto interalie akademianoj Bertilo Wennergren kaj Maŭro la Torre.



Gabriela Kosiarska (1978). Redaktorino de la E-Redakcio de Pola Radio (PR) ekde la 2002-a jaro. Ekde la 2004 konstanta kunlaboranto de la porjunulara programo de PR-BIS i.a. prezentanta tie pollingvaj trarigadojn de la E-periodaĵoj. Kunlaborantino de du kromaj landaj programoj de PR pri E-o, lingvaj demandoj kaj mondvojaĝado. La ĉefrespondeculino de la novformulaj E-elsendoj de PR, aktuale krom rekta aŭskulteblo aboneblaj kiel podkasto. Kunlaboranto de **Kontakt**. Diplomito de la Varsovia Univeristato ĉe la fakultato de la pola lingvo, studentino de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato de Adam Mickiewicz en Poznano. Membro de UEA. Aktiva, kaj unu el la kernaj kunlaborantinoj de interreta

projekto de E@I *Aktuale.info*. subvenciata de ESF.

Maciej Jaskot (1981). Instruisto de hispana gramatiko ĉe la Varsovia Universitato kaj ĝia studento de doktorigaj studoj. Sekretario de la Hispanlingva Fako de la Varsovia Altlernejo pri Socia Psikologio (SWPS). Konstanta kunlaboranto de la E-Redakcio de Pola Radio ekde la 2004-a jaro. Studento de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato de Adam Mickiewicz en Poznano. Kerna teamano de la interreta projekto de E@I *Aktuale.info*.



Specifeco de la interretaj elsendoj en la Internacia Lingvo – novaj defioj por la radiofonio kaj novaj eblecoj por la movado?

La prelego celas trovi respondon al la titola demando, kiu estas plurfaceta. Nome, konsciante pri rapide evoluiĝanta tekniko, E-ĵurnalistoj ne povas ne sekvi la plej freŝajn atingojn de la monda radiofonio ĉar E-radioelsendado bezonas novecajn solvojn kaj profesiecon. En ĉiam pli hastanta mondo la podkasta sistemo ŝajnas esti unu el la plej taŭgaj informosolvoj por tia komunumo, kiun konsistigas e-istoj enloĝantaj ja diversajn mondopartojn. Kaj per utiligo de novaj teknikaĵoj ni konsciu pri tio, ke la E-movado iĝas pli forta kaj enestas pli internacian, vastskalan medion.



Giorgio Bronzetti. Esperantiĝis juna en 1946 kaj aktivis en pluraj kampoj kiel fondado de grupoj, organizado de kongresoj, inter kiuj la IJK de L'Aquila 1955, iniciatinto de presagentejo *Disvastigo*, lingvodefenda asocio *Allarme Lingua*, *Mikoklubo*, *Premio La Soldato de Kapestrano* ktp.

Informado pere de *Disvastigo*

La gazetara agentejo *Disvastigo* naskiĝis pro manko en Italio de kvalita informado pri la lingvo-problemo kaj pri la ekzisto de E-o kaj ĝi kreiĝis kiel sendependa entrepreno por esti pli kredebla. *Disvastigo* sin prezentas kiel presagentejo pri problemoj de internacia lingva komunikado sed diskonigas ankaŭ kunvenajn aŭ simple feriajn eventojn de la movado kaj en sia retejo www.disvastigo.it montriĝas ne nur la artikoloj dissendataj de la agentejo sed ankaŭ aliaj aperintaj en nacia gazetaro kaj eseoj pri lingvo-politiko, kiuj, laŭ la leteroj ricevataj de la redaktoroj, estas aparte legataj kun intereso de studentoj pri politika scienco kaj fakoj pri komunikado ellaborantaj siajn doktoriĝajn tezojn. Ne mankas en sekcio “disesperanto” artikoloj en E-o.

Disvastigo dediĉas apartan spacon al propono E-o kaj al interlingvistikaj studoj por klopodi ŝtopi rimarkindajn informajn mankojn de itala gazetaro pri la lingvo likvidata preskaŭ ĉiam trosimpleme kiel nenatura kaj ne kultura.

Aparte traktataj estas ankaŭ la iniciatoj por lingva demokratio de komitato *Allarme Lingua* (www.allarmelingua.it), kiu dezirus *disvastigi* novan koncepton pri civila komunikado en kiu la rajto kompreni kunfandiĝu al la devo igi sin kompreni, por ke la lingva problemo estu alfrontata larĝvide sen malamaj sintenoj, en perspektivo en kiu estu spaco kaj por la angla, kiu ofte rolas kiel “pasvorto” al mondaj faktoj, kaj por E-o, kiu meritas, for de malnovaj antaŭjuĝoj, esti diskonigata por ke estu la socio mem, kiu demokrate taksu ĝiajn valorojn. Kaj *Disvastigo* faras sian eblon por ĝin diskonigi plej kredeble, sen bombastoj.



Abdurahman Junusov (1948). Finis filologian fakultaton de Dagestana Ŝtata Universitato (la rusa lingvo kaj literaturo). E-isto ekde 1968 j. Ekde 1972 j. laboris en la respublika televido kiel korespondento, redaktoro, ĉefredaktoro. Dum pluraj jaroj gvidis popularajn elsendojn pri arto kaj kulturo, unu el kiuj, la programo *Rakurso* ĝis nun estas konsiderata kiel la plej bona projekto de Dagestana televido. En 1994-96 laboris kiel redaktoro en la E-gazeto **Eventoj** (Hungario) kaj ĉe la revuo **Monato** (Belgio). Laboris kiel ĉefredaktoro en la gazetoj *MK-Dagestan*, homrajtdefenda *Kroniko de la semajno*, estas gajninto de tutrusiaj premioj por ĵurnalistiko, membro de la Unio de ĵurnalistoj de Rusio. En la jaroj 1997 kaj 1999 estis elektita prezidanto de Rusia E-Unio kaj komitatano "A" de UEA. Partoprenis plurajn E-kongresojn, konferencojn, festivalojn ktp, estis inicianto kaj komandanto de la Unua E-Laborbrigado en Sovetio (post la tertremo en Dagestano), partoprenis Arkeologian laborbrigadon en Bulgario. Estas kunordiganto de la Moskva Helsinkia Grupo, unu el la plej malnovaj kaj gravaj organizacioj sur la kampo de defendado de la homaj rajtoj. Kunordiganto de la Moskva Buroo por Defendo de la Homaj Rajtoj, ĉefredaktoro de la sendependa homrajtdefenda gazeto *Dagestana rakurso* (diplomito de la Internacia Festivalo de Ĵurnalistoj por serio da publikaĵoj pri la homaj rajtoj).

Kunlaboro kun la amaskomunikiloj — strategio, rimedoj

Kiel labori (kaj kunlabori) kun la amaskomunikiloj?

Ĉu sufiĉas sendi al la redakcio artikolon pri E-to — “la lingvo de la paco kaj amikeco”?

Pri kio pensas la redaktoro, kiun vi penas konvinkigi, ke vi feliĉigis lin per sia artikolo pri E-o?

Kiujn **amas** la **amaskomunikiloj**?

Ĉu **pri** Esperanto aŭ **per** Esperanto?


Kio estas interesa de via vidpunkto, kaj kio – de la vidpunkto de la redaktoro?

Kio estas la “informa preteksto”, kaj kiel krei ĉi-pretekstojn?

Kiel kapti la atenton de TV?

Gravaj nuancoj inter gazeta kaj televida komunikoj (raportaĵoj, “informaj eventoj”).

Estas serio da simplaj kaj ne tro simplaj demandoj pri Esperanto kaj amaskomunikiloj, kaj la respondojn ni provu trovi kune.



Peter Baláž (1979). Slovako. Kunordiganto de *E@I*, estrarano de EEU, kunfondinto de Slovacia E-Junularo (SKEJ), kaj ties prezidanto inter 2003-2008. Post studado de Hotelakademio laboris 2 jarojn en Germanio kaj Aŭstrio. Ekde 2003 eldonisto (eldonejo **Espero**: www.espero.sk), same ekde 2003 aktiva en *E@I*, ekde 2005 ĝia kunordiganto, okupiĝanta ankaŭ pri projektplanado. En libera tempo verkas artikolojn, filmas, okupiĝas pri grafikaĵoj. Hobioj: psikologio, libroj, filmoj sci-fi, meditado...



Jevgenij Gaus (1978). Naskiĝis en Litovio. En 1999 komencis lerni E-on kaj post kelkaj monatoj da lernado ekinstruis ĝin. Laŭ eduko estas juristo, sed jam dum multaj jaroj profesie okupiĝas pri diversaj internaciaj projektoj, rilataj al komputiloj kaj interreto. Nuntempe estas estrarano de *E@I*.

Efika reta informado: *Esperanto Aktuale*

aktuale.info - ĉe tiu adreso baldaŭ estos konstruita paĝaro, en kiu homoj povos trovi tre buntajn kaj diversspecajn informojn pri E-o kaj E-movado. La nomo de la paĝaro estos *Esperanto aktuale*.

La ĉefa celo de tiu projekto estas krei multlingvan informportalon kun celo informi (ĉefe) eksteran publikon pri okazaĵoj en la movado kaj pri interesoj de esperanto-parolantoj. Aldona celo de tiu projekto estas kunligo de fortoj de esperantistoj por pli efika informado al ekstera publiko.

La informado pri okazaĵoj en "Esperanto-mondo" al ekstera publiko (al neesperantistoj) okazas relative malofte. Tre ofte eĉ la esperantistoj mem ne scias, kio okazas en najbaraj landoj. Malgraŭ la disvolviĝo de interreto kaj modernaj teknikoj al E-movado, daŭre mankas reprezenta paĝaro, kiun povus ajna persono konsulti por ekscii, kio nova okazas en E-komunumo tra la mondo. Tial *E@I* komencas konstrui flekseblan, facile uzeblan paĝaron, kiu servu por E-io kiel efika amaskomunikila inform-agentejo (simile al naciaj agentejoj). Tiu retejo estus loko, kie publiko informiĝus en diversaj lingvoj pri agado de esperantistoj, ricevus koncizajn kaj detalajn informojn pri ĉio, kio rilatas al E-o, ekscius pri interesoj de E-parolantoj.

La projekto planas ne anstataŭigi nunajn ekzistantajn informpaĝojn, sed kunligi fortojn de ĉiuj informemaj personoj kaj per komuna laboro konstrui ion vere bonan. Prizorgantoj de la nunaj informpaĝoj kaj diversaj E-organizoj ekhavos eblon reklami siajn servojn kaj sian agadon en multaj

lingvoj al ekstera publiko. Realiga teamo esperas trovi kunlaboremajn informantojn tra la tuta E-io, por ke la enhavo de la paĝaro estu vere tutmonda kaj bonkvalita.

La projekton finance subtenas usona fondaĵo *Esperantic Studies Foundation*, kreon de la paĝaro prizorgas la organizo *E@I* (www.ikso.net), kiu okupiĝas ĉefe pri retaj projektoj kaj realigas interalie la projektojn: www.lernu.net, www.komputeko.net, DVD *Esperanto elektronike*, la filmo *Esperanto estas...*

Uzado de modernaj teknikoj en informado

Facile kaj rapide – tio estas ne nur frapfrazo de la organizo *E@I* (www.ikso.net), sed ankaŭ trafa priskribo de la plej ĉefaj avantaĝoj de modernaj teknikoj.

Komputilo kaj interreto pli kaj pli penetras ĉiutagan vivon de homoj. Novaj teknikoj igas nian vivon pli rapida kaj informplena, krom tio ili povas ege faciligi nian vivon, laboron kaj eĉ povas signife antaŭenigi disvastiĝon de E-o. Ĉu e-istoj eluzas ĉiujn bonajn flankojn de tiuj teknikoj? Ĉu ili sukcesas postsekvi la evoluon de la komputila mondo? Ĉu ili scias, kiel plej efike uzi la kombinon de komputilo kaj interreto? Ĉu la E-movado estas sufiĉe kvalite reprezentata en la reta mondo? Kiuj aferoj, rilataj al E-movado ĉefe mankas en la komputila mondo kaj kiel eblas forigi tiujn mankojn?

En tiu ĉi prelego oni povos ricevi respondojn al ĉiuj supraj demandoj. Oni povos ekhavi superrigardon pri la ekzistantaj rimedoj, teknikoj kaj ricevos informojn pri tio, kiel eblas uzi ilin pli efike ne nur por ĉiutaga vivo, sed ankaŭ por profesia kaj efika informado.

PS: *Esperanto elektronike* ne restu nur nomo de DVD-disko, eldonita de *E@I*, sed iĝu ankaŭ ĉiutaga labor-maniero en moderna epoko de e-istoj.

„Esperantoland“ — 400.000 kompakt-diskoj por pola publiko

Universala Kongreso en Bjalistoko 2009 estas bona okazo pli vaste kaj intense informi pri E-o polan popolon. Unu el la plej grandaj informkampanjoj rilate E-on realiĝos ĝuste danke al la urbo Bjalistoko. Kunlabore kun tagĵurnalo *Gazeta Wyborcza* estos eldonita KD-Romo *Esperan-*

toland', kiu aperos kiel aldonaĵo al la gazeto en eldono de 400.000 kopioj.


Kreadon de la disko pretigas *E@I* — internacia junulara organizo, okupiĝanta ĉefe pri retaj projektoj.

La disko estas plurmedia prezento de la lingvo E-o, kiu per luda formo informas pole kaj E-e pri la lingvo, ebligas lerni ĝin, ludi, aŭskulti muzikon, spekti filmojn ktp.

Moderna kaj luda maniero prezenti Lingvon Internacian povas altiri multajn gejunulojn, kiuj eble sekve ekvolos pli profunde konatiĝi kun E-o.

Dum Kongreso okazos unua oficiala prezentado de la disko, eldonota nur septembre.

Ĉu eble la projekto estus imitinda ankaŭ por aliaj landoj kaj lingvoj? Elkreo de similspeca multlingva DVD-Romo estas revo de *E@I*. Eble danke al la kontaktoj dum Ĵurnalista Kongreso ĝi povos realiĝi?



Stefan MacGill (1948). Naskiĝis en Nov-Zelando. Denaska e-isto. Kunfondinto de E-Junulara Asocio de Nov-Zelando (1964) kaj aktivulo tie ĝis 1972. Studis en Universitatoj Victoria, Canterbury kaj Massey (69-75), ĉefe geografion. Diplomiĝis instruisto por elementaj lernejoj en 1974. Volontulo (la dua en la programo) en la CO de UEA (1976), oficisto (1977-86). Redaktoro/kunordiganto de *Jarlibro* (76-86), teknika redaktoro de *Kontakto* (78-86). Vicprez. de TEJO (77-79), prez. (1979-80). Direktoro de CO (1980-84). Redaktoro de *Juna amiko* (1986-96 kaj ekde 2000). Vicprez. de ILEI (1989-92), prezidanto (1992-94). Restariginto de la ekzamenoj UEA/ILEI kaj ĝia sekretario (1989-95). Profesie ekde 1989 verkas helpetekstojn por komputilaj programoj (i.a. optika karakterrekono). Esploras lingvo-didaktikon kaj preparas E-instru-

materialojn. Vivas en Hungario de post 1986. Havas tri filinojn, Karina (1990), Hjal (1992) kaj Sonja (2000) — denaskaj e-istoj.

Malfacilaĵoj kaj ebloj por enmerkatigi revuon por komencantoj.

Ni esploros la apartaĵojn de la E-gazetara merkato, kaj la specifajn defiojn por revuo kiu celas junulojn, lernejanon kaj komencantojn. Tipa revuo celas reteni sian legantaron tiom longe kiom eble – male, revuo por komencantoj devas esperi perdi siajn legantojn kiam ili estas progresintaj el la kategorio *komencanto*. Lernejanon kaj infanojn ne restas tiaj eterne. Alia defio estas kiel teni la revuon alloga por nuntempaj junuloj; la revuo mem, fondita en 1973, preskaŭ fariĝas mezaĝulo, la redaktoroj signife pli – multaj kontribuantoj portas unu respondon al la rejuniga imperativo.

Kiel adapti fizike presitan revuon al ret-konektita mondo?

Kelkaj E-revuoj transiris al nuta ret-versio, novaj ret-revuoj naskiĝas. La plimulto de fizike presitaj revuoj havas ret-paĝon (kiel ankaŭ *Juna amiko*), sed malmultaj aperigas rete la plenan enhavon rete, timante perdi la legantaron por la presita versio. Ni esploros la solvojn de *Juna amiko* (suplementaj kaj arĥivaj materialoj rete) kaj de la organo de ILEI, IPR (plena ret-versio estas abonebla paralele kun papera versio). Ni esploras la avantaĝojn kaj limigojn de ambaŭ livermanieroj.



Anatolo Gončarov (1940), dr de kemia scienco. Esperantistiĝis studento en 1958 en ukrainia urbo Odessa. Ankoraŭ studente provis E-instrui kaj gvidis junularan E-klubeton. Eklaborinte en Barnaul ekhavis ideon apartigi junularajn E-klubvivojn de la aĝulaj. En 1964 li fondis junularan tutlandan organizaĵon sub la koda nomo Adresaro de Junaj Sovetiaj Esperantistoj, kiu en 1966 ŝanĝis sian nomon je SEJM (Sovetia E-Junulara Movado), kies unua kaj poste revena prezidanto li estis. Dum ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj) periodo li estis ties estrarano kaj gvidis la scienc-

teknikan sektion. Iom antaŭ perestrojka li lasis sciencistan karieron favore al nur E-agado. Per ekspresmetodaj E-kursoj en Moskvo 1987 – 1990 fondis E-klubojn *Lev Tolstoj*, la literaturan kaj de sciencistoj-esperantistoj. Ĉe perestrojka pro la novaperintaj problemoj la E-kursoj ne plu povis doni eĉ etan salajron, kaj aldone perdinte moskvan loĝeblon Anatolo migris tra la lando serĉante optimuman viveblon. Paralele kaj malgraŭ

la malfacilaĵoj li studis la evoluon kaj riĉiĝon de E-o je esprimeblecoj, publikinte plurajn artikolojn ĉi-temajn. Nun A.Gonĉarov provizore loĝas en Krasnojarsk estante honora membro de TEJO, membro de Atesta Komisiono en REU (Rusia E-Unio) fakdelegito de UEA kaj senatano en E-Civito.

La ĉefa moto de la informado: kion E-o jam valoras (beletra esprimivo-riĉo) sed ne kiom ĝi povas valori estonte

Interkultura komunikado, E-o kaj ĵurnalismo estas sufiĉe intime ligitaj nocioj. E-o servas la interkulturan komunikadon, kaj ĵurnalismo servas informi pri la rezultoj.

Estas du modeloj apliki la interligitecon de tiuj tri nocioj. La unua — kio E-o povas esti se ĝin akceptos la tuta mondo aŭ iu grupiĝo de la landoj. Subkomprenas ĝi apelaciojn, petojn konvinkojn al la pintaj homoj aŭ internaciaj organizaĵoj.

La dua – montri kio E-o jam estas — sinturno, informado al la popoloj, al la ordinaraj homoj.

Ŝajne, ke la unua modelo iel similas komunismon, promesi kio estos en la estonto. Ni ne traktu ĝin. La dua modelo jam iom ekzistas kaj temas pri la interkultura dialogo surbaze de E-o.

Bedaŭrinde la E-ĵurnalismo okupiĝas ĉefe pri diskonigo de la unua modelo. Kaj ni celu montri, kiom avantaĝa estus vasta diskonigo de la dua modelo.

E-o rolas ne nur kiel grava rimedo de interkultura komunikado, sed ankaŭ kiel interkultura fenomeno de riĉa internacia kulturo. La kulturo kaj la lingvo kiuj ensorbis la riĉaĵojn de naciaj kulturoj kaj lingvoj. Tio similas al la interrilato de ĉevalo kaj aŭto, kie estas kultura aŭtomobilo kiu moviĝas kaj helpe de motoro kaj helpe de alkroĉaj ĉevaloj (naciaj lingvoj).

Do, la kultura fenomeno E-o ne nur ne ekskludas la kulturportajn naciajn lingvojn, sed male ĝi bezonas ilin kiel nutraĵon por propra evoluo. Evoluo de la egalrajtaj naciaj lingvoj – komunikilo de la respektivaj popoloj, evoluigas E-on komunikilo inter la popoloj. Nome tiun modelon jam vivantan la E-ĵurnalistaro montru al la mondo kiel io reala palpebla, malkiel oni montras nur teorie estonttempan funkciadon de E-o. E-o estas varo kaj oni montru ties ecojn, sed ne kiucele kaj kiam oni uzu ĝin.



Giorgio Silfer (Valerio Ari, 1949). Naskiĝis en Milano. Edzo de d-ino Perla Martinelli. Pedagogoo kaj andragogo, doktoro pri lingvoj kaj doktoro pri beletristiko. Lingvoinstruisto ĝis 1982, poste organiza konsilisto. Li kariesis kiel parlamenta ataŝeo, estris la kabineton de ministro kaj tiun de parlamenta prezidumo, finante sian profesion kiel responsulo pri la internaciaj rilatoj de la sama parlamento (Regiono Lombardio). Nuntempe li dediĉas sin precipe al publicista kaj verkista aktiveco. Li kunfondis en 1970 la revuon *Literatura Foiro*, kiun li ĉefredaktis ĝis 1980. Li multon iniciatis kaj realigis por E-o kiel kulturlingvo: interalie li kontribuis al ĝia agnosko kiel literatura lingvo fare de PEN-Klubo (1993, kaj en 2004 40% de la delegitaro subtenis lin kiel internacian sekretarion) kaj kiel vivanta lingvo fare de la Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo.

Organize li aktivis interalie por la fondo kaj/aŭ la relanĉo de kulturcentroj, kaj tra LF-koop, la sola eldonejo en Esperantio difinebla kiel „multimedial“. Kiel verkisto en E-o li estas precipe dramaturgo (deko da dramoj, preskaŭ ĉiuj enscenigitaj, aŭ surbendigitaj), eseisto kaj publicisto, sed ankaŭ poeto (trifoje Florluda Majstro, kaj gajninto de premio *La Verko de la Jaro*). Unu el la ĉefaj ideologoj de la raŭmismo, ekde 2006 li prezidas la E-Civiton.

Kiel funkcias la cenzuro en la Esperanto-gazetaro?

Ekde siaj unuaj jaroj la E-komunumo konfrontiĝas kun la cenzuro, antaŭĉambro por la krimigo kaj teroristigo de la disidentoj.

Lazaro Ludoviko Zamenhof, civitano de la plej aŭtokratia imperio en Eŭropo, rezidanto en la ĉefurbo de subpremata popolo (Varsovio), ano de la plej suspektinda etno (laŭ la falsaj *Protokoloj de la saĝuloj de Ciono*, produktitaj de la cara sekurservo) kaj mem filo de oficiala ŝtata cenzuristo, plene konsciis pri tio. Fine li estis cenzurita eĉ en la libera Francio: en Bulonjo-ĉe-Marŝo li estis devigata de la francaj esperantistoj elsarki la lastan strofon de sia *Preĝo sub la Verda Standardo...*

PEN-Klubo Internacia (komitato pri verkistoj en prizono) en lastatempa dokumento priskribis la skemon laŭ kiu aplikiĝas cenzuro en la nuntempaj socioj: la referencoj estas a) ofendego al la religio, b) aliĝo al alternativaj versioj de la oficiale agnoskita historio, c) nedezirindaj riveladoj pri koruptado aŭ alia mallojalaĵo de la ŝtataj oficistoj, d) asertita misfamigo. Ĉu tio estas aplikebla ankaŭ al la E-socio? Jes, sed laŭ specifaj trajtoj.

La referenco a) aplikiĝas en E-io en formo de akuzoj pri ridindigo kaj danĝero por la „sankta esperanta afero“: vidu la artikolon de Detlev Blanke en la maja numero 2001 de la organo de UEA, ankaŭ grafike

celanta morale bastoni la fondontojn de la E-Civito (la konstanta malfruo de la redaktoro parte fiaskigis la celon). Sed pli ĝenerale ĝi manifestiĝas per la „defendo de la neŭtraleco“: vidu la kazon de la cenzurita n-ro 2:1978 de *Kontakto* (ĉefredaktoro Jouko Lindstedt), kiu povis aperi nur kiel aparta broŝuro ĉe privata eldonejo.

Laŭ la referenco b), kiuj efektive fosas en la historio kaj ne kontentiĝas pri la oficialaj versioj el la finvenkisma piramido, tiuj estas suspektindaj.

La referenco c) aperas en la kazo, el kiu fontis la krizo en la Centra Oficejo de UEA (2001) kaj la atakoj kontraŭ la rivelintino.

La referenco d), analogaj al la ĵusaj, foje generas efektivan misfamigon (vidu la kazon de *La liturgio de l' foiro* de Jorge Camacho).

Aldone, en E-o la „cenzuro antiterorisma“ estas vaste praktikata en formo de sistema prisilentado aŭ minimumigo de alies atingoj.



Perla Martinelli. Naskiĝis en Italio, vivas en Svislando, es-tante itala kaj svisa ŝtatanino. Edzino de Giorgio Silfer. Tradukisto, diplomita instruisto, doktoro pri modernaj lingvoj kaj literaturoj. Ŝi studis ankaŭ desegnadon kaj grafikon. Ĉefredaktoro de *Literatura Foiro* (1980-1994), dum kelkaj jaroj redaktoro de *Heroldo de Esperanto*; en ambaŭ ŝi konstante kunlaboras. Ekde 2006 ĉefredaktoro de *Femina*. Ŝi kunfondis la eldonejon LF-koop en 1980, kaj de tiam prizorgis la grafikon de multaj produktoj: periodaĵoj, libroj, songazetoj, vidbendoj, diskoj, ekspozicia materialo. Ŝi reviziis kaj fintradukis, kun Gaston Waringhien, la *Dekameronon* (unuajn Tri Tagojn). Ekde 1989 membro de la Akademio de Esperanto, kies Ĝenerala Sekretario ŝi estis en 1996-98 (sola virino dum la pli ol centjara ekzisto de tiu lingva institucio). Kunfondinto de la E-PEN-centro, senatano kaj lingva komitatano de la E-Civito.

Virinaj voĉoj en la Esperanta gazetaro

Kvankam virinoj vigle aktivis ekde la fruaj tempoj de nia lingvo, iliaj figuroj ĉiam restis en duona aŭ kompleta ombro. Ĉar unu el la celoj de Feminisma E-Movado (FEM) estas doni al la e-inoj la dignan lokon je kiu ili rajtas, ekde sia fondo en 2004 la asocio decidis lanĉi periodaĵon, kiu prilumu la valoron de la virina kontribuado kaj, surbaze de la historio de la E-popolo, informu pri la nuna realo kaj montru konkretajn perspektivojn,

donante voĉon al indaj esprimiĝoj. Tiel naskiĝis *Femina*, kies subtitolo „revuo en esperanto ne nur por virinoj“ klare montras ke la nova feminismo intencas helpi la moralan kaj intelektan kreskon de Esperantio man-en-mane kun samcelaj viroj, ekster la dogmo pri maleblo de interkompreniĝo.

Per tio *Femina* kupliĝas al la tria ondo de la feminismo: post la epoko de la sufraĝetoj, celantaj precipe la balotrajton kaj la profesion egalrajtecon, kiujn alportos definitive (bedaŭrinde por pacifistoj) nur la du mondmilitoj; post la Sesdekoka kaj la civilrajtaj bataloj de la 1970aj (kies spurojn atestas ankaŭ Esperantio, per la bulteno *Sekso kaj Egaleco* de Anna Brennan, nun Loewenstein); jen la procezo kiu startis per la Virina Mondkonferenco en Pekino (1995), en kies sulko situas FEM, prezidata de Marie-France Conde Rey.

Femina, kvankam subtenata nur de la Pakto por la E-Civito (kaj eĉ foje rekte malhelpita/ata de aliaj asocioj), jam eniris sian kvaran eldonjaron kaj firme intencas longe vivi!



Ljubomir Trifonchovski (1958). Profesie estas pupteatra dramaturgo kaj publicisto. Esperantiĝis en 1973. Antaŭ ol transpreni la ĉefredaktorecon de revuo *Literatura Foiro* antaŭ dek unu jaroj, li redaktis la revuon *Bulgara Esperantisto* kaj la bultenon de BEA *La letero*. Sekretario de la Esperanta PEN-Centro kaj E-delegito en la Komitato pri tradukado kaj aŭtoraj rajtoj kaj en la Komitato *Verkistoj por paco* de PEN Klubo Internacia. Vickonsulo pri kulturo de la E-Civito. Membro de la Lingva Komitato de Esperantio. Aŭtoro de pluraj originalaj libroj kaj teatraĵoj en E-o, tradukisto.

Kultura politiko de kulturaj periodaĵoj (laŭ la sperto de revuo *Literatura Foiro*)

Kio estas “kultura” periodaĵo? Kio kaŝiĝas malantaŭ subtitolo “kultura revuo en Esperanto”? Kio diferencigas la kulturajn periodaĵojn de la ceteraj en E-io? Kiu estas la kulturaj periodaĵoj en E-io hodiaŭ? Kie situas la kulturaj periodaĵoj en Lingvo Internacia kadre de la spektro de la kulturaj gazetoj ekster E-io? La prelego serĉos respondon al ĉi tiuj demandoj, konsiderante ke revuo *Literatura Foiro* kun sia jam preskaŭ 40-jara tradicio establigis novan kulturalan politikon en E-o kaj en E-io kaj ankaŭ ekster E-io.



Aneto Muhlemann (1984). Naskiĝis en Ĝenevo (Svislando). Pasia pri lingvoj, ŝi akiris licencon en franca kaj slavaj lingvoj en Laŭzana universitato. Krom la daŭrigo de sia akademia vojo, ŝi kunlaboras, jam de du jaroj kaj duono, al tutsvisa franclingva ĵurnalo 24 Heures (24 horoj), kaj regule skribas artikolojn esperantlingve. Komence de 2008, ŝi estis elektita kunĉefredaktorino de **Heroldo de Esperanto**.

Ĵurnalismo en kaj ekster Esperantio: paraleloj kaj kontrastoj

Ĉu ĵurnalismo interne de E-io estas alia ol ekstere de ĝi? Tiun demandon pritrakti estas interese laŭ empiria maniero, nome surbaze de individua sperto.

Unuavice, la prezento mem de la ĵurnalismo ne estas senkulpa. Fakte, la “plej bela metio de la mondo” havas plurajn vizaĝojn, intime ligitaj kun la rolo atribuita al informiloj pere de la socio. Tio des pli gravas, ĉar la rajto al informado estas unu el la ĉefaj fundamentoj de la demokratio. En tiu perspektivo, gravas pritrakti – paralele en kaj ekster E-io – la kolektadon, elekton kaj transdonon de ĉiuj informoj, la profesionistan distancon necesan al laboro, la partoprenon al la monda historio, la ilusian karakteron de la vero, la diversajn faktorojn kiuj malhelpas kvalitan informadon kaj la rolon de la “kvara povo” en la futuro.

Oksigeno de la ĵurnalismo estas kuriozeco, kiu devas helpi naĝi ĝis la fonto de la informo; tio universalas. Sed kompreneble, la rilato al la informoj malsimilas, se temas pri E-revuoj aŭ aliaj, ĉar la kultura biotopo ŝanĝas. Krome E-io ne posedas verajn ĵurnalojn, semantike laŭ la franca vorto “jour” = tago, aperantajn ĉiutage, kio havas impakton sur la kvalito de la artikoloj, same kiel la amatora strukturo de multaj titoloj.

Entute, la marĝena karaktero de nia samideana socio influas la rolon mem de la ĵurnalisma laboro. Unuflanke, ĝi anoncas pli grandan sendependecon en la senco ke E-maskomunikiloj ne devas suporti la peson de ekonomiaj diktatoj. Alia libero konsistas el plia ebleco disvolvi kreativecan formon (sen malbonigi la fundon) por informado. Ĝuste ekster E-io, profesia formado de ĵurnalistoj ofte kongruas kun psika muldilo.

Paralele al tiuj neŝtopitaj vojoj, indas paroli pri la specifa stampo de E-o. Efektive ĉiu lingvo enhavas propran koncepton pri la mondo. Necesas scii, kiom da artikoloj verkitaj en Zamenhofa kreaĵo estas ligitaj kun la “Ideo” kaj ĝiaj valoroj. Aldone gazetaro estas unu el la ĉefaj portantoj de nia kulturo, kio estas preskaŭ unikaĵo. Do, por esperanta ĵurnalisto, la barilo inter observado kaj aktorado estas malpli rigida.

Ĉi rilate estas oportune menciigi ke “LA VERO” montriĝis esti pura mito. Realeco estas tiel komplika, ke ĉiukaze neniu sukcesos prezenti la “kompletan veron”. Sed etiko puŝas ĉiun ĵurnaliston al objektiva rigardo. Denove ne eblas tion fari, ĉar ĉiu homo havas esence subjektan rilaton al la mondo.

Al tiuj internaj malfaciloj propraj aldoniĝas la specifa rolo de ĵurnalismo interne de kompleksa sistemo, kie interrilatas la informtoksado, pluraj ideologioj, emociaj polemikoj, elitista foseo, diversaj formoj de cenzuro, ktp.

Nuntempe pro pluraj faktoroj, la efektiva libero de la ĵurnalistoj malgrandiĝas. En nia mondialigita universo indus trovi flanke de E-io novan spiron por la kontraŭpova rolo de la ĵurnalismo.



Dieter Rooke. Esperantiĝis en la jaro 1982 per kurso gvidata de Claude Gacond en KCE (Kultura Centro Esperantista en La Chaux de Fonds, Svislando). En la jaro 1999 aliĝis al IKEK (Internacia Kolektivo de E-komunistoj; nuntempe ĝia sekretario) kaj al SAT, ĉar en ĝi ekzistas komunista frakcio. Aktivas en la E-civito kiel elektita senatano de ruĝa frakcio — kontribuas al enhavo de **Internaciisto** per primarksisma kurso kaj per porokazaj raportoj pri politikaj eventoj. Sporade ankaŭ verkas artikolojn por fakaj eldonaĵoj, ekde 2002-a kunredaktoro de **Heroldo**. Membro de LF-koop. Politika konvinko formiĝis dum la t. n. „malvarma milito” en la periodo de „mita jaro 1968-a”. Ekde tiam li partoprenis multnombrajn porpacajn manifestaciojn. Kiel flegisto dum duonjaro partoprenis en la brigado internacia en Nikaragvo por solidarece subteni la revolucion. Ekde jaro 1982 obstine laboradas por popola movado *Svislando sen armeo*.

Porlaborista E-gazetaro

En la prelego oni traktas la historion de laborista E-movado kaj ties implikiĝo en politiko (ĉu neŭtralismo aŭ nenia ismo?). En CDELI La Chaux de Fonds kun ĝia ampleksa E-biblioteko li esploras periodaĵojn de maldekstra gazetaro. Lia opinio, ĝi estu pli forta kaj pli influhava.

Statistiko (laŭlanda)

1.	Aŭstralio	1
2.	Aŭstrio	1
3.	Belgio	2
4.	Brazilo	1
5.	Britio	1
6.	Bulgario	5
7.	Ĉeĥio	2
8.	Ĉilio	1
9.	Ĉinio	4
10.	Danio	3
11.	Estonio	2
12.	Finnlando	2
13.	Francio	1
14.	Germanio	7
15.	Hinda Unio	1
16.	Honkongo (Ĉinio)	1
17.	Hungario	4
18.	Irano	2
19.	Irlando	1
20.	Italio	6
21.	Korea Respubliko	1
22.	Kroatio	4
23.	Kubo	1
24.	Latvio	3
25.	Litovio	62
26.	Luksemburgio	3
27.	Nederlando	1
28.	Pakistano	1
29.	Pollando	21
30.	Portugaliao	1
31.	Rusio	12
32.	Serbio	2
33.	Slovakio	5
34.	Svedio	6
35.	Svislando	5
36.	Ukrainio	5
37.	Usono	2

Entute: 183